

**SIMONAS DAUKANTAS
LAURYNAS IVINSKIS
M. DOVAINIS-SILVESTRAITIS**

ĖJEMAJTAJ FABELOJ



**Diversaj aŭtoroj:
Simonas Daukantas
Laurynas Ivinskis
M. Dovainis-Silvestraitis**

ĴEMAJTAJ FABELOJ

Tradukis Antanas Vaitkevičius



Vulpo kaj kapro

Vulpo vizitis kapron kaj diris:

– Iru ni al la arbaro por konstrui domon. Oni parolas, ke estos grandaj frostoj.

La kapro konsentis kaj ili ambaŭ komencis la konstruadon.

Jen subite kaj tute neatendite venis koko por spekti, pri kio la vulpo kaj la kapro okupas sin.

– Vi ne spektu, sed eku al la laboro kun ni, – diras al li la vulpo. – La vintro venos kaj vi frostiĝos.

– Nu, vi ne atendu min! – respondis la koko. – Mi profunde enmuskiĝos kaj ne frostiĝos.

Li turnis sin kaj foriris.

Baldaŭ alkuris porko.

– Helpu labori al ni, – invitas lin la kapro. – Vintro jam alkuras. Vi povos varme vivi kun ni kaj nenion timi.

– Ne bezonas mi viajn konsilojn, – respondĵetis la porko. En la teron mi rostrofosiĝos kaj travintriĝos.

Kiam la porko forkuris, tuj ansero alpaŝis.

– Ek al la helpo, amiko, – invitis lin la vulpo. – Vi kunlaboros en la konstruado de la domo kaj ni ĉiuj varme travintros.

– Sub mia plumaĵo mi sentas sufiĉe varme, – fiere respondis la ansero.

Post ioma tempo alsaltkuris leporo. Kiam la kapro invitis lin al la laboro, la leporo ekkriis, ke lia vilo estas tre densa kaj li ne timas froston. Li turnis sin, kaj neniu plu lin vidis.

La kapro kaj la vulpo, daŭrigas konstruadon, urĝas, ĉiujn invitas por helpi ilin, tamen neniu konsentas. Ili laboris, laboris kaj jen bonega domo estis konstruita. Kaj ambaŭ ekloĝis tie.

Venis la vintro. Ekstere oni ne povas elteni malvarmon kaj grandajn frostojn.

Tuj alkuris al la dometo la koko kaj ekpetis por ke li estu enlasita por varmiĝi.

– Vi ja diris „Mi profunde enmuskiĝos kaj ne frostiĝos.” Kial do vi ne enmuskiĝas?

Vidas la koko, ke la situo estas malfavora, do li ektimigis la vulpon kaj la kapron.

– Nu, se vi ne lasas min enen, mi malkovros la fundamenton kaj vi ambaŭ frostiĝos.

Ili enlasis la kokon kaj jam loĝas ili triope.

Baladaŭ aperis ankaŭ la ansero.

Enlasu min, vulpeto, enlasu min kapreto. Mi jam preskaŭ mortfrostis.

Do, vi diris “Sub mia plumaĵo mi sentas sufiĉe varme – mi ne timas”.

– Enlasu min urĝe, – koleras la ansero.— Se vi ne enlasos min, mi eltiros la muskojn el inter la murtraboj kaj vi cĉiuj frostiĝos.

Ili enlasis la anseron kaj jam estas kvar loĝantoj.

Tuj alkuris la porko kaj skuante pro frosto petas esti enlasata.

Enlasu min, fratetoj. Mi jam ne povas trasuferi la froston.

– Vi, do diris „En la teron mi rostrofosiĝos kaj travintriĝos“. Kial do vi ne rostrofosiĝas en la teron?

– Se vi ne enlasos, mi subrostrigos la fundamenton kaj vi ĉiuj frostiĝos.

La porko estis ankaŭ enlasita. Loĝas ili kvinope.

Kiam la frosto eĉ plie ekpremīs, alkuris la leporo. Kaŭras li ĉe la pordo kaj ploraĉas:

– Enlasu min, karuloj. Kompatu min!..

– Diris vi, ke via vilo estas tre densa kaj vi ne timas froston...

– Se vi ne enlasos min, mi tuj disfasetos la fundamenton kaj vin atendas mortfino, – timigas ilin la leporo.

Estis enlasita ankaŭ li. Jam vivas ili sesope. La vivo en la dometo estas varma, agrabla kaj ĉiuj bone konkordas.

En la arbaro estis multe da lupoj kaj la frostegoj ne ĉesis. Frostas la lupoj, malsatas. Vagkurante tra la arbaro ili trovis la dometon de la vulpo kaj de la kapro, sed ili neniel povas eniĝi. Ili provis iel kaj aliel, sed neniu malfermis la pordon por ili.

Tiam la plej malgrasa vulpo trafenestriĝis en la dometon. Apenaŭ la lupo sukcesis eniĝi, la kapro bat-bat per siaj kornoj en lian frunton kaj en la flankon. La vulpo kaptis la kaldronon kun varmego akvo kaj verŝas ĝin en la okulojn de la lupo. La ansero pinĉadas liajn gambacojn, la leporo ŝiras lian felon, kaj la porko tiras lian voston. Dume la koko sur la stangeto sidante ekkriis per terura voĉo. La lupo ekteruriĝinte ĵetis sin al la fenestro, kun grandaj penoj trapenetris eksteren kaj kuregis al la arbaro. Lin postsekvis ankaŭ aliaj lupoj.

Kiam ili atingis densaĵon, la malgrasa lupo komencis rakonti:

– Fratoj miaj! Mi apenaŭ postvivis. Apenaŭ mi eniĝis, la forĝisto tiel martelbatis min surkape, ke ĉio en miaj okuloj duobliĝis. Iu alia trapikis mian flankon per du pikiloj kaj subite aperinta tajloro tondis miajn gambojn. La virino apenaŭ elboligis miajn okulojn kaj la infanoj forrompis mian voston kaj disŝiradis mian felon. Sed la plej kolera estis la mastro de la domo, kiu senĉese kriegis: "Donu lin al mi! Donu lin al mi!" Ne, neniuj min tien plu enlogos, eĉ se mi estu tentata per bongusta kuko. Mi per tuta majlo ĉirkaŭiros la domon.

Ĉiuj lupoj konsentis kun li, ke la arbara dometo je granda distanco devas esti ĉirkaŭirata.

Pri la amikeco inter hundo kaj lupo

Iam ĉe iu terposedanto estis hundo, nomata Binzo, kiu estis de ĉiuj ŝatata. Sed la hundo maljuniĝis kaj la mastro pelis lin for. Nenutrigata hundo tre malsatiĝis. Vagante li renkontis lupon.

– Binzo, antaŭ iom da tempo vi estis tre forta. Kio nun okazis al vi?

La hundo kapklinigis kaj komencis eksplikadi:

– Nu, mia mastro forpelis min el la domo kaj plu ne donas manĝaĵon al mi. Kiel do, mi povas esti forta?

Jen la lupo diras al la hundo:

– Se vi deziras, mi faros tiel, ke vi ree estos ŝatata de via mastro.

– Ho ve! Mi tre deziras! – ekĝojis la hundo.

Tiam la lupo ekinstruis la hundon.

– Morgaŭ via mastrino iros por rasti fojnon kaj portos kun si sian malgrandan bubeton. Kiam ŝi sidigos la bubon surteren, mi kaptos lin kaj forkuros. Vi estu proksime en arbustoj kaj ekpersekutu min, mokcelante forpreni la bubon de mi. Kiam mi lin forĵetos, la mastrino ekĝojos kaj vi ree estos feliĉa. Nur diru al mi, kion vi pro tio al mi donos.

La hundo respondis:

– Kiam estos ĉe ni ia festeno, venu kaj mi ŝtelos por vi el kuirejo iom da viando kaj ostoj.

Do tia estis ilia interkonsento. Matene la mastrino, kunportinte sian bubon, foriris fojnon por rasti. Almenaŭ ŝi metis la infanon

surteren, tuj aperis la lupo, kaj kaptinte lin ekkuris al la arbaro. La mastrino ekvidinte tion laŭte ekkriis. Kaŭriĝanta ĉearbuste Binzo ekbojis kaj la mastrino instigadis lin:

– Binzo, kuratingu la lupon!

Binzo ĵetis sin post la lupo kaj forprenis la infanon. La mastrino tuj kondukis la hundon hejmen ĝojante pri la forpelo de la lupo.

Post ia tempo la mastrino aranĝis festenon. Alrampis tien ankaŭ la lupo. Ekvidinte la lupon, Binzo salutis lin kaj diras:

Atendu ĝis la vespero.

Kiam la lupo ĝisatendis la vesperon, Binzo ekŝtelportadis viandon kaj ostojn el la kuirejo. La lupo satiĝis per viando kaj ekpetis pri trinkoj. Tiam la hundo diras:

– Iru ni en la domon. Tie ni trovos iom da biero.

La lupo ektimis.

– Kiel mi iros? Iu povas rimarki min.

– Ne timu, neniuj rimarkos.

La lupo obeis kaj iris al la domo. Tuj Binzo alportis plenan kruĉon da biero. La lupo lektrinkis ĉion.

Aŭdas la lupo, ke homoj kantas, kaj ankaŭ li ekdeziris kanti.

– Ne kantu, – diras Binzo, – ĉar via voĉo ne agordiĝos kun la homaj voĉoj.

Sed la lupo eĉ ne provas obei la hundon. Iomete silentinte li ekhurlis je tuta sia potenco.

Ekaŭdinte la lupan hurladon, homoj ĉie ekserĉis lin kaj trovis enangule kurbiĝintan. Ili ekbatis lin kun la tuta ilia forto. La lupo

apenaŭ elkuris el la domo.

– Ĉu mi ne admonis vin, ke vi ne kantu, – riproĉas lin Binzo.

Ege ekkoleris la lupo pri la hundo kaj tute ne aŭskultas, kion tiu diras. Kurante al la arbaro, li diris:

– Morgaŭ venu al la juĝejo kaj kunprenu siajn depozicianojn.

Binzo, invitinte katon kaj kokon iras al la juĝejo, kie ilin jam atendis lupo kaj apro. Neĝisatendinte la lupo ordonis al la urso supreniri arbon por esplori, ĉu ne videblas la hundo kun siaj depozicianoj. Suprenirinte la urso ekvidis ilin kaj alkriis la lupon:

– Ho, fraĉjo, venas iaj fortuloj. Unu portas longan ponardon, alia tamburbatas kaj senĉese kriegas: „Ĉu estas iu ĉi-tie?” Kaj la tria ŝtonojn kolektadas.

La lupo tuj alkriis siajn depozicianojn:

– Ni kaŝu nin, ĉar estos tre malbone!

La lupo eniĝis en branĉamason, la apro – en formikejon, kaj la urso kaŝis sin sur la pinto de piceo. Kiam la hundo kaj liaj amikoj venis al la konsentita loko, la kato tute neatendite ekvidis movetantan voston de la apro, per kiu li forpeladis la formikojn, pikantajn liajn flankojn. La kato opiniis, ke tio estis muso kaj kaptis la apran voston. La ektiminta apro ekkuris kaj la koko ne malpli ektimiĝinta, flugis en piceon. Kriegante: “Donu lin al mi! Donu lin al mi!”

La falinta el la piceo urso ĝuste trafis la lupon. Ambaŭ forkuris en kontraŭajn direktojn. Kaj la hundo Binzo, restinta en la sama loko, gajnis la juĝaferon kontraŭ la lupo.

La bestoj de la stultulo

Iam mortanta patro heredigis sian bienon al la plej aĝa filo, kaj la pli juna ricevis sesdek ormonerojn por ke li klerigu sin kaj povu vivteni. Tamen almenaŭ la patro kovris siajn okulojn, la pliaĝulo forpelis la pli junan sian fraton el la domo dirante:

– Por kio vi bezonas la sesdek monerojn, se vi estas stulta, kiel arbostumpo? Vi malŝparos la monon sencele kaj senprofite. Mi ja konas vian saĝon! Ne senbezone oni nomas vin stultulo. Ekloĝu en la ĉearbara banejo, do vi almenaŭ la arbaron prigardos.

Nenio estas farenda por la junulo, li devis vole-malvole konsenti. Li ekloĝis en la ĉearbara banejo kaj ankaŭ la fratan arbaron ekprigardis.

Iutage, vagante inter arboj, li kaptis leporon. Ligis li ĝin al la ŝnureto kaj kondukas ĝin tra la vilaĝo. Subite li renkontas la plej aĝan fraton.

– Kian beston vi kondukas? – li estas demandata.

– Ho, ĉi-tiu estas tute nekutima besto. Ĝi estas nomata legomĝardenisto. Se vi lasos lin en la legomĝardeno, brasikoj tiel kreskegos, ke eĉ la trunkoj ne sukcesos ilin apogteni.

– Nekredeble! – miris la plejaĝulo kaj iliaj okuloj ekbrilis avide. – Mi eĉ ne konis, ke tiaj bestoj en la arbaro loĝas. Por kio vi tenas ĝin? Vi ja ne posedas legomĝardenon kaj mia brasika kampo estas senprizorga. Donu ĝin al mi.

– Ne! – respondĵetis la plejjunulo. – Senpage mi ne donos, sed se vi deziras, vi povas aĉeti.

Longe ili intertraktis kaj finfine ambaŭflanke konsentis je dudek ormoneroj. La plejaĝulo prenis la leporon kaj kondukinte ĝin en la

brasikan ĝardenon lasis ĝin por mastrumadi tie.

Kaj leporo ĉiam estas leporo. Ĉirkaŭrodis li ĉiujn brasikojn kaj saltinte trans la barilon malaperis en la arbaro. Venis la pliaĝulo en la ĝardenon kaj tie nur solaj trunkoj staraĉas. Tre ekkoleris li kaj ekrapidegis al la plijunulo, intencante bati lin fortege.

Dume la plijunulo kaptis vulpon kaj alliginte ĝin al ŝnureto kondukas el la arbaro.

Alkuris la pli aĝa frato kaj krias:

– Kian ĝardeniston vi vendis al mi? Ĉiujn miajn brasikojn li rodmanĝis. Kia damaĝo!

– Kaj ĉu vi nutris lin antaŭ ol malfermi en la ĝardenon?— demandas la malplejaĝulo.

– Nu, ne! – agnoskis la pliaĝulo.

– Do, vi vidas nun. Kaj vi senkaŭze akuzas min. Se vi ne kapablis dece konduti kun tiu besteto, eble vi sukcesos kun ĉi-tiu – kaj montris perfingre la vulpon.

– Kaj kio estas tio? – reinteresiĝis la plejaĝulo.

Tio estas la plej bona kuracisto de kokinoj kaj anserinoj. Se vi lasas lin eĉ por unu nokto kune kun birdoj, ili tuj resaniĝas kaj la kokinoj abunde ekovumadas.

– Ĉu vere? – priruĝiĝis je avideco la pliaĝulo. Donu lin al mi. Miaj kokinoj malbone ovumas, kaj la anseroj estas vere malsanemaj.

– Mi ne povas doni. Eble mi povas nur vendi.

Ili ree longe intertraktadis kaj finfine konsentis pri la kosto de dudek ormoneroj. Ricevinte la monerojn la junulo verŝis ilin en la poŝon kaj fajfante iris en la arbaron.

La plejaĝulo lasis la vulpon en la birdejo kaj matene trovis nur la plumojn anstataŭ la kokinojn. Ekkoleriĝis pri la frato ka forkuris por venĝi lin. Kaj tiu jam aperas el la arbaro kondukanta lupon.

La pliaĝulo ekskoldis lin dirante:

– Vi ree trompis min, stultulo. Mi nutrigis vian birdodoktoron per brasikoj, tamen li buĉis ĉiujn miajn kokinetojn kaj anasetojn, postrestante nur iliajn plumojn. Nu, mi nun prilaboros vian haŭton.

– Kaj ĉu vi donis al li ion trinki? – demandas la plijunulo.

– Ne – respondiĝis la pliaĝulo. – Kiel mi povis scii, ke mi devas trinkigi lin?

– Nu, vidu! Estas via kulpo. Anstataŭ ol kulpigi min aĉetu tiun-ĉi beston kaj pro ĝi vi vere profitos.

– Kaj kia estas ĉi-tiu besto?

– Li estas tre valora besto kaj estas nomata ŝafdoktoro. Almenaŭ li rigardas al ŝafo, tiu subite resaniĝas. Li ankaŭ bonege doktorumas pri bovidj kaj ĉevalidoj...

– Nekredeble! – ĝojfrotas siajn manojn la pliaĝulo. – Mi ege bezonas tian doktoron.

– Do, prenu lin malmultekoste.

Longe ili pritraktadis, sed fine konsentis pri dudek ormoneroj. Kondukinte lin hejmen, tuj ŝovis lin en la stalon malpacience ĝisatendante la matenon.

Kaj la junulo prenis ĉiujn sesdek ormonerojn kaj urĝe foriris en la urbon, kie li estis certa, ke la frato ne sukcesos lin trovi.

"Kiun vi nun nomos stultulo? – murmurisli subnaze. – Vi devis ja plenumi la patran volon.

Matene la pliaĝa frato trovis siajn ŝafetojn kaj bovidetojn forbuĉitajn kaj nenia signo estis postrestinta pri la doktoro. Li estis eskapinta tra la fundamenta truo.

Netrasuferante la koleron li kuris al la banejo por serĉi la plijunulon, tamen eĉ liaj piedsignoj jam estis malaperintaj.

Diablo dunglaboras

la kruela sinjoro tre molestadis siajn servutulojn. Kiam ili prilaboradis siajn parceletojn, la sinjoro senprokraste aperadis, la tutan parcelon forprenadis kaj ordonadis al ili iri al la arbaro elradikigi arbostumpojn, prilabori la agron kaj semi la grenon. Tiamaniere li ĝismorte turmentadis siajn servutulojn, malebligante ilin dece vivi.

Foje li pelis iun homon for de lia parceleto kaj ĉion forpreninte, montris al li arbaran hakterenon dirante:

– Elradikigu la arbostumpojn, prilaboru la agron, vi reproduktiĝos kaj eĉ dankos min por tio.

Nenio farenda estas por la homo. Li prenis hakilon, metis peceton da pano en korbeton kaj iris por labori. Li metis saketon sur la stumpon kaj ekeligadis la stumpojn tiel energie, ke la tuta ĉirkaŭaĵo pleniĝis per polvo. Dume iris preter li diablo. Li ekvidis la saketon kun pano kaj kaptinte ĝin brukuregis al la infero. Kaŭriĝinte en la angulo li aŭskultas, kiel la servutulo ekblasfemos lin. Sed la servutulo, ekvidinte, ke iu ŝtelis lian panon, nur peze ekspiris kaj plulaboras. Surpriziĝis la diablo kaj diras al la Lucifero:

– Via moŝto, hodiaŭ mi ŝtelis panon de servutulo, dezirante por ke li malbenu kaj blasfemu. Sed li nenion diris, nur pliprofundiĝis en la laboron.

– Vi malbone faris, – ekkoleris Lucifero. – Vi ne povas homon molesti. Iru kaj laboru pro la ŝtelita pano.

Transformiĝis la diablo en homon kaj veninte al la servutulo diris:

– Hej, homĉjo! Vi tre malfacile laboras, eble vi volas dungi min?

– Kiel mi povas dungi vin, ke mi nenion posedas. Eĉ hodiaŭ mi laboras malsata, ĉar iu ŝtelis mian panon, – respondis la homo.

– Ne gravas, – asertas la diablo. – Mi bezonas nenian pagon. Mi konsentas ekzisti laŭ via vivmaniero. Nur dungi min. Vi ne bedaŭros.

La homo konsentis kaj la diablo ekdungiĝis.

Atentiginte la diablon pri la farotaj laboroj, la servutulo iris hejmen por manĝi kaj poste liveri la matenmanĝon al la nova dungitulo. Kiam la diablo ekestis sola, li elradikigis ĉiujn arbostumpojn el la tuta haktereno, per siaj kornoj plugis la agron kaj per la ungegoj erpis ĝin. Reveninte la homo ekvidis, ke la agro estis tiel prilaborita, ke estis agrable spekti ĝin kaj ĉiuj stumpoj kaj radikoj estis metitaj en amasojn.

La dungitulo diras al li:

– Rigardu! Mi jam prilaboris la agron. Vi povas semi tritikojn kaj la rikolto estos bonega.

La homo spektis la novan agron kaj ĝuegis la novan laboriston.

Tuj tritikoj estis semitaj kaj la rikolto estis tiel bona, ke ili eĉ el la agro verŝiĝis.

Kaj la sinjoro ekvidinte bonan rikolton, eksentis envion en sia koro kaj diris al la servutulo:

– Kunveturigu ĉiujn tritikojn en mian garbejon kaj vi povos preni el ĝi tiom da greno, kiom vi povas levi.

Li konis, ke unu homo ne sukcesos multe da greno levi: eble nur kvin aŭ dek garbojn, sed ne plu.

Nenio estas farenda por la servutulo – ne estas ebla parole venki la sinjoron. Kune kun la dungitulo ili veturigis la tritikojn en la sinjoran garbejon.

– Nun vi povas porti, kiom vi povas levi, – diras la sinjoro. – Vi vidas, kia bona mi estas. Mi neniun molestas.

– Estos pli taŭge, se mia dungitulo portos. Ja li estas pli juna kaj forta.

– Bone, – konsentas la sinjoro.

La dungitulo saltis en la garbejon kaj ektordis ŝnuron el la grenplantoj. Li uzis duonon de la grenplantoj kaj la ŝnuro ekiĝis longa kaj dika. Tiam li ĉirkaŭligis la tutan garbejon kaj surŝultriĝinte ĝin, ekiris al la korto de la servutulo. Ŝajnis, ke grandega monto memstare rampas tra la kampo.

– Ho, ankoraŭ restas iom da loko sub la ŝnuro! – ekkriis la dungitulo, prenis la sinjoron je lia kolumo kaj enŝovis lin en la grenamasegon. Ĝis kiam li portis la grenon al la celo, la sinjoro estis sufokiĝinta.

Alportinte la grenon, la dungitulo klakis per siaj polmoj kaj ĉiuj tritikoj draŝiĝis. Ekiĝis tia granda amaso da greno, ke eĉ la sinjoro ne havadis tiom post la aŭtuna draŝado.

– Nun mi estas rekompenciinta por la pano, kiun mi ŝtelis de vi, – diris la dungitulo kaj ekiris laŭ sia vojo. Kaj la servutulo vendis la tritikojn, profitis ege da ormoneroj, la tutan jaron ĉiutage manĝis blankan panon kaj ne ĉesis laŭdi sian dungitulon.

La filoj de la vilaĝano

Iam vivis vilaĝano. Li havis tri filojn, belajn kaj kuraĝajn fraŭlojn, sed pro sia persona fiero la du fratoj traktis la plej junan kiel stultulo.

Kiam la filoj transdudekjariĝis, ekdeziris ili vojaĝi por ekkoni kiel homoj vivas. La pliaĝuloj diras:

– Iru ni duope, pro kio ĉi-tiu stultulo devas ĝeni al ni. Li nur klopodojn kaŭzos.

Sed la patro ne konsentas. Iru ankaŭ la plej juna por sperti homan vivon.

Do, ekveturis ĉiuj tri, sabrojn alflankiĝinte, sakojn surdorsiĝinte.

Vojaĝis ili tra vilaĝoj ĝis kiam atingis ili grandan arbaron. Enpaŝis ili ĝin per vasta vojo, sed ju daŭre ili iris, des pli la vojeto malvastiĝis, kaj finfine ĝi malaperis entute. Post nelonga plua irado ili tute malorientiĝis kaj ne sciis, kien iri. Tiam ili ekbruligis fajron kaj pretiĝis por dormi. La plej aĝa frato prenis sian sabron kaj restis por gardi:

– La unuan nokton mi gardos vin de malamikoj kaj arbaraj bestoj. Dormu pacience.

Ambaŭ fratoj ekdormis. La plejaĝulo zorgis pri la fajro kaj la dormo de siaj fratoj. Kiam meznoktiĝis, subite eksusuris arbustoj kaj antaŭ li aperis urso.

– Junulo, – li diras– eble vi regalos min per vespermanĝo?

Sed la plejaĝulo eksvingis la sabron kaj forhakis la ursan piedon. Ekgrumblis la urso pro doloro kaj kolero. Ĵetis sin en la arbuston kaj malaperis el la frataj okuloj.

Matene li fanfaronis al siaj fratoj, ke li estas savinta ilin el la ungegoj de la furioziĝinta urso. Liadire ĝi ĵetis sin al la ambaŭ dormintoj kaj nur li sola sukcesis konkeri la urson. Por pruvi la verecon de siaj vortoj li montris la ursan piedon.

Sekvontnokte gardostaras la mezaĝa filo. Meznokte antaŭ li ankaŭ aperas urso petanta vespermanĝon, sed ankaŭ la mezaĝulo forhakas lian piedon. La besto hurlanta pro doloro malaperas.

Trianokte ekgardas la plejjunulo. Promenadas li, metadas vergojn en la fajron kaj gapas al la steloj, lumantaj tra la arbofolioj. meznokte tra la arbustoj penetriĝas grandega urso.

– Aŭskultu, junulo, – ĝi diras, – eble vi regalos min per vespermanĝo? Mi vere malsategas.

– Kial ne, urseto? – respondis la junulo. – Bonvenon al ĉio, kio restis post nia vespermanĝo.

Kaj li regalis la urson per la postrestaĵoj de la vespermanĝo.

La urso ekmanĝis, satiĝis kaj ekparolis:

– Mi vidas, ke vi malsimilas al viaj fratoj. Mi volas rekompenci por via bona koro, kaj helpemo al ĉiu estaĵo. Iru nun tiadirekte kaj vi trovos la domaĉon de arbaraj rabistoj. Tie vi ilin ne timu kaj iru ĉien, kien ili vin invitos. Kaj en ĉiu loko, kiun vi trafos, konduku laŭ la voko de via bona koro. Mi konas, ke vi sukcesos distingi inter la bono kaj malbono. Kiam vi estos ĉion plenuminta kaj ekkonos kio estas plu farenda, voku min per mia nomo kaj mi tuj aperos.

Post tiaj vortoj, ĝi turnis sin al la arbustaro kaj malaperis el la junulaj okuloj. Iomete pensinte li iris al la direkto indikita al li de la urso.

Post ioma tempo li ekvidis malgrandan lumeton brilantan tra la arbofolioj, kaj baldaŭ li atingis la dometon kie loĝis murdistoj. Ekvidinte la plej junan fraton, ili kaptis siajn glavojn kaj ĉirkaŭis lin.

– Kiel vi sukcesis trovi nin? – demandis ili.– Nun vi devos ekrabi kune kun ni, aliel ni tuj forkapigos vin.

– Kial ne?– respondis la junulo. – Vi povas konduki min kune kaj mi faros ĉion, kion vi volas.

La rabistoj esploris la junulon kaj diris:

– Vi estas maldika kaj svelta, do vi sukcesos tra eta truo ŝovi sin en la sinjoran kastelon, kaj ni tion ne kapablas. Ni iru kune kaj vi devos helpi al ni murdi la sinjoron kaj forpreni lian oron ankaŭ filinon. Se vi rifuzos, viva vi ne postrestos. La junulo garantiis, ke li obeos ĉiujn iliajn ordonojn kaj ili ĉiuj ekiris al la sinjora kastelo. Atinginte ĝin, la murdistestro ordonis la junulon enŝovi sin tra eta truo, inspekti ĉion bonege kaj poste malferminte fenestron ekkrii, ke la vojo kastelen estas senobstakla ankaŭ por ili.

– Nur atentu, – diris la estro, – kiam vi estos jam interne, ĉe la pordo vi trafos sidantan grandegan gufon. Senprokraste dekapigu ĝin, ĉar kontraŭe ĝi ekkrios per terura voĉo kaj vekos la gardistojn. Ni provis kelkfoje, sed ĉiam ĝi kaŭzadis bruegon, pro kiu ni malsukcesadis pirabi la kastelon.

La junulo tra groto rampis en la korton kaj ĉe la pordo ekvidis sidantan grandan gufon, kiu ĉirkaŭturnadis siajn grandegajn okulojn, vikle esplorante la ĉirkaŭaĵon. Tamen la kompatema junulo ne povis ĝin murdi, kaptis la gufon kaj kaŝis ĝin sub sia jako. Pluirante, li multloke trovis gardistojn, sed ĉiuj estis en profunda dormo, ĉar pro la gufa pereco neniu povis ilin veki.

Finfine li atingis la sinjoran dormoĉambron, kie en lito ĉe brulanta kandelo dormis la kastelposedanto. Ĉie brilis oro kaj diamantoj. Ankaŭ ĉi-tie la gardistaro tiel intense dormis, ke neniu vekiĝis pro liaj paŝoj. Esploriginte la ĉambron, la junulo pensis, ke li ne povas permesi la rabistoj forrabi la sinjoran oron kaj murdi lin.

Tiam li daŭris iradon. Li atingis la dormoĉambron de la sinjora filino kaj ekvidis dormantan knabinon. Ekvidinte ŝin, li vere

konsterniĝis pro ŝia beleco. Li iris al ŝi, kisis ŝiajn lipojn, forprenis diamantringon de ŝia fingro kaj enpoŝigis ĝin. Nun li jam firme konis, kio estas farenda. Li tuj venis al la fenestro, invitante la rabistojn. Dum iliunu post la alia ŝovis sin internen, la junulo ĉiujn dekapigis. Poste li forprenis po unu sprono de ĉiu, elsaltis tra la fenestro, samtempe forlasante la gufon el sub la jako.

– Mi rekompencos pro via kompato, – diris la birdo kaj residiĝis en sian kutiman lokon.

La junulo deziris ir al siaj fratoj, tamen ne povis trovi la vojon tra la arbaro. Tuj aperis la urso kaj portis lin al la noktejo, tamen la fratoj jam ne troviĝis tie. Ne atendante la plejjunulon, ili estis veturintaj for.

Ekveturis la plejjunulo tra la mondo, tamen neniel li povis forgesi la belulinon, sinjoran filinon. Do, li decidis reviziti la palacon kaj ekvidi kiel ŝi vivas. Sed ne scias li kiadirekte iri, kie la knabinon serĉi. Atendinte la nokton, li turnis sin al la luno kaj vokis la gufon.

Ekbruis la arbaro, kaj la gufo jam estas ĉe li.

– Kion vi bezonas, bofaranto? – demandis li.

– Mi deziras reviziti la sinjoran kastelon, kaj ekvidi, kion faras lia filino-belulino.

– Nu, se tia estas via deziro, bonvolu urĝi. La sinjoro intencas fari sian filinon edzino de la palacestro, kiu fieras pri murdado de la rabistoj. Pro tio, ke neniu vidis, ĉiu kredas tion. Nur unusola sinjoridino tion ne kredas, asertante, ke rabistoj estis murditaj per afabla junulo, kiun ŝi vidis en sia sonĝo. Sed la sinjoro malatentas ŝiajn vortojn, kaj intencas jam morgaŭ aranĝi la nuptofeston.

– Montru la vojon! – ekkriis la junulo.

– Bone, – konsentis la birdo, – mi povas montri la vojon, sed estas cent verstoj de ĉi-tie ĝis la sinjora kastelo kaj ĝis kiam ni atingos ĝin, multaj tagoj forkuros. Kaj la nupto estas jam morgaŭ.

Tiam la junulo memoris sian amikon urson kaj vokis ĝin por helpi lin. Kvazaŭ per unu salto ĝi ekstaris antaŭ li.

– Ursĉjo, portu min al la sinjora kastelo. Kaj urĝu por morgaŭ atingi ĝin.

La urso sidigis lin sur sian nukon kaj ekvojaĝis. Ĝi kuris tiel, ke eĉ vento siblis kaj la gufo direktis ĝin flugante antaŭe.

Kiam la kastelo estis atingita, la amuzado jam estis ardega. Ĉetable sidis la fianĉo, proklaminte sin estro de la kastelo kaj savinto de la sinjoro kaj lia filino. Ekvidinte la junulon, la knabino stariĝis kaj kriante ” Jen estas mia vera savinto”, kuregis al la junulo. Ĉiuj estis ege surpriziĝintaj ekvidinte novan savinton, kiam unu savinto jam sidis ĉe la fianĉino.

– Jes, vere mi savis la sinjoron kajlian filinon de murdistoj, – diris la plej juna frato.

– Li mensogas! – ekkriis la falsa fianĉo. – Ĵetu lin for el la palaco.

Tamen la sinjoro gestis permane por ke ĉiuj silentu kaj ekdemandadis:

– Diru, junulo, kiel vi povas pruvi la verecon de siaj vortoj.

– Tre simple, – respondis la junulo. – Vi nur respondu, kial la rabistoj posedis nur po unu spronon.

Ĉiuj silentiĝis, nekonante la respondon. Tiam la junulo elpoŝigis la mankantajn spronojn kaj montris ilin. La sinjoro kaj aliaj gastoj ekvidis, ke ili estis la rabistaj spronoj. Tiam la junulo prenis la oran ringon kun diamanto kaj metis ĝin sur la princina fingro kaj ĝi tute konvenis.

– Kaj kies estas ĉi-tiu ringo? – demandis la junulo.

– Ĉi ringo estas mia, – respondis la reĝidino, kiun vi defingrigis tiunokte, kiam vi defendis la kastelon kontraŭ rabistoj. Mi vidis vin

ne en mia sonĝo, sed reale, kaj vi kisis min.

– Jes, – konfirmis li.

La sinjoro senprokraste forpelis la falsulon el la kastelo kaj admonis lin plu ne aperi, kaj la plej juna frato edziĝis al la plej bela filino de la sinjoro. Kiam ili vizitis la gepatrojn de la junulo, ili trovis revenintajn ambaŭ pli aĝajn fratojn. Ili estis mensogintaj, ke la plejjunulo pro sia stulteco estis mortigita de urso aŭ iaj aliaj sovaĝbestoj.

La gepatroj, aŭdinte pri la feliĉo de la plej juna filo, ege ĝojis, kaj liaj fratoj jam hontiĝis nomi lin stultulo, estis pli taŭge por la plejjunulo tiel nomi siajn fratojn, tamen tia penso ne trafis lian kapon.

Tri fratoj

Patro havis tri filojn. Kiam lia maljuneco alproksimiĝis, li decidis disdoni sian bienon al la filoj, tamen li ne povis pripensi, kiel ĉio estus juste disdonota. Unue li opiniis heredigi ĉion al la plejaĝulo, tamen tiuokaze la aliaj du estus molestitaj. Longe li pensis kaj finfine diris:

– Filĉoj miaj, mi ne elpensas kiel la bieno devas esti distribuota. Do, mi finpensis tiamaniere: Iru en la vastan mondon, laboru por unu jaro, kaj perlaboru po unu fingroringon. Kies ringo estos la plej bela, tiu posedos la bienon.

Nenio estas farenda, se la patro ordonas, ili devas iri. Kaj foriris ĉiuj por serĉi laboron. Irante tra la arbaro, la plej juna frato ekvidis malgrandan vojeton, meandrantan tra arbara densaĵo kaj li ekiris laŭ tiu-ĉi vojeto. Irante unu mejlon, li ekvidis blankan kolombon, sidantan sur arbobranĉo. Kiam la junulo alproksimiĝis al li, la kolombo demandas lin:

– Kien vi iras, junulo?

– Mi iras por serĉi laboron, sed nur tian, por kiu mi ricevos fingroringon, la plej belan ringon en la tuta mondo, – respondis la junulo.

– Bone, – kapsvingis la kolombo, – iru kun mi. Mi kondukos vin al la loko, kie vi ricevos tian ringon.

La kolombo ekflugis kaj la junulo sekvis ĝin. Tuj li ekestis ĉe malhela kaverno, enirinte kiun, li ekvidis palacon sen ia viva estaĵo. Pluirante en unu ĉambro ĉe la fenestro li trovis kaĝon kun fermita kolubro. La kolubro demandas lin:

– Kiel vi aperis ĉi-tie kaj kion vi serĉas?

– Irante tra la arbaro, mi ekvidis surbranĉe sidantan kolombon, kiu demandis min, kien mi iris. Kiam mi diris, ke mi serĉas laboron, ĝi gvidis min ĉi-tien. Jen kiel ĉio okazis.

Tiam la kolubro respondis:

– Se vi travivos ĉi-tie unu jaron, vi ricevos, kion vi deziras. Kaj la laboro estos jena: unu fojon tage vi ekbruligos la fornon, unu fojon balaos la ĉambregon kaj unu fojon vi lavos min per varma akvo. Kiam vi malsatiĝos, vi iros en tiun ĉambron kaj surtable vi trovos ĉion laŭ sia volo.

Do, la junulo faras ĉion laŭ la kolubraj ordonoj: ekbruligas la fornon, balaas la ĉambregon kaj lavas la kolubron per varma akvo. Post unu jaro li petas la kolubron la laborpagon, la plej belan ringon en la tuta mondo. Tiam la kolubro donis al li ŝlosilojn kaj ordonis malŝlosi unu kofron, plenan da plej mirindaj ringoj. La junulo prenis la plej elegantan ringon, kaj ferminte la kofron, redonis la ŝlosilojn al la kolubro. Tiam la kolubro petis, ke venontjare li ankaŭ revenu kaj servu al ĝi.

– Se mi sukcesos eskapi el mia hejmo, mi certe revenos,—li promesis.

Do, li iris hejmen, portante la ringon. Irante tra la arbaro li ekvidis ĉirkaŭbrulintan fornoringon. Li prenis ĝin, kaj turnante ĝin ĉirkaŭ sia brako pluvojaĝas. Post ia distanco li renkontis revenantajn hejmen fratojn. Ili demandas:

– Hej, frato, kie estas via ringo?

– Jen, ĉu vi ne vidas? Sur mia brako.

Ambaŭ fratoj ekridegis eĉ siajn ventrojn ĉirkaŭbrakuminte.

– Ba, nura stultula parolaĉo.

Veninte hejmen ambaŭ pli aĝaj fratoj surtabligis belajn ringojn, tamen kiam la plejjunulo elpoŝigis la ringon, ricevitan de la lubriko, la tuta ĉambro eklumegis. La patro eĉ parolpovon perdis pro mirego.

– Filĉjo mia plej juna, via ringo estas plej bela, do al vi mi heredigas mian bienon.

Pro kolero malsereniĝis la vizĝoj de ambaŭ fratoj kaj ili ekprotestis:

– Ne, ni ne konsentas. Ja ni duoble laboris kaj ni pli rajtas ol ĉi tiu stultulo. Li sukcesis unufoje sed sekvontfoje li certe malsukcesos. Patro, donu ankoraŭ unu taskon.

Vidas la patro ke ambaŭ pliaĝaj filoj ne pravas, tamen ne dezirante la infanojn interkolerigi, li konsentis.

– Bone, reiru en la vastan mondon kaj post unu jaro portu al mi kaptukon. Kies kaptuko estos la plej bela, al tiu mi heredos la bienon.

Denove eliris ĉiuj fratoj feliĉon serĉi. La plejjunulo senprokraste iris al la lubriko.

– Ĉu estos eble por mi ricevi la plej belan kaptukon por la jara servo? – demandas li lubrikon.

– Certe, – diras ĝi. Laboron vi konas, sed ĉion vi devos fari dufoje dum la tago: dufoje ekbruligi la fornon, dufoje balai la ĉambregon kaj dufoje lavi min. Manĝaĵon vi trovos en la sama ĉambro, same kiel pasintjare.

Tion la junulo faras. Kiam la jaro finiĝis, la kolubro donis al li ŝlosilon kaj diris:

– Malŝlosu la jenan kofron kaj prenu la plej ŝatatan kaptukon. Nur atentu viajn fratojn! Kiam vi renkontos ilin, nenion diru pri via kaptuko, ĉar ili forprenos la kaptukon kaj murdos vin. Tenu

la kaptukon inter viaj fingroj kaj ĝi estos nevidebla. Se vi povos, revenu al mi por la tria jaro. Kaj nun – bonvojaĝon.

Eliris la plejjunulo kaj baldaŭ renkontis siajn fratojn ankaŭ hejmen hastantajn. Liaj fratoj tuj demandas:

– Kie estas via kaptuko? Montru!

– Jen! – diris la plejjunulo kaj montris naztukon.

– Ni konas, kia vi estas. Denove vi trompos nin, kiel pasintjare.

Tuj ili traserĉis liajn poŝojn, tamen nenion trovis.

Kiam ili venis hejmen kaj kiam la plejjunulo sternis la kolubran kaptukon, ĉiuj preskaŭ perdis la vidkapablon pro la brilego. La patro havas nenian alian eblecon ol heredigi la bienon al la plejjunulo.

Ambaŭ pliaĝuloj denove ekkverelis kun la patro. Oni ne estas vidinta, ke bieno estu heredigita al stultulo. Li hazarde sukcesis akiri la plej belan kaptukon, kaj li posedas neniajn aliajn kapablojn.

– Bone, – finfine diras la patro, – vi provu ankoraŭfoje, sed tio estos la lasta provo. Iru en la vastan mondon por servi kaj revenu post unu jaro kun la plej bela knabino. Kies estos la plej brava, al tiu mi heredos la bienon.

Ree eliris la fratoj laboron kaj edzinojn por serĉi. Iras ambaŭ pliaĝuloj, ridegante senkontrole: ĉu estas ebla por stultulo trovi belan fraŭlinon! Ĉi-foje ili estos venkintoj kaj la bieno apartenos al ili.

Kaj la plejjunulo iris malgaja al la kolubro kaj diris:

– Mi ne konas, ĉu ĉi-foje vi sukcesos helpi min. Patro ordonis konduki hejmen la plej belan fraŭlinon. Kaj kie mi povos akiri ŝin?

– Ne ĉagreniĝu, – diras la kolubro. – Mi tre ĝojas pro via reveno. Kaj nun aŭskultu, kion vi devos fari. Ĉi-jaro estos por vi pli malfacila ol la pasinta, ĉar ĉion vi devos fari trifoje: trifoje ekbruligi la fornon,

trifoje balai la ĉambregon, kaj trifoje lavi min per varma akvo. La lastan tagon tre bone bruligu la fornon, kaj post kiam vi lavos min ĵetu min en la fornon. Kiam vi estos min ĵetinta, kuregu for, ĉar mi ekkriegos petante por helpo, tamen vi ne aŭdacu eĉ malantaŭen rigardi. Se vi ĉion-ĉi plenumos, vi kaj ankaŭ mi ekestos feliĉaj, kaj se ne – ambaŭ ni pereos por ĉiam.

Faras la plejjunulo ĉion, kion la kolubro ordonis kaj pensas pri la lasta tago. Atendinte ĝin, li bone hejtis la fornon, lavis la kolubron kaj ĵetis ĝin en la forntruon, disradian tan teruran varmegon. Ekaŭdiĝis kriego kaj veado, ektremis la muroj de la domo kaj muraj ŝtonoj ekfalis sur lian kapon. La plejjunulo pensis, ke lia lasta tago alvenis, do falinte en la angulon de la palaco li senkonsciiĝis. Jen li eksentis, ke li estas revivigata kaj li ekvidis belegan knabinon, starantan apud li. Anstataŭ la sombra palaco de la kolubro li ekvidis superban kastelon plenan da mirindaj sinjoroj, servantoj kaj soldatoj.

– Ni dankas vin, nia savinto. Nur vi eblis formeti la malican sorĉon, per kiu potenca sorĉistino transformis min en kolubron kaj mian kastelon en sombran palacon. Nun ni ambaŭ feliĉe vivos ĉi-tie.

– Jes, – konsentas la junulo, – tamen pli antaŭe ni veturos al mia patro, kiu atendas min.

Veturas ili al la patro de la junulo per kaleŝo jungita per ok ĉevaloj, kaj eĉ fajreroj flugas el sub ĝiaj piedoj. Ambaŭ, kvazaŭ reĝoj ili sidas en la kaleŝo, akompanataj de servantoj kaj soldatoj. Venis ili hejmen, kaj la patro kaj liaj fratoj kliniĝis antaŭ ili, tute ne rekonante ilin.

– Ĉu vi konas min? – demandas li.

– Ne, mi ne konas, via moŝto, – flustras timiĝinta patro kaj liaj du pliaĝaj fratoj. – Ni vidas vin por la unua fojo.

– Do mi estas via plej juna filo kaj via frato, – diras li, turninte al ili. – Mi ne bezonas la bienon, havu ĝin. Nur la patro veturu kun mi en mian kastelon, kie mi zorgos pri li ĝismorte.

La patro ĝoje akceptis la filan proponon kaj elveturis per reĝa kaleŝo. Li neniel finis miri pri la edzino de la plejjunulo, kaj ĉiuj admiris lian feliĉon.

La pliaĝaj fratoj ekestis bienposedantoj kaj ili ĵaluze rememoradis la bonkoran plejjunulon.

Kiu estas pli ruza?

Iam iris homo tra arbaro kaj ekvidis sub la arbostumpo tordiĝantan kolubron. Spektinte la homon, la kolubro krias:

– Homo, helpu min. Mi rekompencos.

La homo obeis la kolubron. Li levis la arbostumpon kaj liberigis la kolubron.

– Pro via helpo mi rekompencos jene: mi pikos vin kaj vi sammomente mortos.

– Kion vi diras? – ektimis la homo. – Ĉu estas bono per malbono rekompencata?

– Kompreneble, – asertas la kolubro. – Ni povas iri kaj sciigi ĉe aliaj personoj kaj ĉiuj diros la samon.

– Nu, iru ni, – konsentis la homo. – Rekompenci per malbono pro farita bono povas nur stultulo, kaj saĝulo neniam tiel faros.

Iras ili kune kaj renkontas maljunan ĉevalon. La homo diras al li:

– Aŭskultu, vi estas maljuna kaj multon spertinta, do prijuĝu nian aferon. Mi trovis subpremitan kolubron kaj mi liberigis ĝin. Anstataŭ danko li volas piki min por ke mi mortu. Ĉu oni eblas rekompenci per malbono pro ricevita bono.

– Ĉiam bono estas rekompencata per malbono, – respondis la ĉevalo. – Kiam mi estis juna, mi tiradis lignan plugilon, haŭladis erpilon, portadis selon kaj trenis veturilon. Tiam mia mastro traktis min bone kaj nun, kiam mi plu ne kapablas labori, la mastro forpelis min el la hejmo.

La homo ekaŭdinte la ĉevalan parolon, ege malgajiĝis. Jen li vidas alkurantan vulpon. La homo senprokraste ekkriis:

– Vulpeto, savu min el malfeliĉo.

– Kaj kia estas via malfeliĉo?– demandas la vulpo.

La homo tuj ĉion rakontis.

– Bone, – ekridis la vulpo. – Se vi promesas al mi sakon plenan da kokoj, mi savos vin.

– Mi promesas, promesas!

La vulpo aliris al la kolubro kaj diris:

– Iru ni, kaj vi montru la lokon, kie vi estis subpremita. Mi devas ekvidi, antaŭ ol prijuĝi la aferon.

La kolubro tuj revenis al la sama loko, kie li estis antaŭe subpremita.

– Nu, mi nenion vidas. Ekkuŝu, por ke mi ekvidu, kiel ĉio okazis.

La kolubro ekkuŝis, kaj la homo, perceptinte, kio estas farenda, tuj ŝovis la stumpon sur li, kaj kune kun la vulpo foriris, postrestinte la jelpantan kolubron.

– Kaj nun iru kaj alportu al mi sakon plenan da kokoj, – diris la vulpo al la homo.

Tiu venis hejmen, plenigis sakon per hundoj kaj veturigas ilin. Alveturiginte, li diras al la vulpo:

– Vi petis min, ke mi portu la sakon, sed mi transportis ĝin al vi per veturigilo.

La vulpo pro ĝojo ekbatis la grundon pervoste kaj la homo dume elsakigis la hundojn. La vulpo ekkuris kaj la hundoj ekpersekutis ĝin.

Konjektis la vulpo, ke ĝi ne eskapos de la hundoj kaj saltis en kavon. La hundoj kuradas ĉirkaŭ la kavo, sed povas nenion fari.

Kaj la vulpo sidas en la kavo, ĉiujn partojn de sia korpo kisadas kaj laŭdas ilin.

– Gambetoj, miaj gambetoj, kiel rapidege vi kuris. Oreletoj, orletoj miaj, bonege vi ĉion aŭdis. Okuletoj, vi ĉion sukcesis ekvidi. Nur vi, vosto, ĉion komplikigis kaj ĝenis la kuradon, dezirante fordoni min al la hundoj. Pro tio mi donos vin al la hundoj por ke ili disŝiru vin.

Kaj ĝi elnŝovis la voston por la hundoj. Kune kun la vosto ili elkavigis la vulpon kaj disŝiris ĝin.

La kato kaj la kokino

Iam geedziĝis kato kaj kokino kaj konstruite por si dometon ekvivis kune. Elirante por ĉasi, la kato diras al la kokino:

– Lasu neniun en la dometon. Se vi enlasos, vi certe pereos.

Post ioma tempo alvenis vulpino kaj petas:

– Onklineto, onklineto, lasu min interen.

La kokino tuj malfermis la pordon kaj enlasis la vulpinon. Kaj ŝi senprokraste kaptis la kokinon kaj ekkuris. La kokino ektimiĝis kaj ekkriis:

– Kato, kato! Mi estas portata tra altaj montoj, tra verdaj arbaroj. Kie estas vi? Savu min!

La kato estis proksime, do li tuj rapidis por helpi. Li forprenis la kokinon de la vulpino kaj ili venis hejmen. Aliafoje forirante en la arbaron por ĉasi, li ree diras:

– Nu, gardu sin! Ĉi-foje vere nenion enlasu en la dometon.

La kokino promesis, ke ŝi nenion enlasos.

Tamen apenaŭ la kato iris iomete foren, tuj aperis la vulpino kaj petas:

– Onklineto, lasu min en la dometon. Mi absolute ne ĝenos vin, nur iomete gastumos. Onklineto!

Aŭskultis, aŭskultis la kokino la dolĉajn vortojn de la vulpino kaj ree malfermis la pordon. La vulpino – kapt la kokinon kaj ekkuregis al la arbaro. La kokino ekklukis el ĉiuj siaj fortoj, vokante la katon por

savi ŝin. Bonokaze li troviĝis proksime kaj alkurinte eltiris ŝin el la vulpinaj ungegoj. Kondukante ŝin hejmen, li riproĉas:

– Kial vi ne obeis min? Se vi ankoraŭfoje enlasos la vulpinon, mi plu ne savos vin.

Post kelkaj tagoj li refoje iras por ĉasi, deviginte la kokinon ne malfermi la pordon.

Post ioma tempo la vulpino ree ĉeestas.

– Onklineto, – petas ĝi per maldika voĉeto. – Lasu min interen. Mi nur bonŝercis. Ĉifoje mi certe ne ĝenos vin. Mi sankte ĵuras.

Oni bone perceptas kia estas la kokina prudento: ŝi iris al la pordo, malfermis ĝin kaj enlasis la vulpinon. Nenion plu ŝi atendis, kaptis la kokinon kaj portas ŝin malatentante ŝiajn kriojn kaj klukadon pri la kata helpo.

– Kato, kato! Mi estas portata tra altaj montoj, tra verdaj arbaroj. Savu min!

Tamen la kato ne klopodis sin pri savado, nur observis, kien la vulpino forportos ŝin. Vidas li, ke ŝi estas enportita en kavernon. Tiam li venis hejmen, kunportis violonon kaj sabron, revenis al la kaverno kaj ekludis: “La sesa edzino, la sesa edzino kun kvinopo da infanoj...”.

Unu vulpido elŝovis sian kapon por vidi, kiu tiel bele ludas. La kato frap al ĝia kapo per la sabro, kaj daŭras ludi: “La sesa edzino, la sesa edzino kun kvinopo da infanoj...”.

La vulpino aŭdas la muzikon kaj diras al alia ido:

– Kuru kaj vidu, kiu tie ludas. Via frato sendube jam dancas.

Tiu elŝovis sian kapon el la kaverno kaj demandas:

– Kiu ludas ĉi-tie?

La kato ankaŭ tiun frapis per la sabro kaj daŭre ludas.

La vulpino sendas la trian idon:

– Esploru, do, kio tie okazas. Viaj fratoj dancas kaj nin tute ne sciigas.

Tiamaniere ĉiuj vulpidoj unu post la alia iris por vidi la muzikiston kaj neniam revenis. Finfine la vulpino mem elŝovis sian kapon el la kaverno, sed la sama sorto atendis ankaŭ ĝin.

Tiam la kato rampis en la kavernon, trovis la kokinon kaj kondukis ŝin hejmen.

Lertulo

Antaŭ longa tempo ia pastro veturis en urbon kaj haltis en vilaĝo por nutri la ĉevalojn. Dum la koĉero ĉion priordigadis, la pastro iris en la domon, starantan ĉevoje. Vidas li, ke neniu enestas krom eta infaneto kuranta sur la planko.

– Estu adorata Jesuo Kristo, – diras la pastro.

– Dum jarcentoj eternaj! – respondas infaneto, malgranda, kiel fabplanta garbeto. – Bonvolu sidiĝi kaj ripozi.

Sidiĝis la pastro kaj demandas la knabon:

– Laŭ sia aĝo vi aspektas tre prudenta, bubo. Sed diru al mi, kie estas via patro.

– Paĉjo eliris kun la malplimulto por serĉi plimulton.

– Kaj via patrino?

– La patrino manĝitan panon bakas.

– Nu, kaj via fratino? – daŭre demandadas la pastro.

– La fratino en la lignoamaso kvazaŭ vipero siblas.

– Kaj eble vi ankaŭ havas fraton?

– Certe, sed li helbrunan reton trikas.

La pastro balancigas sian kapon kaj neniel povas percepti, kion la infanaj vortoj signifas. Li nur komprenas, ke li estas lertulo neniam antaŭe renkontita.

– Ege prudenta estis via parolo, bubeto, do ekspliku nun, kia estas la senso de via diraĵo, ke via patro serĉas por plimulto kune

kun malplimulto.

– Ĉu vere vi ne komprenis, kara pastro? Li ja eliris por semi sekalojn.

– Kaj kian manĝitan panon vis patrino bakas?

– Tre simpla afero: kiam ni ekmankas panon, mia patrino prunteprenas ĝin el la najbaroj. Kiam ni bakas ĝin, ni redonas la ŝuldon, kaj ni ree havas nenion manĝeblan.

– Vi diris, ke via fratino en la lignoamaso kvazaŭ vipero siblas.

– Ŝi teksas sidante en la stablo.

– Kaj kian reton via frato trikas?

– Li konstruas fornon en la banejo.

Eksilentis la pastro mirigita per la infana prudento kaj ree ekparolis;

– Filĉjo, ĉu vi ne povus al mi montri la vojon en la urbon?

– Kial ne, kara pastro? Se vi volas finveturi hodiaŭ, veturu ronde, kaj se vi deziras akiri la celon morgaŭ, veturu rekte.

La pastro ree ne povas percepti, kion la knabo parolas.

– Ĉu vi ne eraras tiel parolante? Ŝajnas tute ne simile, ke veturante rekte mi perdus pli multe da tempo.

– Sed tio estas vero, kara pastro. Veturante rekte vi devos penetradi tra arbustoj kaj malglataĵoj. Via kaleŝo rompiĝos, kaj ĝis kiam ĝi estos mendita, la morgaŭo venos. Kaj la ronda vojo estas multe pli bona kaj vi eblos pli baldaŭe alveturi.

La pastro krucsignis la infaneton, benis lin kaj forveturis pensante: “Tiel malgranda, sed jen kia spritulo. Verŝajne plenkreskinta

li ekestos eĉ pli sprita.

La infaneto kreskis kaj atingis sian junecon. Ĉiuj miregis lian saĝon kaj prudenton. Ekaŭdis pri tio sinjoro kaj tre ekkoleriĝis. Kiu povus imagi, ke ordinara vilaĝano estu pli prudenta ol bojaroj!

Unufoje ekvidis la sinjoro, ke la junulo portas tri anserojn kaj barigis lian vojon.

– Aŭskultu, kamparanaĉo, donu al mi tiujn anserojn. Ĉu decas al ordinara homo manĝi ilin?

– Mi povas vendi ilin, sed ne fordoni, – respondis la junulo.

– Tia penso eĉ ne troviĝas en mia kapo, – rikanas la sinjoro. – Se vi ne fordonos libervole, mi forprenos ilin perforte. Hej, servistoj!

Alkuregis la servistoj al la junulo kaj forprenis la anserojn.

– Nu, sinjoro, – li diras, – vi rememoros min trifoje pro tiuj-ĉi anseroj.

– Sentaŭgulaĉo, – ridas la sinjoro. – Vi signifas nenion al mi.

Pasis duonjaro, la junulo ŝminkis sian vizaĝon por ke la sinjoro ne rekonu lin kaj simulante arbohakiston, li iris en la bienon. Renkontinte la sinjoron li diras:

– Mi estas ĉarpentisto kaj mi scipovas ĉiujn lignolaborojn. Mi aŭdis, ke la sinjoro intencas konstrui novan palacon.

– Ho, kiel ĝustatempe vi trafis ŝalveni, – ĝojas la sinjoro. – Mi vere intencas konstrui. – Kaj kian pagon pro la laboro vi deziras?

– Mi ne povas diri, sinjoro, nevidinte la arbojn. Eble ni veturu por rigardi ilin, kaj poste ni jam findecidos pri la pago.

Veturis ambaŭ en la sinjoran arbaron kaj elkaleŝiĝinte iras kune kun la servistoj inspekti la arbojn. Tuj kiam ili atingis arbodensaĵon,

kaptis la junulo la sinjoron je la kolo eltiris el sub la mantelo knuton kaj vipis lin tiom, ke tiu apenaŭ vivteninte rampis al la kaleŝo.

Post la vipado la sinjoro bonege memoris la junulon kaj la anserojn, sed li pensis:

„Vi instruis min unufoje, sed mi certe estos pli singardema estontece.“

Pasis unu jaro kaj la lertulo, aĉetinte belegan ĉevalon, rajdadas sub la sinjoraj fenestroj. Nun li ŝajnigis riĉan komerciston, unuafoje veninta en la landon. Ekvidis la sinjoro nekonatan eksterlandanon kaj lian belegan ĉevalon, kaj tiel ekdeziris ekhavi ĝin, ke pri nenio plu ne povas pensi. Li sendis serviston por demandi, ĉu la eksterlandano ne emas vendi la ĉevalon.

– Kial ne! – respondis la eksterlandano.

Spertinte lian opinion, la sinjoro elkuris por marĉandi pri la kosto.

– Bone, – diras la junulo. – Via servisto provu la ĉevalon kaj ni dume ĉion pritaksos.

Tuj post kiam la servisto forrajdis, la junulo kaptis la sinjoron je la kolo kaj ekvipis lin ĉiufanke. Kiam la servisto alrajdis, li tuj enseliĝis kaj forrajdegis, lasinte la sinjoron plorantan kaj ĝemantan.

– Ĉio-ĉi, kara sinjoro, helpos al vi rememori min la duan fojon.

Nu, la sinjoro tiel bone rememoris lin, ke estis tute maleble forgesi. Li kuŝas enlite por unu, du semajnoj kaj neniel ellitiĝi povas.

Kaj la junulo surmetis longan mantelon, surnazigis okulvitrojn, kaj ŝajnigante doktoron, venis al la palaco. Alvenis kaj diras:

– Eble la sinjoro bezonas doktoron?

– Certe, – respondis servisto, – tamen nia sinjoro timas ĉiujn. Nun tage kaj nokte li estas gardata per kelkaj servistoj.

– Nu, ili ne ĝenos min. Ili gardu, kaj mi sanigos la sinjoron, ne servistojn.

Kiam la sinjoro ekvidis tian prudentan doktoron, li tuj konsentis, ke li eku la sanigadon.

– Por ke la sanigilo bone funkciu, ĝi devas esti akceptata en la banejo kaj poste formetinte ĉiujn vestaĵojn, oni devas varmiĝi tute nuda.

La sinjoro pensis iel, pensis aliel kaj decidis esti sanigata. La gardistoj portis lin en la banejon, sed la doktoro, irante malantaŭe, ŝovis braĝeton en la tegmenton de la stalo. Forvestiĝis la sinjoro kaj atendas por la sanigilo, kaj tiatempe iu ekkriis:

– Incendio! Incendio!

La gardistoj elkuris por rigardi, kio okazis. Ekvidinte la brulantan stalon, ĉiuj entreprenis pri ĝia estingado. Dume la junulo kaptis la submantele kaŝitan vipon, kaj tiel vipis la sinjoron, ke tiu postrestis apenaŭ viva. Ĝis kiam la servistoj revenis, eĉ la junulaj piedsignoj jam estis malvarmiĝintaj.

– Nun, kara sinjoro, ĉiuj-ĉi tri rememoroj sufiĉos al vi por via tuta vivo.

Instruita de la lertulo, la sinjoro jam neniam ekdeziradis fremdajn anasojn.

Malriĉulo kaj avidulo

En ia vilaĝo vivis du fratoj. Unu estis riĉa, kaj la alia apenaŭ povis sian mizeran ekzistadon elteni. Por la riĉulo naskiĝis filo kaj li aranĝis luksan baptifeston. Tute nevolonte li invitis al la festo ankaŭ sian malriĉan fraton. Li ne estis ema iri, ĉar li ne povis aĉeti donacojn. Finfine li skrapis la lastan hordean farunon, bakis malgrandan kuketon kaj portis al la frato. Tiu, ekvidinte tian mizeran donacon, koleriĝis kaj malĝentile diris:

– Tiaj donacoj taŭgas nur por infero...

Rekaptis la mizerulo la kuketon kaj foriris al la infero. Iras, li iras kaj ekvidas li vastajn herbejojn, en kiuj ia homo barilon konstruas. La mizerulo demandas:

– Ĉu tio estas infero?

Tiu mansvingis malproksimen.

– Iru plu kaj vi trovos du homojn fajron bruligantajn. Demandu ilin.

La mizerulo vojaĝas antaŭen. Jen vidas li, ke du homoj fajron bruligas kaj kuiras ion en la kaldrono. Li alproksimiĝas kaj petas:

– Lasu min en la inferon.

Unu el ili (tiu estis diablo) diras:

– Estas demandenda, ĉu vi pravas eniri.

Li ĉirkaŭturnis kaj kuregis en la inferon.

La dua (tiu estis anĝelo) diras al la mizerulo:

– Prenu ĉi-tiun sakon kaj tenu ĝin malkovritan.

Kiam la mizerulo faris, kiel ordonita, la anĝelo ekverŝis en ĝin la ŝaŭmon de sur la surfaco de la kaldronenhavo.

Baldaŭ revenis la diablo kaj diras:

– Vi ne pravas eniri la inferon. Revenu hejmen kaj loĝu tie ĝis sia morto.

Li do ekiris hejmen. Iras, li iras kaj subite li eksentis ege dormema. Li metis sian kapon sur terbulo kaj ekdormis. Vekiĝinte li vidas, ke la sako estas malplena, la ŝaŭmo forestas, nur ĉirkaŭ li aro da ŝafoj paŝtiĝas. Li stariĝis, ekiris kaj la ŝafoj sekvas lin. Post ioma vojaĝado li renkontis tre belan sinjorinon ([tio estis la Sankta Dipatrino](#)), kiu diras al li:

– Homo, donu la ŝafojn al mi.

– Ne, mi ne povas, – respondis la mizerulo.

Tamen ŝi ne ĉesis la petadon kaj li fordonis ĉiujn ŝafojn.

Tiam la sinjorino donis al li du groŝojn kaj diras:

– Veninte hejmen metu unu groŝon en unu malplenan grenujon, kaj la alian – en la duan. Matene rigardu, kio estos okazinta.

La mizerulo plenumis la ordonon.. Matene li vidas, ke ambaŭ grenuoj estas plenplenaj da mono. Ne kapablas la mizerulo kalkuli ĉion, eble li povus nur volumenmezuri. Sendas li kampserviston al la riĉa frato por pruntepreni la volumenmezurilon.

– Kaj kion vi mezuros, ke vi nenion havas?– rikanis la riĉulo kaj ne donis la mezurilon.

Iras por peti la mizerulo mem.

– Frato, pruntedonu mezurilon.

Tre nevolonte la riĉulo pruntedonis la mezurilon. Kiam la tuta mono estis disdividita, la mizerulo ŝovis unu ormoneron sub la mezurilringo kaj redonis la mezurilon al sia frato. Ekvidinte la ormoneron li ekmiregis kaj senprokraste kuris al sia frato.

– Kie vi ricevis tiom da mono? – demandadas li kaj liaj okuloj brilegas pro avideco.

– Kiam vi sendis min al la infero kun hordea kuko, mi iris tien kaj vendis mian kukon. Se vi irus tien kun multe pli bona kuko, vi ricevus multe pli da mono.

Kuris la riĉulo hejmen kaj diras al sia edzino:

– Karulino, baku laŭeble baldaŭ kukojn el la plej blanka faruno. Ni ambaŭ veturos al la infero. Mia frato pro simpla hordea kuko ricevis amasegojn da mono kaj ni ricevus multe pli.

Do, elveturis ili ambaŭ. Kaj post ilia elveturo neniu aŭdis pri ili ĝis nuna tago.

Klemele

Ĉe unu sinjoro estis paŝtisto nomata Klemele. La sinjoro tre malbone nutrigis la dungitojn, kiuj konstante suferis malsaton kaj pleje la paŝtisteto, kiu krom malsato estis ĉiam molestata. Komprenas Klemele, ke li mortos pro malsato, do li decidis ekprovi ruzaĵon. Estante tre maldika kaj malgrasa, li sukcesis penetri tra la fenestro en la provizejon kaj tie li regalis sin per kremo, mejlo kaj aliaj bongustaĵoj. Longe la sinjoro kaŝobservadis, kio ŝovas sin en lian provizejon kaj finfine li sukcesis identigi la krimulon – Klemele. Trovis lin la sinjoro ĉe kremujo kaj demandas:

– Kion vi faras ĉi-tie, Klemele?

– Mi lernas, kiel ŝteli, sinjoro.

– Ĉu vi jam bone ellernis?

– Tre bone, eĉ bonege.

– Nun, aŭskultu, Klemele. Mi pardonos la ŝteladon el mia provizejo, se vi pruvos sin lerta ŝtelisto, kaj se ne, vi ricevos tiom da batado, ke vi malfacile toleros ĝin.

– Mi konsentas, sinjoro. Kaj kio estas ŝtelinda?

– Morgaŭ mi sendos servistojn al bazaro por vendi kapron. Vi devas ŝteli la kapron por ke neniu rimarku tion. Vi povas vendi ĝin al judo kaj alproprigi la monon.

– Bagatelaĵo, – respondis Klemele. – Ĉio estos plenumita.

Morgaŭ matene li ekvidis, kiel du bienservistoj ekkondukis la sinjoran kapron en la bazaron kaj li rampis post ili. Kondukas la servistoj la kapron, kaj tiu, kiel decas al la kapro, konstante malobeas. Laciĝis, tute senfortiĝis ambaŭ servistoj la kapron tirante,

do atinginte drinkejon, ili decidis eniri kaj restarigi siajn fortojn per iom da biero. Ili alligis la kapron al la pordego kaj iris en la drinkejon. Elirinte ili ne spertis eĉ la odoron de la kapro, ĉar Klemele ŝtelvenis, forligis de la barilo la kapron, vendis ĝin al la judo kaj alproprigis la monon.

Revenis la servistoj malsukcesintaj kaj tute malgajaj.

– Ĉu vi vendis la kapro? – demandas la sinjoro.

– Nu, ne sinjoro. Iu ŝtelis ĝin.

– Ho, vi malatentulaĉoj! – kriegis la sinjoro. – Morgaŭ venigu urben du virbovojn por vendi kaj atentu, ke ne ekestu kiel hodiaŭ. Ne lasu ilin ĉe la drinkejo.

– Certe ni ne lasos ilin ĉe la drinkejo, – promesegadis la servistoj.

La sinjoro vokis Klemelen kaj ree petis, ke li ŝtelu la bovojn.

– Rigardu! Se vi ne ŝtelsukcesos, vi estos vergata pro la provizejo kaj ankaŭ pro la ŝtelita kapro, kaj se vi sukcesos, la mono por la bovoj estas via.

– Bagatelaĵo, – respondis Klemele. – Ĉio estos plenumigita!

Morgaŭe pelas la dungitoj ambaŭ sinjorajn bovojn. Iras la bovoj laŭ sia kutima lanta maniero, piedon post piedo almenaŭ tirante, kaj la suno varmegas, kvazaŭ en banejo.

Klemele kaŝe preterkuris ilin kaj forĵetis sian maldekstran ŝuon. La dungitoj atinginte ĉi-lokon vidas, ke tute taŭga ŝuo kuŝas survoje, nur la problemo estas, ke ĝi esta sola.

– He, kiel ĝi taugus al ni? Ja sola ĝi estas, – diras la servistoj. – Lasu ni ĝin.

Kaj ili forpelis la bovojn, postrestinte la ŝuon en la voja pulvo.

Kaj Klemele kuris pli foren kaj demetis sian dekstran ŝuon. Venis la servistoj al tiu loko kaj eĉ iliaj okuloj elpuŝiĝis.

– Ho, centdiable! Ja ĝi estas la alia parŝuo. Kuru ni por alporti la unuan. Kiu atingos ĝin pli baldaŭ, tiu gajnos la paron.

Alligis ili la bovojn al la pino kaj ekkuris por serĉi la unuan ŝuon. Kaj Klemele forligis la bovojn, fortranĉis iliajn vostojn, ŝovis tiujn en arbotruon kaj kondukis la bovojn for.

Kondukinte en urbeton, li vendis ilin al la judo kaj plenigis sian poŝon per mono.

La du servistoj, reveninte al la sinjoro, ekrakontis pri la okazintaĵo.

– Kara sinjoro, la arbo forglutis la bovojn. Dum ni kolektadis ŝuojn, ĝi manĝegis niajn bovetojn, nur iliaj vostoj videblas en la trunko.

– Ho, vi malatentulaĉoj! – eĉ pli ol antaŭe ekkoleriĝis la sinjoro. – Ĉi-tie ne arbo kulpas, sed estas spritaĵoj de Klemele. Morgaŭ vi devos prizorgi mian plej bonan ĉevalon, ke ĝi ne estu ŝtelita. Se vi perdos ĝin, vi estos vergitaj, kiel neniam antaŭe. Ĉu vi komprenis?

– Nenio estas malkomprenebla, kara sinjoro. Ni zorgos pri ĝi per ĉiuj niaj fortoj. Se Klemele provos alproksimiĝi, ne sukcesos li eskapi. La tria fojo estos fatala. Ni kunprenos pafilon kaj kunvokos niajn amikojn.

Kaj la sinjoro alvokis Klemele'n kaj demandas:

– Ĉu vi ŝtelis la bovojn?

– Mi ŝtelis, kara sinjoro. Mi ŝtelis kaj vendis ilin al la judo, kaj jen estas la mono.

Kaj Klemele polmbatis sian poŝon.

– Nun auskultu, fraŭleto. Morgaŭ vi devos ŝteli mian plej bonan ĉevalon. Atentu, ke la gardistoj posedas pafilon kaj trafos vian

ventron, kiam ili spektos vin provantan eniri la ĉevalejon. Se vi sukcesos ŝteli la ĉevalon, konduku ĝin sub la fenestro de mia dormoĉambro.

– Bagatelaĵo, – ĵetrespondis Klemele. – Timas mi nek la gardistojn, nek iliajn pafilojn. La ĉevalo estos alkondukita.

Vespere Klemele kaŝe iris por esplori la situon. Vidas li, ke unu sidas sur ĉevalo, la dua staras ĉe la ĉevala kapo kaj tenas la gvidrimenon, kaj la tria tenegas la ĉevalan voston. Ekridis Klemele ekvidinte ĉion viditan. Urĝe li rekuris hejmen surmetis virinajn vestaĵojn kaj kunprenis botelon da brando. Li metis iom da dormigaj herboj en la brandon kaj rekuris al la ĉevalstalo. La gardistoj, ekvidinte pro malvarmo tremantan virinon, permesis al ŝi eniri la stalon. Ŝi dankeme proponis al ĉiuj gustumi iom da bongusta brando. Gustuminte la brandon, la gardistoj tuj ekdormis kaj ekronkis kaj Klemele senprokraste eklaboris: la gardiston, sidantan sur la selo li ligis per ŝnuroj al la trabo kaj kune kun la selo deĉevaligis, al la dua anstataŭ de la gvidrimeno li enmanigis ŝnuregon, kaj kiu tenis la voston, ricevis garbon de pajlo. Ordiginte ĉion li singardeme elkondukis la ĉevalon el la stalo kaj trankvile rajdis al la palaco. Li ekstaris sub la fenestro de la sinjora dormoĉambro kaj alvokis lin:

– He, sinjoro kara, ĉu vi dormas?

La sinjoro pensis, ke gardistoj vokas lin kaj elŝovis sian kapon tra la fenestro.

– Kio okazis? Ĉu vi paŝtrafis la ventron de Klemele?

– Ĉi-tie estas mi, Klemele, sinjorĉjo! – respondis la fraŭlo. – Mi alkondukis vian ĉevalon.

– Kaj la gardistoj? – miris la sinjoro. – Kion ili faras?

– Gardistoj? La gardistoj gardas la ĉevalon. Vi mem povas konvinkiĝi.

La sinjoro kuris por rigardi, kaj trovis la gardistojn rekte kiel Klemele estis ilin postrestitajn: ilia estro sidis en la selo, alligita per ŝnuroj al la trabo, la dua firme tenis ŝnuregon, kaj la tria – la garbon de pajlo. Ĉiuj dormegis eĉ ne suspektante, ke ilia ĉevalo jam estas ŝtelita.

La sinjoro batis permane la ŝultron de Klemele kaj diris:

– Nu, Klemele, mi ne pensis ke vi stas tia inventemulo. Tamen nun vi devos plenumi ankoraŭ unu laboron: vi devos ŝteli la nuptan ringon for de la sinjorina mano. Se vi plenumos tion, vi ricevos cent da ormoneroj. Sed tio jam ne estos bagatelaĵo, kiel vi ŝatas ripetadi, ĉar mi persone kun miaj soldatoj gardos la sinjorinon. Se mi observos vin kaŝe alproksimiĝantan, mi forkapigos vin aŭ miaj soldatoj mortpafos vin, kiel perdrikon.

– Nu, efektiviĝu ĉio per la Dia helpo, – respondĵetis Klemele, sed li jam ne aldonis, ke tio estoa bagatelaĵo.

Vespere la sinjoro postenigis soldatojn kun pafiloj ĉe la fenestroj de la dormoĉambro kaj li mem ekstaris ĉe la pordo kun glavo enmane. Kiam mallumiĝis, Klemele iris al la tombejo, elfosis kadavron kaj kun ĝi tre singardeme ŝteliris al la dormoĉambro de la sinjoro. Alveninte al la pordo li tre singardeme ekŝovis la mortinton tra la pordo.

La sinjoro ekvidinte tion, subite forklavigis la kadavran kapon. Klemele, forĵetinte la mortinton, kaŝis sin malantaŭ la pordo. La sinjoro diras:

– Jen estas finitaj ĉiuj ruzaĵoj de Klemele. Nun li devas esti portita al la tombejo kaj enterigita, por ke neniu ekkonu pri tio. Nu, viroj, prenu, kaj portu lin.

Ĉiuj prenis la korpon de la mortinto kaj ekiris. Pro la mallumo neniu eĉ pensis, ke ĉi-tie ne estas Klemele.

Kaj la junulo iom atendinte eniris en la dormoĉambron kaj imitante la sinjoran voĉon ekparolis:

– Aŭskultu, mia karulino, eble donu al mi vian ringon. Klemele perdis sian kapon, intencante ŝteli ĝin, do havu li ĝin. Ni enterigos lin kun via ringo. Kompatinda estas la fraŭlo, ĉu ne?

La sinjorino diris, ke ŝi ankaŭ kompatas la spritan Klemelen.

Kaj tiu, ricevinte la ringon kuregis el la bieno, por ke matene li povu veni kaj montri la ringon al la sinjoro.

Matene vekiĝis la sinjoro kaj pro la timo liaj okuloj preskaŭ elŝoviĝis, ĉar li ekvidis Klemelen vivantan kaj ne damaĝitan, starantan ĉe la pordo de lia dormoĉambro.

– Ĉu ĉi-tie estas vi, Klemele?– demandas la sinjoro.

– Mi, kara sinjorĉjo, kaj jen estas la ringo, – respondis la fraŭlo, donante la ringon de la sinjorino.

Vidas la sinjoro, ke neniuj povas egali al Klemele kaj entute ne indas havi rilatojn kun li. Fordonis la sinjoro al li la promesitajn cent ormonerojn kaj neniam plu instigis lin ŝteli.

Longnazulino, diklipulino kaj larĝpiedulino

Iras iam bela knabineto laŭ la vilaĝa strato kaj nombras la preterflugantajn kornikojn: „Unu, du, tri...“. Veturis preter ŝi juna sinjorido, kaj rimarkinte belan knabinon, demandas ŝin:

– Knabino, kion vi nombras?

Ŝi hontiĝas diri veron, ke ŝi kornikojn nombras, do ŝi diras:

– Mi nombras, sinjoro, kiom da linofaskoj mi povus dum unu nokto ŝpini.

– Nu, kaj kiom do vi povas ŝpini?

– Mi povas ŝpini unu cent da linofaskoj dum unu nokto.

Ege ekmiris la sinjoro kaj diras al la knabino.

– Se vi ŝpinos tiom da linoj dum unu nokto, mi faros vin mia edzino, sed se vi ne sukcesos, vi estos vergita.

Li veturigis ŝin al la bieno, fermis ŝin solan enĉambre kaj alportis unu cent da linofaskoj. Vidas la knabino, ke ĉio-ĉi tute ne estas ŝerco kaj ekploregis. Tamen tute neatendite en la ĉambron eniris neniam vidita virino kun tre longa nazo.

– Kial vi ploregas, knabino? – demandas ŝi.

– Kial mi ne ploregu? Mi promesis ŝpini dumnokte cent linofaskojn, kaj mi entute ne scipovas ŝpini.

– He, tute ne plorindas. Iru por dormi kaj mi anstataŭ vi ĉion ŝpinos. Tamen ne forgesu inviti min al via nuptofesto.

La knabino enlitiĝis, ekdormis, kaj la longnazulino tuj finŝpinis ĉiujn linojn.

Matene la sinjoro venis por inspekti kaj vidas – ĉio estas ŝpinita.

Tiam li alportis cent linofaskojn plu kaj minacordonis, ke ĉio estu dumnokte ŝpinita. La knabino reekploregis, nesciante, kion pripensi. Tuj la pordo bumetis kaj en la ĉambron eniris neniam vidita virino kun tre dika lipo pendanta ĝis la subo de la mentono.

– Kial vi ploregas, knabino?

– Kio estas farenda, se mi dum unu nokto devas finŝpini cent da linofaskoj kaj mi entute ne scipovas ŝpini.

– Nu, ne timu. Iru por dormi kaj mi ĉion ŝpinos. Tamen ne forgesu inviti min al via nuptofesto.

La knabino ekdormis kaj la virino, ŝpininte la linojn, foriris.

Matene la sinjoro vidas, ke ĉio estas farita, sed li volas pli kaj pli. Alportis li la trian centon da linofaskoj kaj ree ordonas la knabinon labori.

Ankaŭ dum la tria nokto ĉio okazis sammaniere kiel dum la antaŭaj du. Nur, ĉi-foje venis por ŝpini virino kun tre larĝa piedo. Minacpetinte, ke ŝi estu invitita al la knabina nuptofesto, ŝi finŝpinis ĉiujn linojn.

Nenio estas farenda al la sinjoro, devas li pretiĝi por la nuptofesto. Li diras al la knabino:

– Kunvoku ĉiujn viajn parencojn, morgaŭ okazos la nuptofesto.

– Mi tute ne posedas parencojn krom tri onklinoj.

– Do, invitu ankaŭ ilin.

Sekvonttage, kiam ĉiuj gastoj kuniĝis, vidas ĉiuj, ke alvenas tri de neniuj viditaj virinoj: unu ku tre longa nazo, alia kun tre dika lipo kaj la tria – kun larĝa piedo. Al sinjoro ili tre malplaĉis, tiaj malbelaj ili estis. Proksimiĝis li al la longnazulino kaj demandas:

– Kial via nazo estas tiel longa, estimatulino?

– He, sinjorĉjo, mi estas tre potenca ŝpinistino, dum unu nokto mi ŝpinas cent linofaskojn.

– Kaj kial via lipo estas tiel dika?

– Ĉio-ĉi estas pro ŝpinado, sinjorĉjo. Ja dum unu nokto mi ŝpinas cent linofaskojn.

– Kaj kial via piedo estas tiel larĝa, estimatulino?

– Pro ŝpinado, sinjorĉjo, pro ŝpinado.Ŝpininte dumnokte cent linofaskojn, la piedo tiaforma ekiĝas.

– Hundoj forprenu tiun ŝpinadon! – ekkriis la sinjoro. – Mi neniam permesos, ke mia belega edzino similiĝu al tiuj birdtimigiloj. For la ŝpinadon!

Kaj li malpermesis al sia edzino iri al la ŝpinilo. Ŝi estis tre feliĉa pro tia malpermeso.

Erinaceto

la seninfana virino, petis Dion donaci al ŝi infaneton almenaŭ similan al erinaceto. Dio alvokis al ŝia preĝo kaj donacis al ŝi fileton similan al erinaceto. Pasis dek jaroj, kaj la erinaceto restas ĉiam sama, neniom pligrandiĝis. Unu tagon petas la erinaceto, ke lia patro permesu al li paŝti porkojn. La patro konsentas.

– Paŝtu, karulo, se tia estas via volo.

Pelis li la porkojn en la arbaron kaj paŝtas ilin, eĉ hejmen ilin ne repelas. Dum unu jaro la porka grego ege pligrandiĝis. Liaj gepatroj konante nenion pri tio, pensis, ke la erinaceto pereis en la arbaro kun ĉiuj porkoj. Kaj li estas tre kontenta pri paŝtado ĉar sentas grandan plezuron esti en arbaro.

Unu tagon, iaj sinjoroj, veturante tra la arbaro, perdis la vojon. Jen ili vidas multegon da porkoj, sed la paŝtisto ne videblas. La erinaceto, ekvidinte la sinjorojn, grimpis el sub la junipero kaj diris:

– Mi estas la paŝtisto de ĉi-grego.

La sinjoro ekdemandis lin:

– Karulo, eble vi povus montri al ni la vojon por ke ni el la arbaro forveturu?

– Kial ne? Sed kiel vi rekompencos por tio?

La sinjoro ekridis kaj diras:

– Jen estas mia filino kaj mi fordonos ŝin al vi kiel edzinon.

– Bone, – ĝojkriis la erinaceto. – Tamen vi donu al mi skriban konfirmon.

Ridante sinjoro skribis ĝin kaj donis al la erinaceto.

Aliatage preterveturis alia sinjoro kaj ankaŭ perdis sian vojon enarbare. Neniel li sukcesas el la arbaro elveturi. Vagante li renkontis erinaceton paŝtantan porkojn. Li elkuris el la juniperaro kaj ekkriis:

– Jen estas mi, la paŝtisteto!

– Karulo, – petas la sinjoro, – montru al ni la vojon, kiel el la arbaro elveturi.

– Mi povas montri, – konsentas la erinaceto, – sed por tio edzigu min kun via filino.

Pro sia kelktaga vagado en la arbaro sen manĝo kaj trinko li tuj konsentis kaj promesis fordoni la filinon. Kaj la erinaceto ree petas:

– Konfirmu tion skribe.

La sinjoro senpense skribis la promeson fordoni sian filinon. Tiam la erinaceto montris la vojon kaj la sinjoro tute sukcese elveturis.

Tiam la erinaceto senprokraste pelis la porkaron hejmen. La patro kaj la patrino ege ekĝojis pri la multego da porkoj. La erinaceto petas la patron:

– Paĉjo, morgaŭ selu al mi kokon, ĉar mi volas rajdi por serĉi mian junedzinon.

La patro selis kokon por li. La erinaceto sursidiĝis sur la koko kaj rajdis al la unua sinjoro kaj trovis lin kun multaj gastoj ĉe bankeda tablo. Ekvidinte la erinaceton, ĉiuj sinjoroj ekpiedbatis lin, kriante:

– El kie aperis ĉi tiu erinaco? Kion li bezonas ĉi tie?

Kaj la erinaceto diras:

– Kial vi ne piedbatis min, kiam vi informiĝis pri la vojo?

Kun tiaj vortoj li enmanigis al la sinjoro ties skriban promeson. Tiam la sinjoro, observante sian promeson, fordonis sian filinon, kvarĉevaligitan kaleŝon, sakon da mono kaj eskortis ilin per tiaj vortoj:

– Veturu plej fore de mia kapo!

Veturas la erinaceto kun la sinjora filino kaj demandas ŝin:

– Ĉu vi promesas ami min?

La junedzino silentas.

– Kisu min, – petas la erinaceto, sed la fraŭlino ne kisas. Tiam la erinaceto puŝis ŝin el la kaleŝo kaj sola veturis hejmen. Veninte hejmen li ordonis ke la patro ligu la ĉevalojn en la herbejo ĝis kiam li revenos de alia junedzino.

Matene li rajdis al la alia sinjoro kaj manigis al li la skriban dokumenton. La sinjoro donis al li triĉevaligitan kaleŝon kaj sidiginte sian filinon en ĝin, forlasis ŝin el la bieno.

La erinaco ree demandas la fraŭlinon:

– Ĉu vi amos min?

– Jes, mi amos, – respondis ŝi.

– Nu, tiuokaze kisu min.

Ŝi tuj kisis lin.

Alveturis ili ambaŭ al la gepatroj de la erinaco kaj geedziĝis.

Unufoje la patrino demandas sian bofilinon:

– Kiel vi povas kuŝi kun li. Ja li tuta estas dornokovrita.

– Vespere li forĵetas sian erinacan felon kaj ekestas homo, – diris la bofilino.

Tiam la patrino kaŝatendis ĝis kiam la einaceto ekdormis, kaptis lian felon, kaj ĵetis en la fajron. Matene la erinaceto serĉas sian felon kaj nenie povas trovi ĝin. Li ekdemandis sian edzinon pri tio, sed ŝi neas, ke ŝi konas ion-ajn pri tio.

– Demandu la patrinon, eble ŝi konas.

La patrino konfesis, ke ŝi bruligis la felon en la forno...

– Tre bone, patrin', – diras la erinaco, – pro via faro, vi mem tri monatojn devos esti vestiĝinta per mia estinta felo.

Nenio estas farenda por la patrino, ŝi devis vestiĝi per erinaca felo. Finvestinte ĝin tri monatojn, ŝi eĉ ne rimarkis, kiel tiu-ĉi felo malaperis.

La vesperfestoj de diabloj

Unu terposedanto havis patrinon, kiu loĝis kun sia filo, uzante lian plenan subtenon. La terposedanto deziris liveri al sia patrino pli bonan manĝaĵon kaj pli bonajn vestaĵojn, tamen lia edzino ĝenis por li fari tion.

– Kial vi prizorgas ŝin? Prizorgu siajn infanojn, sed ne tiun-ĉi maljunulinon. Iru ŝi tra la vilaĝo por serĉi panon por manĝado.

Vidas la patrino, ke ne estos pacienco por ŝi sub la fila tegmento, do ŝi ekpetis, ke li elveturigu ŝin ien malproksimen, por ke ŝi ne aŭdu plu la riproĉojn de la bofilino. Sentas la filo, ke tio ne decas, kaj ankaŭ li kompatis la patrinon. Kiel li povas forveturigi ŝin kvazaŭ ian katinon? Ja liaj najbaroj ĉiam ne ĉesos montri lin per fingroj. Tial li hezitis, nesciante, kio estas farenda.

Tiu terposedanto apudarbare havis fojnejon, en kiu diabloj ŝatis aranĝi vesperfestojn. Kiam komencadis aŭtunaj noktoj, ili kuniradis tien, dancadis, bruadis kaj kriegadis per diversaj voĉoj. Ĉiuj vilaĝanoj evitadis la fojnejon.

Unufoje, kiam la mastro forestis, la bofilino enveturigilis la patrinon kaj forveturigis ŝin al la diabla fojnejo.

– Estas ĉi-tie varme kvazaŭ ĉeforne, do loĝu ĉi-tie eĉ centon da jaroj, – diris ŝi al la patrino.

Ekridinte, ŝi veturis hejmen, pensante, ke ŝi por la tuta vivo liberiĝis je la patrino de sia edzo.

Kaj la virino ĉirkaŭiris la fojnejon, krucsignis ĉiujn angulojn, la malgrandan fenestreton kaj ekkuŝis malantaŭ la forno.

Kiam tute mallumiĝis, kunflugis la diabloj el la tuta vasta ĉirkaŭaĵo. Kiam ili provis malfermi la pordon, ili bruligis la fingrojn, kaj kiam ili

provis eniri tra la fenestro, ili bruldifektigis siajn barbojn. Vidante, ke ili neniel sukcesos, decidis ili peti bonvole.

- Kotre, Kotre, malfermu la pordon, ni deziras danci.
- Estas nun advento. Dancado estas malpermesata.
- Do almenaŭ redonu al ni niajn kornetojn kaj najletojn. Ni postrestis ilin malantaŭ la forno.
- Mi povus redoni, sed kion vi donos al mi pro tio?
- Kaj kion vi deziras?
- Mi deziras, ke vi min bele vestu. portu al mi la plej elegantajn vestaĵojn.

La diabloj kuris al la infero kaj post ioma tempo reaperis kun la plej belaj vestaĵoj.

- Nun malfermu la pordon kaj donu al ni ĉion petitan.
- Hej, kial vi tiel urĝas? Nun portu al mi ŝtrumpojn.

Kiam la diabloj alportis la ŝtrumpojn, ŝi postulis ŝuojn, poste tukon kaj kolieron. Varmegiĝintaj diabloj kuradis kun elbuŝigitaj langoj, sed la virino ne ĉesis postuli diversajn novajn aĵojn. Fine ŝi petis por la plena korbo da mono. Kiam la plej forta diablo alportinte la monon ekverŝis ilin ĉe la sojlo – ekkriis la koko kaj la diabloj hurlante kaj kriegante brukuris al la infero.

Matene la virino revenis hejmen brilanta per novaj vestaĵoj, portante korbon, plenan da mono. La bofilino ekvidis, ke ŝia malico malsukcesis kaj ŝi ekkoleris eĉ pli multe. „Stulta estas tiu bopatrino, – pensis ŝi por si mem, – kelkaj vestaĵoj kaj saketo da mono. Se al mi okazos tia bonŝanco, mi multe pli da riĉaĵoj petos.

Vespere, per neniuj ekvidita, ŝi kaŝe iris al la fojnejo, fermis la pordon kaj ekatendis la gastojn. Tuj post la plena mallumiĝo venis

la diabloj. La pordo malfermis kaj ĉiuj are iris internen.

– Nun vi devos danci kun ni, virino, – deklaris ilia estro. – Vi ja konas, ke ni aranĝas vesperfestojn kaj amuziĝas dum aŭtunaj vesperoj.

– Bone, – ŝi konsentis. – Sed antaŭe vestu min per la plej belaj vestaĵoj, surpiedigu min per oraj ŝuetoj, surmetu sur mia kolo sukcekan kolieron, kaj metu ringojn kun diamantoj sur ĉiun mian fingron. Krome, ĉiu el vi portu al mi po grandegan sakon, plenan da ora mono.

La diabloj ekzumis, kvazaŭ krabroj kaj disiĝis ĉiudirekten. Post duonhoro la plej belaj vestaĵoj, la plej multekostaj ringoj kaj aliaj ornamaĵoj laŭ ŝia peto estis metitaj ĉe ŝiaj piedoj. Apud la muroj de la fojnejo ili starigis la sakojn kun la mono.

– Kion plu vi deziras? – demandis la diabloj.

Tamen pro tiomaj riĉaĵoj kaj la feliĉo la virino restis senvoĉa, nekonante kion plu postuli. Vole, nevole ŝi devis danci kun la diabloj.

Matene la mastro, netrovinte sian edzinon, ekserĉis ŝin ĉie. Tute hazarde li iris en la fojnejon kaj trovis sian edzinon apenaŭ spirantan. Ŝi kuŝis sur la amaso de fordraĉaĵo kun sia propra vestaĵo, sen ia ornamaĵo kaj valoraĵoj kaj laŭ la muroj staris grandegaj sakoj plenigitaj de sekaj tremolaj folioj.

Ekde tiam ŝi plu ne sopiris pri iaj trezoroj kaj estis kontenta postrestinte viva. Ŝi eĉ ĉesis pensi pri la elhejmigo de sia bopatrino.

Verda arbaro, vitra palaco

Estis iam tre riĉa bienposedanto, sed li ne havis infanojn. Li konstante preĝis, ke Dio donu al li filon, kiu estu helpanto en lia maljunaĝo kaj ekheredu ĉiujn liajn riĉaĵojn. Finfine la Sinjoro kompatis lin kaj donis al li filon. La knabo kreskis tre agrabla kaj afabla, kaj kiam li estis sufiĉe aĝa, la patro sendis lin en lernejon. Fininte la studojn, la fraŭlo ekdeziris servi en la armeo. La patro ne emas konsenti sed la filo ne cedas:

– Ne, paĉjo, mi soldatiĝos.

Do li faris memvole. Li servis en la armeo taŭge kaj akurate kaj li estis tre ŝatata de sia estraro. Finfine li mem ekestis ĉefoficiro.

Unufoje li kun sia taĉmento partoprenis militekzercadon. Revenante tra arbaro, la soldatoj atingis malgrandan vilaĝon kaj tie ĉe la vojo staris drinkejo. La ĉefoficiro eniris la drinkejon kaj petis por ion ajn trinki. Dum la drinkejmastro preparis al li la trinkaĵon, malrapide eniris mizera ĉifonulo kaj ekpetis:

– Bonvolu kompati min, mastro, donu ion por manĝi, ĉar mi preskaŭ mortas pro malsato.

Tamen la mastro anstataŭ peco da pano suprenverŝis la mizerulon per blasfemoj kaj kriegaĵoj:

– Iru for, vi eĉ pasintfoje ne pagis por la ricevita pano.

Kaptinte la mizerulon, elpuŝis lin, sed tiu ekkuŝis ĉe la sojlo kaj tie mortis.

La ĉefoficiro demandas la mastron:

– Kiom li ŝuldis al vi?

– He, dek groŝojn, – respondis tiu.

– Kaj pro tia eta sumo vi forprenis lian vivon. Prenu jen dek groŝojn kiel la ŝuldon de la mizerulo kaj unu ormoneron por lia sepulto. Estu lia spirito pli feliĉa.

Doninte la monon li iris eksteren. Li rigardas, sed ne povas observi eĉ etan signon de sia armeo. Nenia viro videblas sen ia kialo de ilia pereco. Estas jam nokto kaj la ĉefo ne konas kion fari. Li pensis, longe pensis kaj decidis iri antaŭen laŭ la vojo. Apenaŭ li faris kelkajn paŝojn, li malantaŭe ekaŭdis voĉon:

– Amiko, turnu sin maldekstren kaj iru laŭ tiu vojo. Post ioma irado vi trovos ensorĉitan bienon, kiu bezonas savadon.

Obeinte, li turnis sin kaj ekiris laŭ la indikita vojo. Post ioma irado li vere ekvidis bienon. Li eniris ĝin, sed ĝi estis tute malplena. Li trarigardis ĉiujn ĉambrojn sed nenia viva estaĵo ĉeestis. Fine en unu ĉambro li trovis tablon pretigitan por vespermanĝo kun bongustegaj manĝaĵoj kaj bonkvalitaj vinoj. La ĉefo eksidis kaj vespermanĝis. Poste en la najbara ĉambro li trovis liton, sur kiu li ekkuŝis kaj dolĉe ekdormis. Matene li ankaŭ trovis surtabligitan matenmanĝon. Manĝinte li promenis en la ĝardeno, admiris la belegan palacon, sed li sentis iom malgaje pro la absoluta manko de homoj.

Kiam post la vespermanĝo li enlitiĝis kaj pretiĝis por dormo, subite malfermis la pordo kaj en la ĉambron eniris sinjorino, nigra kvazaŭ karbo. Ŝi rigardis al la ĉefo kaj diris:

– Kara bonfaranto! Vi venis por savi min, sed mi ne konas, ĉu vi kapablos tion. Ĉi-nokte en ĉi tiu ĉambro vin vizitos viaj gepatroj, ĉiuj viaj parencoj kaj ĉiuj deziros paroligi vin, sed vi ne parolu, ĉar ili ne estos viaj gepatroj kaj parencoj, sed transformiĝintaj diabloj. Se vi prononcos nenian vorteton, ili ne sukcesos male efiki vin. Sed se vi ekparolos, vi mem pereos kaj min pereigos.

Dirinte tion la sinjorino malaperis kaj li restis sola.

Antaŭ meznokto en la ĉambro subite aperis lia patro, patrino, onkloj, onklinoj kaj multego da aliaj parencoj. Tuj ĉiuj penis ekparoligi lin, demandis, petis kaj plej persistema estis la patro. Li konstante riproĉadis lin:

– Ve, mi edukis lin, zorgis pri li kaj nun li fanfaronas kaj eĉ unu vorton li ne diras al sia patro!

Dum ilia bruado kaj babilado koko ekkriis kaj ĉio malaperis. La ĉefoficiro enlitiĝis kaj trankvile ekdormis. Vekiĝinte matene li lavis sin, matenmanĝis kaj poste promenadis sur la bona tereno. Post la vespermanĝo li enlitiĝis kun la pensoj pri la okazontaĵoj de ĉi-nokto. Baldaŭ reaperis la nigra sinjorino, sed li observis, ke ŝi jam ne estas tiel intense nigra, sed pli blankema. La sinjorino ekparolis:

– Bonfaranto! Vi eltenis la pasintan nokton, do ankaŭ penu elteni ankaŭ ĉi-tiun, kiu estos pli malfacila ol la unua. Tuj venos viaj soldatoj, kies estro vi estas. Ĉiuj salutos vin, paroligos kaj deziros ekaŭdi eĉ unu vian vorteton. Sed vi respondu al neniu kvazaŭ vi estus ne aŭdinta ilin.

Dirinte tion ŝi tuj malaperis.

Antaŭ meznokto svarmis la plenplena ĉambro per soldatoj kaj oficiroj, kiuj ekatakis lin, ke li ekparolu. Kiam li silentis, ili ekblasfemis kaj ekminacis lin, intencante dispecigi lin per sabroj. Tamen li nenion diris kaj la diabloj transformiĝintaj al soldatoj nenion povis fari. Kun la kokokrio ĉiuj malaperis, kaj li ekdormis kaj dormis ĝis la mateno.

Vespere, kiam li pretiĝis por la noktodormo, en la ĉambro ree aperis la nigra sinjorino. Ŝi estis preskaŭ tute blanka, nur ŝiaj manoj kaj piedoj estis nigraj.

– Dankon al vi, bonfaranto, pro tio, ke vi eltenis ankaŭ la pasintan nokton. Eltenu ankaŭ ĉi-nokton kaj ni ambaŭ estos feliĉaj. La nokto estos malfacila, ĉar vin vizitos viaj eksestroj: koloneloj kaj generaloj. Ili donos ordonojn al vi, kriegos, sed vi ne respondu. Forlasante la ĉambron ili ekhakos vin per sabroj, sed mi donos al vi boteleton

de viva akvo, trikinte kiun, vi ne sentos doloron kaj viaj vundoj tuj saniĝos.

Ŝi donis al li la boteleton kaj malaperis.

Baldaŭ en la ĉambron kunkuregis koloneloj kaj generaloj, kriegante, ke li estas perfidulo, postrestinta siajn soldatojn al kruela destino kaj ke li loĝas kaŝinte sin en la bieno. Ilia opinio li estas juĝenda kaj pendigenda.

La diabloj transformiĝintaj en oficirojn ege furioziĝis kaj svingis ĉirkaŭ lia kapo per seningaj glavoj. La ĉefoficiro jam opiniis, ke tiunokte li ne sukcesos resti viva, tamen ekkriis la koko kaj la oficiroj elkuregis eksteren. Preterkurante unu generalo pikis perglave en lian koron, sed trafis nur la ŝultron. La ĉefoficiro svenis pro doloro, sed rekonsciiĝinte li tuj trinkis la akvon el la boteleto kaj ree ekestis sana kaj vigla.

Vekiĝinte li malfermis la okulojn kaj ekvidis starantan en la ĉambro belan reĝidinon, kiu malalte klinis sin antaŭ li.

– Dankon al vi, bonfaranto, ke vi neektimis la malbonajn spiritojn, kaj ke vi malsorĉis la bienon. Tamen mi ne estas tute liberigita de ilia perforto. Mi esperas, ke vi daŭre helpos min. Nun vi devas iri okcidenten tra la tuta arbaro ĝis kiam vi atingos urbeton, kie loĝas mia onklino. Malantaŭ la urbo estas granda monto, do vi tie atendu min. Kiel atingi la monton, vi ekkonos el mia onklino.

Li obeis la belan reĝidinon kaj ekveturis. Trairinte la arbaron li trovis urbon kaj venis al la onklino de la reĝidino por informiĝi kie estas la monto. La onklino donis al li fraŭleton gvidanton kaj metis en ties poŝon ruĝan pomon.

– Kiam la ĉefoficiro ekdeziros trinki, donu al li ĉi-tiun pomon, – flustris ŝi en lian orelon.

Venis ili al ĉi-tiu monto kaj la oficiro tiel ekdeziris trnki, ke li tute ne povis suferi.:

Tiam la fraŭlo diras:

– Mia panjo donis al mi pomon kaj petis doni ĝin al vi, kiam vi ekdeziros trinki.

Kaj li donis al li la ruĝflankan pomon.

Manĝinte la pomon la ĉefoficiro sentis tian fortan dormemon kaj liaj okuloj tuj firmege kovriĝis. Li kuŝis kaj firme ekdormis. Post ia tempo alveturis la reĝidino. Ĉiel ŝi vekis lin sed neniel sukcesis. Tiam ŝi diras:

– Mi alveturos morgaŭ, li atendu min.

La kaleŝo, la ĉevaloj kaj la veturigistoj malaperis.

Tuj post kiam la reĝidino forveturis, la ĉefoficiro vekiĝis.

– Ĉu la reĝidino estis alveturinta? – li demandas.

– Certe, – respondis la fraŭleto. – Ni vekis vin, vekis, sed neniel sukcesis. Ŝi promesis morgaŭ alveturi.

Iris ili al la onklino por tranoktado kaj matene revenis sur la monton. Sed ankaŭ ĉi-foje ĉio okazis same kiel la unuan fojon: la ĉefoficiro ekdeziris trinki, la fraŭleto donis al li la ruĝan pomon kaj ekdormis kvazŭ mortinta. La reĝidino ree ne sukcesis veki lin kaj kun sopiro forveturis, dirinte, ke ŝi alveturos sekvontan nokton.

Sed ankaŭ la trian nokton la ĉefoficiro manĝis la ruĝan pomon kaj ree ekdormis. Kiam la alveturinta reĝidino ne povis veki lin, ŝi ekploris kaj ekplendis pri sia sorto. Tiam ŝi tranĉis sian fingron, elingigis lian sabron kaj skribis sur ĝi per sango: „Karulo, vi trovos min kie estas la verda arbaro kaj la vitra palaco. Kial vi preterdormis sian feliĉon?“

Kiam la reĝidino forveturis, vekiĝis la ĉefoficiro kaj demandas:

– Ĉu la reĝidino estis alveturinta?

– Jes, sed ne vekinte vin ŝi refoje forveturis.

La ĉefoficiro ekploris:

– Ĉu ŝi nenion restigis al mi?

– Restigis. Jen ŝi ion skribis sur via sabro.

Li rgardas kaj vidas surskribon: „ Karulo, vi trovos min kie estas la verda arbaro kaj la vitra palaco. Kial vi preterdormis sian feliĉon?“

– Diru al mi, kio kaŭzis mian dormemon. Ĉu vere vi ne scias, kio okazis kun mi?

– Mi scias, – respondis la fraŭleto. – Mia patrino estas sorĉistino kaj verŝajne ŝi ensorĉis vin per la ruĝaj pomoj.

Ploris kaj sopiris la ĉefoficiro kaj ekiris li en la vastan mondon por serĉi la verdan arbaron kaj vitran palacon. Iris, li iris kaj ian tagon ekvidis ĉevoje tri malgrandajn luktantajn viretojn. Li haltis kaj demandas ilin:

– Pro kio vi luktas?

– Nia patro postmorte restigis al ni valorajn aĵojn, do ni luktas pro ili.

– Kaj kiaj estas la aĵoj?

– Jen ili estas: selo, mantelo kaj vipo.

– He, veraj bagatelaĵoj, – ekridis la ĉefoficiro.– Ili estas ja tute nevaloraj.

– He, vi nenion konas,– ekkriis la viretoj.– Ĉi tiuj objektoj estas miraklaj. Se vi sidiĝos sur la selo, vi povos flugi kien vi volas. Vestinte sin per la mantelo vi ekiĝos nevidebla, kaj se vi klakos per la vipo, iaj– ajn muroj ruiniĝos.

La ĉefoficiro pensas, ke ĉi tiuj aĵoj ankaŭ taugus por li, do li diras:

– Sed kial vi luktu? Ja vi estas trio kaj ankaŭ la aĵoj estas tri.

– Ja, ĉiu el ni volas posedi ĉiujn aĵojn. Estus bone, ke vi eksolvus nian konteston.

– Bone, – respondis la ĉefoficiro kaj montris permane apude starantan kverkon. – Kiu estos la unua alkurinto al la kverko, ricevos ĉiujn aĵojn.

La viretoj ekkuris, kaj la ĉefoficiro sidiĝis sur laselo, vestiĝis per la mantelo, prenis la vipon kaj malaperis el liaj okuloj. Vane vi provus ekvidi lin.

Sidas la ĉefo sur la selo kaj flugas inter la nuboj. Rigardis li malsupren kaj en arbustaro ekvidis malgrandan dometon. Li alteriĝis, venis en la dometon kaj demandas:

– Ĉu estas iu-ajn ĉi-tie?

– Estas!– respondis aperinta el malantaŭ la forno griza maljunuleto.

– Diru, bona homo, eble vi konas, kie estas la verda arbaro kaj la vitra palaco.

– Kvankam mi estas la reĝo de bestoj, tion mi ne scias. Sed mi demandos miajn bestojn.

Kunvokis li ĉiujn bestojn kaj demandas, tamen ili nur balancas siajn kapojn. Nenion ili scias.

– Kara gasto, vi vidas, ke mi ne povas helpi vin, ĉar miaj bestoj tion ne konas. Flugu al mia frato, eble, li konas.

Nenio estas farenda, flugas li daŭre. Atingis li alian dometon kaj iras en ĝin. Tie renkontas li eĉ pli aĝan maljunulon, kiu agnoskas sin reĝo de fiŝoj.

– Ĉu vi ne konas, maljunulo, kie estas la verda arbaro kaj la vitra palaco?

– Mi mem ne konas, tamen eble miaj fiŝoj konas.

Kunvokis li ĉiujn fiŝojn el riveroj, lagoj kaj maroj kaj demandas, ĉu ili konas tiun lokon. Sed ankaŭ ili ne konis.

– Flugu, kara gasto, al alia nia frato, reĝo de birdoj. Eble li konos.

La ĉefoficiro faris laŭ lia konsilo. Li trovis la trian dometon, kie loĝis griz-griza, old-olda reĝo de birdoj.

– Ne, mi ne konas, – diras li al la gasto, – kie estas la verda arbaro kaj la vitra palaco, tamen eble miaj birdoj konos.

Kunvokis li ĉiujn birdojn, sed ankaŭ ili nenion sciis. Subite la maljunulo rimarkis, ke forestas la maljuna korvo, vivinta en ĉi-mondo jam kvincent jarojn.

– Invitu lin, – li diris, – Li certe scios.

Baldaŭ la nigra korvo flgis al la reĝo.

– Mi konas, kie estas la verda arbaro kaj la vitra palaco sed ili estas tre malproksime. Ni vojaĝus tien multajn jarojn. Krome la arbaro estas ĉirkaŭita per alta ŝtona muro, neascendebla kaj netraflugebla. Malantaŭ la muro la vitra palaco estas gardata per multnombra gardantaro kaj neniu estas permesata la palacon eniri.

– Tio estas malgrava obstaklo, – respondis la ĉefoficiro. – Ni flugos tien nur kelkajn horojn kaj tie ni vidos, kio estas farenda.

Li kunprenis la nigran korvon, dankis la reĝon de birdoj kaj eksidinte sur la selo, ekveturis li por serĉi la reĝidinon. Post kelkaj tagoj li atingis la verdan arbaro ĉirkaŭitan per alte-altega muro. Kiam li klakis per la vipo, ĉiuj muroj detruigis kaj ili ekestis ĉe la vitra palaco. Subite la korvo svingis per flugiloj kaj transformiĝis al homo. Li metis sian manon sur la oficira ŝultro kaj diris:

– Mi estas tiu mizerulo, kiun la senkora posedanto de la drinkejo forpelis el la domo kaj kiun vi kompatis pagante mian ŝuldon kaj donis monon por la sepulto. Esta mi, kiu montris al vi la ensorĉitan bienon, estas mi, kiu sendis al vi tri viretojn, por ke vi akiru la miraklajn aĵojn— la selon, la mantelon, kaj la vipon, kij helpis vin trovi la reĝidinon. Tio estas mia danko pro via bona koro.

Li flagris kvazaŭ stelo kaj malaperis el la oficiraj okuloj. Kaj li vestiĝis per la mantelo, iĝis nevidebla kaj eiris en la palacon, kie lin atendis la reĝidino. Finiĝis ĉiuj sorĉoj kaj ili vivis longe kaj feliĉe, neniam forgesante siajn gepatrojn, kiujn ili ofte vizitadis.

Danca amuziĝo

Unu bienposedanto dungadis multajn fraŭlojn kaj fraŭlinojn por kamparaj laboroj. La mastro mem kaj lia edzino ĉiudimanĉe veturadis al la preĝejo por observi la Sanktan Meson, preĝi, tamen liaj junaj dungitoj malŝatis tion kaj ĉiam kontraŭgrumbladis, kiam la mastroj invitis ilin veturi al diservo.

– Ve, altrudas ili al ni sian preĝejon, – koleris la fraŭloj. – Estus pli bone, ke ni estu permesataj danci anstataŭ. Tio estus pli utila.

Unu dimanĉon, post kiam la mastroj elveturis en preĝejon, la dungitoj pripensis amuziĝi per dancado. Kunvenis fraŭlinoj kaj fraŭloj, alportis harmonikon kaj ekamuziĝis, eĉ ne pensinte, ke en la preĝejo estas certa tempo de diservo.

– Jen kiom da junularo venas al niaj dancoj! – subiteekkriis unu fraŭlino, rigardinte al la direkto de marĉaro, kie kreskis densaj arbustoj kaj etendiĝadis akvaj aperturoj. – Kaj vere ili estas ornamintaj sin per frakoj kaj ĉapeloj.

Ĉiuj kuris al la fenestroj por spekti la venantajn gastojn kaj ekvidis areton da viroj, paŝantaj al la domo.

– Ho, Jesuo! Ja ili estas dabloj! – ekkriis unu knabineto. – Rigardu, unu el ĉies piedo estas kapra hufo. Nun ni pereos!

La muziko ĉesis, ĉar neniu konis, kio estas farenda. Unu fraŭlo kaptinte rozarion ligis per li la pordon, Unu fraŭlino algluis sanktajn bildetojn al la fenestrojn, kaj en la fajrujo lumigis sanktigitan kandelon.

La frakvestitaj gastoj, provis malfermi la pordon, tamen ekkriinte forprenis siajn manojn kaj ekaerumis ilin, kvazaŭ ili estus dolore bruligitaj. Provis ili iri al la fenestroj, sed tuj ili kovris siajn okulojn permane, kvazaŭ ili estus serioze damaĝitaj. Jelpis kaj muĝis

la malbonuloj, tamen eniĝi nek tra la pordo, nek tra la fenestroj ili ne sukcesis. Ili ankaŭ provis grimpi al la fumtubo, esperante eniĝi tra ĝi, tamen ekflarinte la odoron de la sanktigita vaksa kandelo, ili retiriĝis.

– Kial, do, vi ne lasas nin internen, se vi invitis nin al la danca amuziĝo? – kriis ili per altaj kaj malaltaj voĉoj. – Ekaŭdinte dancmuzikon dum diservo, ni komprenis, ke ni ankaŭ estas atendataj.

Sed teruriĝintaj knabinoj kaj knaboj kaŭris en la anguloj, timante respondi aŭ aliri pli proksime al la fenestroj. Ne estas konata, eble kaptos la malbonulo kvazaŭ akcipitro malgrandan kokidon kaj forportos al la marĉaro.

Bruinye kaj kriinte por ioma tempo la malinvitintoj forlasis la bienon kaj retiris al la marĉaro. Tie ili senprokraste malaperis inter la arbustoj kaj akvaj aperturoj.

Kaj la fraŭloj, ankaŭ fraŭlinoj plu ne deziris aranĝi dancajn amuziĝojn dum diservoj.

Mi mem

En la draŝejo de unu terposedanto ekloĝis diabloj. Tie ili mastrumadis, draŝadis grenon kaj ne permesis homojn la draŝejon alproksimiĝi. Nepovante plu suferi la diablajn ŝercojn, la terposedanto prenis tason, metis pecon da plumbo en ĝin kaj irinte al la draŝejo metis ĝin sur la forno por ke la plumbo fandiĝu. Almenaŭ li aliris, tuj alkuris al li diablo kaj demandis:

– He, homo, kion vi faras ĉi-tie?

Tiu respondis:

– Mi preparas okulkuracilon.

La diablo eĉ pli multe interesiĝis:

– Homo, ĉu vi povus ankaŭ miajn okulojn kuraci?

– Kial ne? Kompreneble, mi povas, – respondis la homo, – vi nur devas obei miajn postulojn.

La diablo laŭ la homa ordono alportis du erpilojn kaj du pecojn da ŝnuro. Tiam la homo postulis ke li kuŝu sur la erpiloj kaj firme lin alligis.

– Kial vi alligis min al la erpiloj? – demandas la homon la diablo.

– Tio necesas, – tiu respondis.

– Nu, se vi estas tiel bona kuracisto, diru al mi vian nomon, – ne ĉesas esplorparoli la diablo.

– Mi nomiĝas „Mi Mem“, – respondis la homo kaj preninte la tason kun la fandiĝinta plump, elverŝis ĝin sur la diablajn okulojn. Ekblekinte la diablo kuregis el la draŝejo kaj brukuris en la inferon,

alkroĉiĝante per la erpiloj al diversaj objektoj kaj kaŭzante teruran bruegon. Tuj alkuris al li aliaj diabloj kaj ekdemandadis lin:

– He, kiu al vi tion faris?

– Mi mem! Mi mem! – kriegis la diablo, saltante en la infero. Ekaŭdinte, ke tion faris li mem, la diabloj nur mansvingis pro lia stulteco. Ekde tiam eĉ sola diablo ne kuraĝis viziti la draŝejon de la terposedanto.

Kiu ŝtelas, tiu ankaŭ mensogas

Iam unu komercisto aĉetis cent funtojn da fero kaj metis ĝin ĉe sia najbaro. Poste li forveturis pro gravaj aferoj kaj forestis tutan monaton. Kiam reveninte li iris al la najbaro por repreni la feron, la najbaro diras:

– Estimato, se mi ne estus vidinta per miaj propraj okuloj, mi tute ne kredus tion. Kiam vi postrestis la feron, post paro da tagoj mi iris por esplori la feron kaj mi trovis rimarkeble malpli da ĝi. Sekvontfoje eĉ pli malmulte... Post tio mi ekgardis ĝin kaj ekvidis aperintan el la kaverneto muson. Dum mia spektado ĝi forronĝis la tutan pecon da fero. Post kelkaj tagoj mi trovis nenion restintan.

La komercisto, persistante senduban mensogon, respondis nenion, sed pensis por si persone: „Nu, atendu, kara! Se vi tiel impertinente mensogas, mi same rekompencos“.

La najbaro havis filon. La komercisto kaptis lin kaj fermis lin en ia kaŝejo. Pasis unu tago, poste alia... La najbaro venis al la komercisto ĝemplendante, ke lia filo malaperis kaj neniam postsignoj de li estas troveblaj.

Jen tiam la komercisto diras:

– Do, hieraŭ mi vidis, ke paseroj kaptis vian filon kaj ien forportis.

La najbaro ege surpriziĝis:

– Estimato, kion vi parolas! Ĉu povas paseroj porti knabon?

– Sed, – respondis la komercisto, – se unu muso kapablis cent funtojn da fero forronĝi, kial paseroj ne povas knabon levi?

Komprenis la najbaro la komercistajn vortojn kaj lian pensadon.

– Iru kun mi, kara najbaro, mi redonos al vi la feron, kaj vi estu bona kaj redonu al mi mian filon.

Do redonis la najbaro feron al la komercisto, kaj tiu al li – la filon.

Leono, leporo, kolombo, sturno, formiko kaj reĝido

Iam reĝo havis unu filon. Kiam li plenkreskis kaj edukiĝis, la reĝo demandas lin:

– Kio vi deziras ekesti: ĉu pastro, ĉu militoficiro, ĉu vi min prizorgos en mia maljunaĝo?

La reĝido respondis:

– Mi vojaĝos por la mondon esplori.

La reĝo konsentis. Tiam la junulo dankis sian patron pro ĉio, kunprenis sabron kaj forveturis.

Post ioma tempo de sia vojaĝo survoje li ekvidis leonon, leporon, kolombon, sturnon kaj formikon pretiĝantajn por matenmanĝo. La animaloj ekpetis la reĝidon ke li prave disdonu al ili ilian nutraĵon. La reĝido konsentis kaj sabris po unu peco al ĉiu: por la leono plej multe por la leporo pli malmulte, por la kolombo kaj la sturno eĉ pli malmulte kaj al la formiko nur etan eron. Disdoninte ĉion, li daŭras sian vojaĝon kaj ĝuas sinsavon de morto, ĉar li ekpensis, ke la leono povis ataki kaj disŝiri lin.

La satiĝintaj bestoj ekparolis inter si:

– Tiu homo grandan favoron faris al ni, kaj ni eĉ ne dankis lin.

Ĉiuj konsentis kuratingi kaj danki lin. Ili ĉiuj ekkuris kaj ekflugis. La formiko konkludis, ke ĝi sola postrestos kaj petis la leporon, ke li portu ĝin sur sia vosto. Li konsentis. Tiam la koombo kaj la sturno leviĝis kaj ekflugis, la leono kaj la leporo ekkuris kaj la formiko kaŝiĝinta en la lepora vosto, veturis kune.

Ektimis ege la reĝido ekvidinte la alkurantajn bestojn kaj alflugantajn birdojn. Pro la timo li ne sukcesis eĉ solan paŝon fari. Li pensis, ke ilidezirs kapti lin pro la maljusta disdonado. Tamen ili ekdankis la reĝidon. La unua alpaŝis la leono kaj tiel ekparolis:

– Estas mi besto la plej forta, sed vi laŭbezone estos dekdu fojojn pli forta.

Tiam alproksimiĝis la leporo.

– Estas mi besto rapida, sed vi laŭbezone estos dekdu fojojn pli rapida.

La kolombo tiel parolis:

– Estas mi birdo rapidfluga, sed vi laŭbezone dekdu fojojn pli rapide flugos ol mi.

La sturno aldonis:

– Estas mi birdo ĉarma kaj ĉarme kantas, sed vi laŭbezone estos dekdu fojojn pli ĉarma kaj dekdu fojojn pli ĉarme vi kantos.

Finfine dankis ankaŭ la formiko:

– Estas mi animaleto malgranda, sed vi laŭbezone ekestos dekdu fojojn pli malgranda ol mi.

Dankinte sian bonfarinton, ili ĉiuj postrestis lin sola. Tiam la reĝido ekpensis : „Estus bone, ke mi ekestu leporo.“ Tuj li transformiĝis en leporon kaj ekposedis tian rapidecon, ke dum kelkaj horoj trakurs la tutan reĝlandon. Veninte al la ĉefurbo, en la reĝa kortego li transformiĝis en sturnon kaj ekkantis tiel ĉarme, ke la tuta kortego sonoris pro liaj kantoj.

Kaj tiu reĝo havis tri filinojn. Ili estis tiel similaj unu al alia je la vizaĝoj, alteco, kaj la vestaĵoj, ke eĉ ĉiuj korteganoj ne povis ilin interdistingi. La reĝidinoj ekaŭdinte la belegan kantadon, kuris al la ĝardeno por ekkoni, kia birdo kun la belega voĉo, neniam antaŭe

aŭdita, aperis en la reĝa ĝardeno. Ekvidinte la neviditan birdon, ili provis kapti ĝin.

La plej aĝa diras:

– Mi estas la plej aĝa reĝidino, do la birdo apartenas al mi.

La dua ne konsentis:

– Mi estas la meza, do mi devas kapti la birdon.

Kaj la plej junaĝa asertas:

– Mi estas plej juna, plej amata de patro, do la birdon kapti devas mi.

La birdo, aŭdante tion, ekpensis: „Se vi estas plej amata de la patro, mi cedos nome al vi.” Kaj ĝi permesis esti kaptita. La knabino kun grandega ĝojo portis la birdon en sian ĉambron, sidigia ĝin en la kaĝon kaj nutris ĝin nur per sukero kaj rosinoj. La birdo bekmanĝas la bongustaĵojn kaj kantas belegajn kantojn.

Dum la trankvilo de nokto la reĝido transformiĝis en la formikon, elkaĝiĝis, transformiĝis en la sturnon, alplankiĝis kaj ekestis homo. Tiutempe la reĝidino kuŝante en la lito, direktis siajn okulojn alten kaj ekvidis nekonatulon. Ŝi ege ektimiĝis kaj laŭte ekkriis. Ekaŭdinte la filinan kriadon la reĝo alkuris por ekvidi kio estas okazinta. Ekmovis, ekbrulis la tuta palaco kaj la reĝido rebirdiĝinta eksidis en la kaĝo. La reĝo rigore insultis la filinon kaj diris se ŝi rekaŭzu senbezonan bruon, ŝi estos serioze punigita. La birdo, sidante en la kaĝo ĉion ĉi bone aŭdis. Tuj post kiam la reĝo foriris, la birdo surplankiĝis kaj ree ekestis homo. La reĝidino ekvidis lin, sed ŝi nekuraĝiskrii, por ke alkurinta patro ne punigu ŝin. Kaj la reĝido diras al ŝi:

– Nenion timu. Mi estas la birdo, kiun vi hodiaŭ kaptis en la ĝardeno.

Li ekparolis pri sia deveno kaj konfesis, ke li ankaŭ estas reĝido. Li ankaŭ rakontis pri sia scipovo laŭbezzone transformiĝi en leonon, leporon, kolombon, sturnon aŭ formikon. La reĝidino konfesis, ke li plaĉas al ŝi, kaj ŝi volonte ekestus lia edzino. Poste ŝi rakontis, ke la reĝo eldonis ordonon, ke se iu sukcesos rekoni kaj pernome alvoki ĉiujn tri filinojn, dirante, kiu el ili estas la plej juna, mezaĝa kaj plej aĝa, tiu rajtos edziĝi al unu el la filinoj kaj ricevos duonon de la reĝlando.

Daŭre ŝi parolis:

– Vi devas provi sian feliĉon. Vi atentu, ke kiam ni estos kondukitaj al vi por rekono, rigardu al niaj manoj. Mi tenos enmane blankan tuketon, la plej aĝa – bluan kaj la meza – flavan. Tiam diru al la reĝo: „Ĉi-tiu estas la plej aĝa, tiu estas meza, kaj jen estas la plej juna.

Tiam li kolombiĝis ka forflugis el la kortego. Tage la belvestita kaj belaspekta reĝido venis al la reĝo. Dum ilia interparolo la reĝo diras: „Mi eldonis la ordonon, ke se iu rekonos, kiu el miaj filinoj estas la plej aĝa, kiu estas la meza, kaj kiu estas la plej juna, al tiu persono mi fordonos duonon de la reĝlando kaj unu el la filinoj“. La reĝido tuj konsentis solvi la taskon. Kiam la reĝidinoj estis kondukitaj, li laŭ iliaj manoj tuj rekonis, kiu el ili estis la plej aĝa, la meza kaj la plej juna. Tiam la reĝo fordonis al li la plej junan filinon por li edziĝi al ŝi kaj aranĝis belegan nuptofeston.

Post la nuptofesto la reĝidino ekvidis sur la edza mano oran ringon kun iaj leteroj sur ĝi. Ŝi ekpetis, ke li fordonu ĝin al ŝi ĉar ĝi tre plaĉas al ŝi. Sed li respondis jene:

– Karulino, vi devas koni, ke mi al neniuj povas fordoni la ringon. Se mi forfingrigus ĝin, mi tuj estusglutita de mara monstro, kiel estas profetita laŭ la dismetado de la steloj.

La reĝidino ne petis lin plu, tamen foje la reĝido lavante sin, metis ĝin sur la fenestrobreto kaj forgesis tion. Almenaŭ li foriris por la promeno ĉemare, la mara monstro kaptis lin kaj portis al sia

palaco. La reĝino ekvidis la edzan ringon sur la fenestrobreto, kaj neatendintee lian revenon, ĉion komprenis. Kun grandega ĉagreno pri la edzo, ŝi ekpensis, kiel ŝi povus trompi la monstron. Ŝi tuj faris ion similan al pomo, kiu brilis kiel la plej klara stelo. Dum la sunlevo ŝi iris al la maro kaj levis la pomon antaŭ la suno, por ke ĉiuj radioj reflektiĝu de ĝi. La pomo ekbrilis prilumigante ĉiujn profundaĵojn de la maro. Tuj la monstro leviĝis sur la maran surfacon kaj diris:

– Donu tiun pomon al mi. Mi kaj la reĝido povos ĝui ĝin.

– Bone, – respondis la reĝino, – sed antaŭe montru al mi la reĝidon, por ke mi vidu, ke li estas viva.

La marmonstro levis la reĝidon el la maro, sed tiom, ke nur lia kapo estis videbla.

– Ho, ne! – diris la reĝino. Levu lin el la akvo, ke liaj gamboj videblu.

Apenaŭ la monstro elakvigis la tutan reĝidan korpon, li transformiĝis en la kolombon kaj forflugis. Ekkoleregis la mara monstro kaj ekkriis:

– Pro la reĝina ruzeco kaj la reĝa sageco vi estos punigitaj. Ekde hodiaŭ la reĝino dum parolado konstante kraĉos per fajreroj. Ŝi povos esti savita nur per tiu, kiu estos dekduoble pli rapida ol leporo, kiu kapablos flugi dekduoble pli rapide ol kolombo kaj kiu kantos dekduoble pli bele ol sturno. Se tia persono aperus, li devus iri al la naŭa reĝlando. Tie sur la monto kuŝas leono, al kiu la reĝo de tiu lando ĉiutage liveras po dudek ŝafojn por manĝi. Se li konkeros la leonon kaj duonŝiros ĝin, elsaltos leporo, disŝirite la leporon, elflugos kolombo kaj el ĝi – sturno. El la sturno elfalos argenta kuglo. Se iu-ajn per tiu kuglo pafos en la reĝinon, ĉiuj sorĉaĵoj malaperos kaj ŝi resaniĝos.

Apenaŭ la reĝido ekkonis tion, li tuj transformiĝis en kolombon kaj forflugis en la naŭan reĝlandon. Li trovis la reĝon de tiu lando kaj demandis lin pri la leono. La reĝo diras al li:

– Se iu ajn mortigus la leonon, mi donus al li mil orajn monerojn.

La reĝido konsentis konkeri la leonon kaj tuj foriris al la monto, kie la leono loĝis. Tie li trovis paŝtistojn paŝtantajn la ŝafojn destinitajn por la leono formanĝi. La reĝido ordonis doni nenian ŝafon al la leono. La leono ne ricevante nutraĵon, unuataĝe ekmovigis la monton, duataĝe li tiom movigis ĝin, ke tiu disŝiriĝis, kaj triataĝe, li faligis la tutan monton kaj muĝante kuris eksteren. Tuj la reĝido transformiĝis en leonon kaj duondisŝiris lin. Tiu transformiĝis en leporon, sed la reĝido ankaŭ tiun dispecigis. La leporo transformiĝis en kolombon kaj la kolombo – en sturnon. Kiam la reĝido disŝiris ankaŭ sturnon el ĝi elflugis arĝenta kuglo.

La reĝido kunprenis la kuglon kaj, ricevinte la pagon pro la konkero de la leono, revenis en sian reĝlandon. Li renkontis la junan reĝinon kaj kiam ŝi ekparolis, ŝi ekkraĉis per fajreroj kvazaŭ trohejtigita forno. Ŝarginte la pafilon per la arĝenta kuglo li pafis en sian edzinon kaj tuj ĉiuj sorĉaĵoj malaperis. La reĝino reekestis same bela kaj bona, kia ŝi estis antaŭe.

La homo, vendinta tri feliĉojn al la reĝo

Foje iris homo al la reĝo kaj diras:

– La plej nobla reĝo, mi portis al vi tri feliĉojn por vendi. Eble vi aĉetos?

La ekintereresiĝinta reĝo demandis:

– Karulo, kiajn do feliĉojn vi deziras vendi?

– La unua feliĉo estas: ĉion faru saĝe, sed atentu pri la fino.

Tiam la reĝo demandas:

– Kiom vi deziras por ĉi-feliĉo?

– Centon da ormoneroj.

Tuj la reĝo ordonis ke cent moneroj estu kalkulitaj.

– Kaj kia estas la dua feliĉo?

– La dua feliĉo estas jena: ne devojiĝu for de vojo pro vojeto.

– Kaj kiom vi deziras por ĝi?

– Samtiom.

– Konsentite, – respondis la reĝo, – kaj kia estas la tria?

– Ne tranoktadu tie, kie la dommastrino estas juna, kaj la dommastro – maljuna.

– Kaj kiom vi petas por tiu-ĉi?

La homo same petis centon da ormoneroj.

La reĝo pagis kaj la homo foriris. Baldaŭ laŭ la reĝa atentigo ĉie en la palaco aperis signoj „Ĉion faru saĝe, sed atentu pri la fino.“

En la palaco ekzistis homoj, strebantaj al la morto de la reĝo. Ili subaĉetis la raziston, ke li buĉu la reĝon dum razado. Tamen foje, razante la reĝon li ekvidis sur la viŝtuko la noton „Ĉion faru saĝe, sed atentu pri la fino.“ Subite la razilo falis el la manoj de la razisto. La reĝo ekvidinte lin paliĝi, demandis:

– Kio okazis al vi? Kion vi ekvidis?

– La plej nobla reĝo, mi intencis buĉi vin, ĉar mi estis subaĉetita de viaj malamikoj. Ekvidinte la noton, mi pensis, kia estos mia fino, se mi tion plenumos. Tial la razilo falis el miaj manoj.

La reĝo, spertinte neniam viditan miraklon, tuj premiigis la raziston kaj punigis siajn malamikojn. Poste li ĉiame pensis pri la feliĉo, kiun li estis aĉetinta.

Post ioma tempo li devis veturi al la parlamento. Vidante, ke servistoj, serĉante la plej mallongan vojon, preterpasis la ĉefvojon kaj veturas laŭ mallarĝa vojeto, li demandis, kial ili faras tiel. La servistoj respondis:

– Ho, la plej nobla reĝo, tiel la distanncio estos pli proksima. Ni ĉiam tiel veturas.

– Ne, faru laŭ mia ordono: veturu laŭ la ĉefvojo.

La servistoj obeis.

Kiam ili atingis la veturcelon, ili sciigis, ke sur la vojeto ilin atendis rabistoj por ilin murdi. Ili konis, ke la reĝo ĉiam veturas laŭ la vojeto. Tamen, kiam li elektis la ĉefvojon ili sukcesis neniel atenci lin.

Foje li veturis en malproksiman urbon ka li devis tranokti en la palaco, kie la sinjoro estis maljuna kaj la sinjorino estis juna.

Sciiĝinte pri tio, li ordonis siajn servistojn trovi alian lokon, kvankam tiuj certigis lin, ke en la tuta urbo ne estas loko pli bona.

– Estu ĝi malbonega, sed nur ne tiu-ĉi, – firme respondis la reĝo kaj trovis alian palacon por tranoktejo. Lia tuta akompanantaro restis en la unua loko.

Nokte rabistoj, serĉante la reĝon, mortigis ĉiujn liajn akompanantojn, restintajn en la unua loko. Kaj la reĝo, tranoktinta en alia palaco postrestis viva kaj sana. La reĝo vidante tian Dian favoron, nomis je anĝelo la homon, vendintan al li la feliĉojn, kiuj trifoje savis lin de la morto.

Fabelo pri animaloj

Iam havis reĝo maljunan ĉevalon, maljunan katinon, maljunan hundon, maljunan viranseron kaj maljunan kokon. Kompreneble, dum ili estis junaj, ĉiuj estis bezonataj, sed kiam ili maljuniĝis, la reĝo tediĝis pri ili kaj li decidis ĉesi ilian nutradon, ĉar nenian utilon pro tio li havis. Do, subite la reĝo forpelis ilin el la kastelo. Iras la forpelitaj animaloj tra arbaro kaj ekvidas domon de lupoj. La lupoj ekvidis la vojaĝantojn kaj interkonsiliĝas:

– Ni regalu ilin bonege, kaj poste ni buĉos ilin.

Sed apenaŭ la venintoj iomete satiĝis, tuj ili ĉiu propravoĉe ekkantis, ekkriegis, ekbojis... Timiĝis la lupoj, por ke ĉasistoj neekaŭdu kaj restinte la gastojn, fuĝis el la dometo.

Noktiĝis kaj ĉiuj animaloj trovis tranoktejojn laŭ siaj kutimoj: la ĉevalo en la antaŭĉambro, la hundo malantaŭ la pordo, la katino en la forna cindrujo, la koko sursaltis la birdostangon kaj la viransero eksidis en ĉambra angulo. Tiel ili ekdormis en siaj elektitaj lokoj.

Kaj la lupoj rekonsciiĝintaj de sia timo komencis interkonsili:

– Unu el ni devas iri por esplori, kio en nia domo okazas.

La plej kuraĝa estis sendita por esplorado. Veninte al la domo, li ĉirkaŭrigardas, tamen nenion vidas en mallumo. Li pripensis fajrigi la fornon, por ke estu pli lume, kaj kliniĝinte ekblovis la cindron, esperante, ke tie estas postrestintaj braĝoj. La katino batis lin per sia piedo kaj apenaŭ ne elŝiris liajn okulojn. La lupo ekkuregis kaj en la antaŭĉambro trafis la ĉevalon, kiu fortege frapis lin per la hufo. Ekis grandega bruoj, ĉar la viranaso ekpinĉis liajn flankojn kaj la hundo ekmordis lian voston. La koko, sidanta sur la stango kriegis per tuta sia voĉo. La lupo apenaŭ viva fuĝis al siaj amikoj kaj tiel rakontis:

– Karuloj, ne iru al nia estinta domo, ĉar ĉiuj pereos: ĝi estas okupita de teruregaj rabistoj kaj mi apenaŭ viva postrestis. la virino ĉe la forno pikis miajn okulojn, ion kolere grumblante, kaj mian tutan nazon grategis. Aliu ekdraŝis miajn flankojn per draŝilo, kaj ankoraŭ unu, verŝajne kudristo, ektajlis mian felon. Ilia estro dumtempe kriegis, ke ili fordonu min al li...

Ektimiĝis la lupoj kaj decidis neniam plu viziti sian dometon. Kaj la ĉevalo, hundo, katino, viransero kaj koko ekloĝis kaj vivis tie feliĉe ĝis la fino de siaj tagoj.

Ne estu gapulo kaj vi estos riĉulo

Unu grafo havis tri filojn, kiuj vojaĝadis tra la mondo, serĉante mizerulojn por helpi ilin. Foje ili venis al urbo kaj ĉe ĝia pordego ili ekvidis tri virojn tordantajn ŝnurojn. Du el ili estis dece vestitaj kaj la tria estis vera ĉifonulo.

– Dio helpu vin, – diris la grafaj filoj kaj senprokraste demandis la ĉifonulon. – Diru al ni, kial vi estas tiel ĉifoniĝinta? Eble vi drinkaĉas kaj estas mallaboremulo?

– Mi estas nek diboĉulo, nek pigrulo, sed mi malmulte perlaboras kaj mi devas mian edzinon kaj infanojn vivteni, – respondis la ŝnurtordisto.

La fraŭloj interkonsiliĝis kaj donis al li cent ormonerojn. La mizerulo tiel ekĝojis pro la ricevita mono, ke li kuris hejmen, forgesinte eĉ danki la grafajn filojn. Kurante li pensas: „Kiam mi diros al la edzino, ke mi ricevis tiom da mono, ŝi ekdemandos min, el kie kaj pro kio. Ĝis mi rakontos ĉion detale, tio daŭros tre longan tempon. Estos pli taŭge, se mi kaŝos ĉion. Vespere, havante pli da libera tempo, mi ĉion eksplikos.

Alkurinte hejmen, li ligis la monon en ĉifonon kaj ŝovis ĝin en branujon, starantan en provizejo. La brano estis verŝita tien jam antaŭ longe kaj neniuj zorgis pri ĝi. Priordiginte ĉion, li rekuris al sia laboro. La edzino konis nenion pri la akirita trezoro.

Dume al la urbo veturis per azenveturilo iaj burleskuloj. Iliaj azenoj estis nutrigataj per brano, do ili ĉie ekserĉis ĝin, interesiĝante, kiu havas ĝin vendeblan.

La edzino, nekonigita pri la ormoneroj, verŝis la branon en ilian sakon, kaj ĝuis kelkajn ricevitaĵajn monerojn.

Vespere la edzo venis hejmen kaj la edzino surtabligis al li freŝan, ĵus bakitan panon. La edzo ekmanĝis kaj demandis:

– Diru, kie vi ricevis ĉi panon.

– Aĉetis ĉe bakisto.

– Kaj el kie vi ricevis monon?

Nun la virino rakontis, ke ŝi vendis al burleskuloj la branon, kiu staris verŝita en ujon jam tre longan tempon kaj estis tute senbezona. Kiam la edzo ekaŭdis pri la okazintaĵo, li preskaŭ svenis kaj ekkriis:

– Ho, kion vi faris! En ĝi estis cento da ormoneroj!

Sed la edzino ankaŭ plialtigis sian voĉon:

– Vi mensogas! Kie vi ricevis centon da ormoneroj? Eble vi nur ŝtelis el iu ajn. Vi parolas bagatelaĵojn nur por min riproĉi.

Sed la mizerulo pli kaj pli ploris, ĉagreniĝante pro la mono. Li estis tute malmanĝema kaj li iris por dormi malsata, pensante: „Kie mi nun trovos la burleskulojn? Kaj se mi eĉ trovos ilin, ili vere ne redonos la monon.

Vekiĝinte matene li iris la sia laboro de ŝnurtordado. Post unu jaro li ekvidis la samajn junajn sinjorojn, el kiuj li estis ricevinta cent ormonerojn. Hontiĝinta kaj dezirante eviti la rekonon, li surkovris sin per kanaboj, preparitaj por ŝpinado, kaj kaŭriĝinte silentis. Tamen la fraŭloj diris „Helpu al vi, Dio“, alproksimiĝis kaj rekonis lin.

– Karulo, ĉu ne al vi ni donis cent ormonerojn? Laŭ nia opinio, vi estas eĉ pli ĉifoniĝinta ol tiam. Kien vi metis la monon?

La mizerulo surgenuiĝis antaŭ ili, rakontante pri sia malfeliĉo kaj la perdo de la mono. La junsinjoroj ne estis certaj ĉu ili devas kredi lin aŭ ne, sed li daŭre ploris, parolante:

– Mi diras nuran veron pri mia malfeliĉo...

Tiam la filoj de la grafo elpoŝumis la monujon kaj nombris por li ducent arĝentaj moneroj.

– Ni klarigis por si, ke vi neniam havis monon pro netaŭga uzado de ĝi. Nun estu atentema pri ĝia kaŝado. Plej urĝe sciigu vian edzinon pri la ricevo de ducent arĝentmoneroj.

La mizerulo kuris hejmen kaj montris la monon al la edzino. Nur nun ŝi kredis, ke la edzo estis ricevinta donacon ankaŭ pasintjare.

– Ni prenu la arĝentajn monerojn kaj ŝanĝu ilin kontraŭ oraj. Ormoneroj estas malpli spackonsumaj, do estos pli facile kaŝi ilin.

Ili do faris tiel. Ili ŝanĝis la arĝenton kontraŭ oro, kaŝis ĝin en ĉapelon kaj surkapigis ĝin. Ĝuste tiam ili ekvidis navigantan en la urbon ŝipon kun la kargo de kanabo. Tuj ili kuris en la ŝipon kun la intenco aĉeti la kanabon kaj bone profiti. Tuj post ilia enŝipiĝo subite ekblovis forta ventego, forŝiris kaj ĵetis la ĉapelon en akvon. La mono ŝutiĝis en la maron kaj rapidege sinkis. La kompatinda ŝnurfaristo svenis kaj rekonsciiĝinte, plena da bedaŭro kaj honto iris hejmen. Ambaŭ longe ploris, sed nenio estis farenda.

Sen ia deziro rekomenci la antaŭan laboron, li faris feran trifingran forkegon kaj iris trans la urbo por tiri likenon el la maro. Li timis, ke la junaj sinjoroj venu al la loko, kie li tondadis ŝnurojn kaj ekvidu lin same ĉifoniĝintan.

Dum li laboris, li ekvidis la junsinjorojn tute proksime. Li deziris fuĝi en kampojn, tamen jam estis malfrue. Li kaŭris sin, tamen la grafaj filoj rekonis lin.

– Dio, helpu! Ĉu ne al vi ni donis ducent arĝentmonerojn? Kio okazis, ke vi estas sama malriĉulo, kiel antaŭe? Ĉu vere neniuj povas helpi vin?

La mizerulo prirakontis, kiel la mono pereis. Aŭdinte ĉion, la junsinjoroj iris for kaj subite sur la mara bordo ili ekvidis pecegon da plumbo. Ili haltis kaj ekparolis:

– Donu ni al li ĉi pecegon da plumbo. Se li ne bonvivis per oro kaj arĝento, eble plumbo estos taŭga al li.

Ili tuj invitis la mizerulon. Kiam li alkuris, ili diris:

– Jen pecego da plumbo por vi. Eble ĝi helpas vivi al vi pli bone, ol oro kaj arĝento.

Li dankis al la junsinjoroj kaj, preninte la plumbon, iris hejmen. Li estis tre kontenta pro la donaco. Survoje li renkontis fiŝiston, aĉetintan novan reton, sed li mankis la retajn peziletojn. Ili interkonsentis, ke la mizerulo donos al la fiŝisto plumbon por fari la peziletojn, kaj tiu donos al li la unuan fiŝgajnon. Konsentite kaj farite. La ampleksega unua gajno konsistis el grandegaj fiŝoj, do vendinte ilin, la mizerulo ege monprofitis. Tiamaniere li bonege ekvivtenis sen oro aŭ arĝento, nur pro la ordinara peco de plumbo.

Estus bonege, se tio efektiviĝus

Apud ia riĉa vilaĝano loĝis mizerulo sen iaj ajn posedaĵoj. Kiam li iradis por peti ion de la riĉulo aŭ aliaj najbaroj, ĉiuj mokadis lin kaj nenion donadis. Finfine , nepripensante, kio estas farenda, li iris al la kruco kaj preĝis:

– Sinjoro Dio, donu al mi pli bonan sorton, ĉar mi ne konas, kiel mi estontece sin vivtenos.

Tiel li preĝis la unuan, la duan kaj la trian nokton, sed vane. Finfine la lastan nokton li ekaŭdis la Dian parolon:

– Estu preta, hodiaŭ mi vin vizitos. La ĝojigita mizerulo kuris hejmen kaj ekpretiĝis. Li balais ĉiujn angulojn, priordigis la dominternon , el siaj lastaj provizoj kuiris mizeran matenmanĝon kaj atendas la honoran gaston. Jen li vidas venantan ĉifoniĝintan almozulon.

– Karulo, eble vi povus doni al mi ion por manĝi.

– Ni esperas pri vizito de gasto, – respondis la mizerulo kaj lia edzino. – Ni kuiris ion por la tagmanĝo, do sufiĉos ankaŭ por vi. Eble la Sinjoro zorgos pri tio.

Satiĝinte, la almozulo petis pri grenomezurilo.

– Kie mi povas ĝin ricevi? – respondis la mizerulo. – Mi ne havas.

– Iru do al la riĉulo kaj portu de li. Se li demandos, kial vi bezonas ĝin, diru al li, ke vi monon mezuros.

Ĉio okazis, kiel dirite. Kiam la mizerulo petis pri lamezurilo, la riĉulo tuj demandis, kion tiu intencas mezuri.

– Mi ricevis monon, do mi devas ĝin mezuri, – respondis la mizerulo, kiel la almozulo estis ordoninta.

La riĉulo nur ekridis, tamen donis la mezurilon kaj pensis por si mem: “Kie vi ricevos grenon aŭ monon, eble nur grenŝelaĉojn.

La mizerulo portis la mezurilon hejmen, ekskuis sian sakon kaj tuj plenigis la mezurilon per mono. Poste el alia sako li plenigis alian mezurilon kaj el la tria – trian. Forirante li diris:

– Antaŭ redonante la mezurilon al la riĉulo, ŝovu sub la mezurilingoj kelkajn monerojn, por ke li vidu, kial vi bezonis la mezurilon. Kaj se li demandos, rakontu ĉion.

Li do faris, kiel dirite. Li portis la mezurilon kun kelkaj moneroj sub la ringoj. La riĉulo ekvidis, ke la mizerulo vere mezuris monon kaj tuj iĝis tre afabla al la mizerulo. Li regalis lin per bongustaj manĝaĵoj kaj bonkvalita vino. Dum regalado li esplordemandis lin:

– Diru, mia bona najbaraĉjo, kie vi ricevis tiom da mono.

La mizerulo ĉion rakontis:

– Vi konas, ke mi estis ege povriĝinta kaj mi nenion havis. Mi iris al la kruco kaj tri noktojn preĝis al Sinjoro Dio, ke li min helpu. Dio ekaŭdis miajn preĝojn, venis al mi, portinte al mi grandajn riĉojn.

La riĉulo ekrevis pri la mono kaj urĝe iris al la kruco. Li preĝas unu tagon, sekvan tagon... La trian nokton li ekaŭdis:

– Pretiĝu, mi venos al vi.

Kuris la riĉulo hejmen kaj urĝe ekordigis ĉion. Li ĉion purigis kaj la vojetojn li kovris per belaj paperoj. Atendante li ekvidis venantan maljunan almozuleton, irantan sur liaj paperoj .

Ekkoleris la riĉulo, kuris al la almozulo kaj ekbatis lin kriegante:

– Ĉu pro vi mi tiel bele vojetojn surkovris? Vi ne estas inda paŝadi sur ĉi paperoj!

La batita almozulo turnis sin kaj foriris. Vane la riĉulo atendis por Dio alveni. Sekvontan nokton li rekuris al la kruco kaj repreĝis por ricevi monon. Dum sia petado li ekaŭdis:

– Pentofaru, avidulo! Vi ja batis ne almozulon, sed Sinjoron Dion mem. Vi batis min per la samaj manoj, kiujn vi nune kun espero levas al mi. Vi ricevos nenion, sed kiam vi venos al via hejmo plena da aroganteco, vi trovos nur cindron.

Turnis la timiĝinta riĉulo en la direkton de sia domo kaj ekvidis ke ĝi estis ĉirkaŭita per flamoj. Pro sia avideco li perdis eĉ tion, kion ĝisnune posedis.

Peltmantelo

Vivis iam homo, kies edzino mortis. Li havis maljunan patrino, sed ŝi jam ne estis taŭga laborulino, do vole-nevole li devis trovi novan edzinon. Alveturis la nova dommastrino kune kun sia patrino. Ekvidinte ankoraŭ unu maljunulinon, ŝi tre ekkoleris kaj ekriproĉis la edzon:

– Tuj pelu ŝin for el la hejmo, por ke eĉ ŝiaodoro ĉi tie nepostrestu. Veturigu ŝin en la arbaron. Lupoj tie ŝin disŝiradu.

La edzo pensas iel, pensas aliel, sed vidas ke li ne sukcesos la edzinon kontraŭe pripensigi: sidigis la patrino en la sledon kaj veturis al la arbaro. Estis terura malvarmo, eĉ lignaj bariloj pro malvarmego krakis. La virineto, maldike vestiĝinta, per dentoj klakas. Kvankam la terposedanto tre kompatis sian patrino, li sidigis ŝin sub piceo kaj karginte la sledon per hejtlignaĵo, veturis hejmen.

Sidas la maljunulineto sub la piceo kaj veas pro granda malvarmo. Jen ŝi vidas alproksimiĝantan altan belan sinjoreton, vestiĝintan per eleganta peltmantelo, kun la refaldoj per oro ĉirkaŭkudritaj kaj kun diamantoj anstataŭ la butonoj. Venis la sinjoreto al la virineto kaj diras:

– Malvarmas, avineto, malvarmas!

– Malvarmas, sinjoreto, malvarmas! – respondas la virineto per lipoj tremantaj.

La sinjoreto turnis sin kaj foriris. Kaj tiu ĉi sinjoreto estis vintro. Post unu horo li revenis kaj reparolas:

– Malvarmas, avineto, malvarmas!

– Malvarmas, sinjoreto, malvarmas! – pene ĝemas la maljunulineto.

La sinjoreto malaperas, kaj post unu horo li ree estas ĉi tie.

– Malvarmas, avineto, malvarmas!

– Malvarmas, sinjoreto, malvarmas! – respondas la virineto, apenaŭ lipojn movante.

La sinjoreto deŝultrigis sian peltmantelon, ĵetis ĝin sur la maljunulino, kovrante ŝin de kapo ĝis la piedoj. La virineto tuj varmiĝis kaj ekkantis. Kaj tia gaja ŝi ekestis, ke kanto sekvis kanton kaj ŝi ne povis halti.

Post tri tagoj alveturis la filo por spekti, ĉu lia patrino estas ankoraŭ viva, aŭ mortglaciigita pro malvarmo. Rigardas li kaj vidas – la patrino kantas, kovrita per eleganta peltmantelo kun la butonoj, brilantaj en la sunlumo. Ekĝojis la filo, vidante patrinon vivan kaj tuj veturigis ŝin hejmen. Morgaŭe li vendis la peltmantelon al komercisto kontraŭ kelkmil ormoneroj.

Ekvidis la bofilino, ke maljunulino postrestis viva, nedamaĝita de severa malvarmo. Ŝi eĉ nigriĝis pro kolero kaj envio. Tuj ŝi kuris al la edzo kun nova propono.

– Veturigu al la arbaro ankaŭ mian patrinon. Hodiaŭ. Tuj! Ĉu ŝi ne egalas al la via? Portu la sinjoreto peltmantelon ankaŭ al ŝi.

Ŝi iritis lin ĝis kiam li jungis la ĉevalon al la sledo, sidigis en ĝin la bopatrino kaj elveturis al la arbaro. Kompreneble, ŝi estis vindita en peltmantelon, feltbotigita, ŝia kapo estis ĉirkaŭtukita kaj sur la manoj ŝi havis dikajn gantojn.

La patrino de la edzino estis lasita sub piceo kaj la homo mem kargis la sledon per brulmaterialoj kaj turnis sin hejmen.

Sidas la virino atendente la alportotan peltmantelon. La malvarmo pli kaj pli pinĉadis ŝian nazon kaj flankojn.

Subite, tute neatendite venas longnaza virineto, mem tremanta pro malvarmo kaj diras:

– – Malvarmas, avineto, malvarmas!

– Tio ne estas via afero. Iru laŭ sia vojo, – respondĵetis la virino.

Ŝi foriris, sed proksimume post unu horo reaperas.

– Malvarmas, avineto, malvarmas!

– Iru for! – tremante ekkriis la sidantino sub la piceo. – Kien la diablo forportis tiun sinjoreton, ke li tiom longe prokrastas la alportadon de la peltmantelo. Mi jam tute malvarmiĝis kaj li forestas. Se vi renkontos la sinjoreton, diru, ke li pli urĝe sin trenu.

Post ankoraŭ unu horo la longnazulino ree estas ĉi tie,

– Malvarmas, avineto, malvarmas!

Sed la maljunulino nur unu vorton tradentumis. La peltmantelo pro malvarmo iĝis pecego de glacio. Kiam la terposedanto kun sia edzino venis por rehejmigi ŝin, esperante ekvidi la elegantan peltmantelon, ne pli malbonan ol la donacitan al la patrino de la edzo, ili ekvidis nur glaciigintan neĝdunon kaj nenion plu.

La sagaca filinjo

En unu vilaĝo homo havis filinon, kiu estis tre sagaca. Ekkonis sinjoro pri tio kaj, invitinte la homon, demandas:

– Diru, ĉu vere via filino estas tre prudenta?

– Mi ne scias, sinjorĉjo, – respondis la homo, – tamen ŝi ĉiam trovas solvon en ĉiu plej komplika laboro.

– Aha, – diris la sinjoro, – via filino estas tre ruza, kaj estas dirite, ke en ĉiu aĝo devas kreski la saĝo, do vi ankaŭ estas same ruza. Vi vidas pajlogarbon sur la korto. Prenu kaj defeligu ĝin tute.

Rigardis la homo, balancis sian kapon kaj ne konas, kio estas farenda. Kiel ĝi estu defeligita, se nenia felo estas videbla. Veninte hejmen, li rakontas al sia filino pri la laboro donita de la sinjoro. La filino nur ekridis kaj diras:

– Paĉjo, iru al la sinjoro kaj petu, ke li montru, kie estas la umbiliko de la garbo, ĉar la defeligado de ĉiu besteto komenciĝas de la umbiliko.

Iris la homo al la sinjoro kaj postulas, kion la filino ordonis al li. Vidas la sinjoro, ke la vilaĝano ne estas rikanebla, do li demandas:

– Kiu instruis vin?

– Ja mia filino.

– Nu, se ŝi estas tia ruza, teksu ŝi ĉemizon al mi, – prenis li malgrandan ligaĵeton da linoj kaj donis al la homo.

Portis la homo la ligaĵeton al la filino kaj sciigis ŝin pri la sinjora deziro.

Tiam la filino tiris du vergetojn el la balailo, donis al la patro kaj diras:

– Portu, paĉjo, la vergetojn al la sinjoro, por ke li konstruu el ili ŝpinilon kaj teksilon por teksu tolon el la linoj.

La homo portis la vergetojn al la sinjoro kaj transdonis la filinajn vortojn al li.

– Aha, – surpriziĝis la sinjoro, – verŝajne homoj rakontadis veron pri via filino. Diru al ŝi, ke ŝi venu al mi nenuda kaj ne vestiĝinta, ne piedire, kaj ne rajdante kaj haltu ŝi ne ekstere, kaj ne interne. Se ŝi sukcesos tion fari, mi edziĝos al ŝi, ĉar vere pli ruza knabino ne ekzistas.

Veninte hejmen, la patro rediris la sinjorajn vortojn.

Tiam la filino ĉirkaŭvolvis sin per reto kaj iĝis ne nuda kaj ne vestiĝinta, ĉirkaŭgambigis kapron, por ke ĉiuj vidu, ke ŝi venis ne piedire kaj ne rajdante kaj, veninte al la sinjoro, ŝi haltis sur la sojlo, estante do ne interne kaj ne ekstere.

Vidas la sinjoro, ke ne sukcesos la ruzulinon superi, do li edzinigis ŝin al si. Li konis, ke pli sagacan edzinon li ne trovos.

Homo estas la plej forta

Iam leonoj konversaciis:

– Ĉu ekzistas ia estaĵo pli forta ol ni?

La kulo aŭdis ilian interparolon kaj diris:

– Certe jes. Vi ne egalas eĉ al unu mano de homo. Mi vere tion scias.

La leonoj demandas:

– Kiel vi tion ekkonis? Rakontu ankaŭ al ni.

La kulo ekparolis:

– Iam ni trovis dormantan homon. Naŭ el ni ektrinkis lian sangon. Kiam tiu tuŝis nin per unu mano – ok el niaj viroj estis preme mortigitaj. Nur mi sola sukcesis postresti. Li estus ankaŭ min mortpremita, tamen mi estis per lia mano neatingebla.

Unu leono ekpetis lin:

– Karulo, iru ni kaj vi montru homon al mi. Kiel do li aspektas?

– Estu via volo. Iru ni.

Kondukinte la leonon al ĉevoja salikaro, li starigis lin tie.

– Homo devas veni ĉi tien.

Atendas ili ambaŭ, sed nenio venas. Subite, tute neatendite, alkuras paŝtisteto, per bastoneto sin subtenanta.

– Eble tio jam estas homo? – demandas la leono.

– Ne, li estas nur estonta homo, – respondis la kulo.

Poste aperis iranta laŭ la vojo virino.

– Kaj kio estas tio? Ĉu ne homo?

– He, ne nomu ŝin homo. Ŝi estas nur virino.

La leono senpacience atendas la homon por lukti kun li. Ekvidis li almozulon, apogantan sin per du bastonoj.

– Tiu jam estas vera homo, ĉu? – demandas la leono.

– Li estis homo, sed nune jam ne.

Tiutempe aperis rajdanta soldato kun sabro kaj pistoloj malantaŭ la rimeno.

– Atentu nun, – ekkriis la kulo. – Ĉi tie estas vera homo, kun kiu vi povos lukti.

La leono, etendinte la ungojn, saltis sur la homon el la salikaro. Tiu preninte pistolon el la sub rimeno, pafis al la leono kaj trafis lian okulon. Tamen la leono, returninte sin, reatakis la homon, kiu elpafis lian duan okulon per alia pistolo. Kiam la leono eĉ tiam ne deziris retreti, la homo eksabradis lin.

La leono fuĝis for kaj, reveninte al la arbaro, ekrakontis al siaj kunuloj:

– Mi neniam pensis, ke homo povas esti tia energia kaj forta. Preĝu, ke vi neniam renkontu homon. La homo venkis min ŝercante, kaj se li estus luktinta per sia tuta potenco, mi ne estus postrestinta viva. Unufoje li tuskraĉis kaj elbatis unu mian okulon, refoje kraĉis – la alia okulo malaperis. Poste li ĵetis sin al mi kaj ekbatadis min per unu fingro, sed la batado estis tiel terura, ke ĉiu bato tranĉis mian haŭtonĝis sango. Ĉu ni povas kompari sin al li?

Do, tial homo ekestis la plej forta kaj la plej sagaca inter ĉiuj estaĵoj.

La ruza Petro

Estis iam terposedanto kiu ŝatis friponi ĉiujn. Estis nek unu dungito, al kiu li ne estus friponinta salajron. Onidiroj pri la friponulo disiĝis vaste kaj neniu deziris dungiĝi al li kiel laboristo. Tiam venis al li unu fraŭleto, nomita Petro, kaj diras:

– Ĉu vi ne dezirus dungi min por la tuta jaro?

La terposedanto respondis:

– Karulo, mi ĝuste nun serĉas bonan laboriston. Vi nur diru, kian salajron vi deziras.

– Mi deziras nenian salajron, – respondis la fraŭlo, – nur post la jaro, forlasante la laboron, mi donos fingrofrapon al vian nazon kaj ni estos kvitaj.

La terposedanto pensis, ke unu fingrofrapo ne estas teruraĵo. Ja li mem ofte fingrofrapadis sian nazon.

Nu, la terposedanto ekpemis la dungiton al diversajn laborojn. Dum semajntagoj li devis fari diversajn laborojn kaj dum festotagoj – paŝti animalojn. Dum la unua dimanĉo li forpelis la brutojn kaj vidas, ke unu bovo malpacienciĝas, kuradas ĉiudirekte kaj strebas sin al la grenkampo. La fraŭlo saltis al li, donis al li unu fingrofrapon kaj tiu subite falegis kaj kuŝas morta. Ekvidis tion la mastro kaj lia hararo ekstaris pro timo.

– La samo atendas min, – murmuris li kaj kuregis al la sinjoro por plendi.

– Sinjoro, mi ne scias, kio estas farenda. Mi dungis ian fraŭlon, kiu deziras nenian salajron, nur doni unu fingrofrapon en mian nazon. Sed hodiaŭ mi vidis kiel pro lia fingrofrapo, bovo suprenlevis la gambojn kaj subite mortis. Do, kio nun estas por mi farenda?

– Veninte hejmen, diru, ke vespere li iru gardi mian avenkampon. Ursoj al kutimiĝis ĝin frekventi. Ekvidinte vian fraŭlon, ili tuj lin disŝiros.

La ekĝojinta terposedanto venis hejmen kaj, ameme modifinte sian voĉon, diras:

– Kara Peĉjo, iru ĉi-nokte por gardi la avenkampon. Iaj ĉevalinoj al kutimiĝis frekventi ĝin kaj manĝi la avenojn. Kaptu kaj konduku ilin hejmen.

La fraŭlo tuj kunprenis bridojn kaj iris por gardado. La mastro nur kuntiradas la manojn pro ĝojo: “Honorigita estu, Dio. Ursoj ĝuste disŝiros lin.”

La fraŭlo, atinginte la kampon vidas, ke du ursoj per piedegoj viŝas la avenojn kaj manĝegas la grenojn. Tuj li kaptis ilin je la koloj, bridumis, kondukis ambaŭ hejmen kaj ligis ilin al muelŝtonoj. Li mem iris al la provizĉambro, ekkuŝis ĉe la forno kaj dormas. Ekaŭdis la terposedanto la ronkadon de Petro, do vekinte lin, diras:

– Ha, Petro! Mi ja sendis vin por gardi la avenojn, kaj vi kuŝas!

– Ja mi kondukis hejmen ies du ĉevalinojn, – respondis Petro oscedante.

– Kie vi lokigis ilin?

– Ja mi ligis ilin al muelŝtonoj.

La terposedanto lumigis kandelon kaj iris por sciiĝi. Jen li vidas, ke du ursoj, alligitaj al muelŝtonoj, muĝetas. Li ektimis eĉ pli multe kaj urĝege rekuris al la sinjoro.

– Sinjoro, bonvolu helpi min. La fraŭlo kaptis du ursojn kaj fermis ilin en la provizejon. Kion mi nun faros?

La sinjoro pensis, pensis kaj diras:

– En la kampofino de mia bieno kreskas fortika kverko. Ĝi estas sorĉita kaj neniuj kapablas forhaki ĝin. Sendu vian dungiton, por ke ki forhaku la kverkon, dispecigu kaj metu ĝin en amason. Nu, mi vidos, ĉu li sukcesos tion fari.

La sinjoro konis, ke en la kverko loĝis diablo kaj neniuj estis permesita proksimiĝi al ĝi. Li pensis, ke la fraŭlo, venkinte la ursojn, certe ne konkeros la diablaron.

Hejme la mastro diras:

– Iru, Peĉjo, kaj forhaku tiun kverketon de la bieno. Vi devas prepari plenan veturilon da brulligno ĝis la mateno. Iru ĉi-vespere kaj ĉion priordigu.

Prenis la fraŭlo hakilon kaj iris al la kverko. Hak, hak – kaj la kverko kuŝas surgrundigita. Ek– atakis lin la diablaron, intencante forpeli lin de sia loĝejo. Sed la fraŭlo kaptis lin je la kornoj, kondukis lin al la provizejo kaj ligis al la muelŝtonoj. Poste li dishakis la kverkon, metis la lignon en amason kaj, veninte hejmen, kuŝis ĉe la forno por dormi. Ekvidis lin la majstro kaj diras:

– Kial vi ne iris, kien sendita?

– Mi estis tien. Mi forhakis la kverkon, preparis la brullignon kaj metis ĝin en amason.

– Kaj ĉu vi ne vidis arbaranon tie?

– Vidis mi ian monstron, kiu deziris malpermesi al mi la kverkon forhaki. Sed mi venigis lin provizejon kaj ligis lin al la muelŝtonojn.

La mastro kuris por esplori kaj, ekvidinte la diableton, apenaŭ mortis pro timo. Tuj li kuris al la sinjoro por konsilo.

– La plej nobla sinjoro! Kio estas farenda? Ja li altiris diablon kaj sen iaj penoj ligis lin al la muelŝtonoj.

La sinjoro longe pensis kaj finfine diris:

– Sendu lin al la urbo, el kiu neniu viva estas reveninta. Tie estas multego da rabistoj, kiuj rabas kaj mortigas ĉiujn vojaĝantojn. Mi enmanigos al li leteron por la estro de la rabistoj kaj tiu certe scios, kio estas farenda.

La mastro portis la leteron de la sinjoro kaj enmanigas ĝin al sia dungito:

– Peĉjo, la sinjoro sendas vin al la urbo, por ke vi portu de unu homo lian ŝuldon. Jen estas la letero por la enŝuldinto. Diru, ĉu vi piediros aŭ ĉevalrajdos.

– Mi nek iros, nek rajdos, sed veturos, – respondis Petro. – Nur bonvolu doni al mi garbon da kanaboj kaj bareleton da peĉo.

La terposedanto tuj portis al li la petatajn aĵojn. Tiam li donis la peĉon kaj kanabon al la diablo, ordoninte, ke li plektu vipon. Poste li jungis ambaŭ ursojn al sledo, sidigis la diablon en la lokon de la veturigisto, kaj li mem, kvazaŭ vera sinjoro sidiĝis malantaŭe kaj forveturis.

Veturinte al la urbo, li ordonis al la diablo klaki la vipon. Kiam li ekkklakis, la fenestroj de la domoj ekstremis. Kunkuris ĉiuj loĝantoj de la urbo rigardi, kiu estas la veturigisto, pro kies vipklakado eĉ domaj fenestroj tremas. Rigardas ili, ke estas veturinta ia sinjoro, kun du ursoj jungigitaj, kaj en la lokon de veturigisto, diablo sidigita. Ekvidinte tion, ili demandas:

– Kion vi bezonas, la altega sinjoro?

– Jen mi havas dokumenton de sia sinjoro, atestantan, ke vi ŝuldas al li tricent ormonerojn.

La urbanoj ekkriegis:

– Vi ne pravas, ne pravas! Ni nenion ŝuldas al via sinjoro!

Tiam la fraŭlo diras al la diablo:

– Nu, klaku la vipon!

Kiam la diablo ekklakis per vipo, ĉiuj vitroj de la fenestroj dispeciĝis. La timiĝintaj urbanoj kriis:

– Ĉesu, sinjorĉjo, ĉesu! Ni ĉion redonos!

Tuj ili kolektis tricent ormonerojn, por ke li veturigu ilin al sia sinjoro.

La fraŭlo prenis la monon kaj veturinte hejmen, donis ilin al sia mastro, dirante:

– Portu ĉi-monon al la sinjoru kaj donu al li. Kaj vi mem iru al la preĝejo por fari konfeson, ĉar jam proksimiĝas la fino de mia dungigo. Vi bonege konas nian kontrakton – unu fingrofrapo. Sed mi dubas, ke vi ĝin postvivis.

Aŭdante ĉi-vortojn de Petro, la terposedanto komprenis, ke Dio lin punas pro malvirtoj, do li surgenuiĝis antaŭ la fraŭlo, petegante:

– Karega Peĉjo, prenu mian tutan bienon, nur lasu min vivan.

Vidante lian grandan malfieriĝon, la fraŭlo akceptis la mastran bienon, kaj vendinte ĝin, rekompencis ĉiujn, kiujn la mastro estis molestinta. Poste li subite malaperis kaj neniu lin plu vidis.

Tri korakoj

Vivis iam virino, kiu havis ununuran filon, kiun ŝi tre dorlotis, nenion domaĝante por li. La infano kreskis granda memamanto kaj avidulo.

Kiam li atingis dek ses jarojn, lia patrino subite blindiĝis. Ŝi ne kapablis zorgi pri si mem, nek perlabori la ĉiutagan panon por la filo. Mizero kaj malsato frapis al la pordo de ilia loĝejo, ili ofte mankis panon kaj pri pli bongustaj pecetoj de manĝaĵo estis eĉ ne pensebla. Finfine, kiam ĉio elĉerpiĝis, ili devis iri por almozpeti.

La filo kondukadas sian blindan patrinon tra vilaĝoj kaj malbenas sian sorton. Kial li devas manĝi nur nigran panon kaj esperi pri nenio pli bona; krome estas ĉi patrino ne kapablanta ne nur ion ajn perlabori, sed eĉ sian vojon trovi.

Unufoje ekkoleris la filo, vagante kun la patrino, do li kondukis ŝin al arbaro, forlasis sub granda kverko kaj mem forkuris kvazaŭ leporo al la vilaĝo. Li ĝojis forĵetinte sian blindan patrinon kaj tute ne zorgis pri ŝia destino en la arbaro.

La patrino, forlasita sola sub la kverko, sidiĝis sur la herbaron kaj ekploris. Ŝi ploris, ploris ĝis tediĝinta ŝi ekdormis.

Venis la nokto kaj al la kverko alflugis tri korakoj. Ili ekkakis kaj komencis interparoli per homaj voĉoj. La patrino, aŭdinte homajn voĉojn, vekiĝis kaj ekaŭskultis.

– Fratoj, – parolis la unua korako, – mi alflugis el granda urbo, kie loĝas nia reĝo. Granda malfeliĉo trafis la urbon: malaperis la akvo de ĉiuj fontoj kaj la rivero, fluanta meze de la urbo estas absolute seka. Homoj estas tre malĝojaj kaj fuĝas el la urbo, postrestinte siajn hejmojn, kampojn kaj ĝardenojn. Se ili scius, ke la granda ŝtono en la mezo de la urba placo devus esti levita kaj tiam ekŝpruciĝus la fonto de malvarma akvo, kiu plenigus la fluantan tra la urbo

riveron. Sed ili ne scias tion kaj neniam ekscios, ĉar mi tute ne emas malkovri la sekreton al ili.

– Fratoj, – reparolis la dua korako, – malfeliĉo eĉ pli granda trafis la familion de la reĝo. La reĝino ekmalsanis kaj la sanigistoj de la tuta reĝlando ne sukcesas diagnozi ŝian malsanon. Ŝi baldaŭ mortos, ĉar neniuj sanigiloj efikas. En la loko, kie staras ŝia lito eklokiĝis venena rano, kiesodoro turmentas la reĝinon. Tamen neniu scias pri tio kaj neniu ekscios, ĉar mi ne emas tion elsekretigi.

– Fratoj, – kraketis la tria korako, – se blinduloj konus, ke la roso, falanta de sur ĉi-kverko, havas miraklan forton kaj restarigas videblecon. Sed ili tion ne scias, neniam ekscios kaj mi tion ne diros.

Konversaciinte por ioma plua tempo, la korakoj svingis per la flugiloj, leviĝis kaj flugis for.

Baldaŭ komencis sunleviĝo kaj de sur kverkaj folioj ekfalas rosgutoj, per kiuj la mizerulino humidigis siajn blindajn okulojn. Okazis tio, pri kio estis korakoj parolintaj: la virino ekvidis la levantan sunon, la fortikan kverkon kaj la verdan herbejon sub ĝi. Ŝiaj okuloj revidis la belan mondon.

La virino preĝis kaj dankis Dion pro lia favoro kaj, nenion atendante, iris al la urbo. Tie ŝi petis esti kondukita al la reĝino, por ke ŝi povu kuraci ŝian gravan malsanon. Komence neniu deziris aŭskulti ŝin, dirante:

– Multaj edukitaj viroj vizitadis ŝin, sed iliaj sanigiloj ne helpis. Ĉu vi, ordinara vilaĝanino, estos pli prudenta ol ĉiuj doktoroj?

Tamen, kiam ŝi ne ĉesis aserti, ke ŝi povas sanigi la malsanulinon, la gardistoj transdonis la novaĵon al la reĝo, kiu ordonis lasi ŝin en la reĝinan ĉambron. Ŝi tuj ordonis demunti la plankon kaj eltiri la venenan ranon, mortigantan la reĝinon per sia venenaodoro. La reĝino tuj resaniĝis.

La reĝo tre ekĝojis pro tia miraklo kaj deziris doni al ŝi multajn donacojn, tamen la virino diris:

– Atendu, la plej nobla monarko. Tio ne estas ĉio.

Ŝi ordonis, ke gardisto iru al la urba placo kaj rulpuŝu flanken la grandan ŝtonon. Apenaŭ ĝi estis movigita, elŝprucis fonto de klara akvo, kiu baldaŭ plenigis la sekiĝintan riveron. Ĉiuj urbanoj kuris al la akvo. Ekfloris ĝardenoj, ekverdis la kampoj. La reĝlando estis savita.

Tiam la reĝo donis al ŝi multe da ora mono, kun kiu la virino aĉetis domon kaj bele ekloĝis en ĝi.

Ŝia filo, vivante sola, perlaboris neniajn riĉojn kaj vagadis tra vilaĝoj almozpetante. Iel tute hazarde li ekkonis ke lia patrino reaperis kaj estas sana kaj riĉa. Tre miris la durkora filo kaj urĝe iris esplori ĉu estas veraj la homaj onidiroj. Li ĝuste trovis la patrinon loĝantan en bela domo kaj havantan multe da mono. La patrino invitis lin loĝi kune, tamen li ne konsentis.

– Diru al mi, patrino, kiu donis al vi tiujn grandajn riĉojn? – demandadis li kaj liaj okuloj brilis avarece. – Ankaŭ mi deziras akiri riĉojn kaj vivi senzorge.

– Riĉojn, sanon kaj bonan vivon al mi donis tri korakoj. Kiam vi lasis min solan sub la kverko, meznokte ili alflugis kaj diris, kion mi faru por ekesti riĉa.

Aŭdinte tion, la filo rapidege kuris al la arbaro serĉi la kverkon, sub kiu li estis lasinta sian patrinon, neatentante, kion ŝi plu deziris diri al li. Li urĝis por fariĝi riĉa.

Trovinte la kverkon, li sidiĝis sub ĝi kaj atendis ĝis kiam la korakoj alflugos. Meznokte ili aperis sur la pinto de la arbo.

– Fratoj, – ekparolis la unua, – kio okazis, ke tra la urbo denove fluas rivero plena da akvo kaj la granda ŝtono sur la placo estas

puŝita flanken. Mi pensis, ke la urbo tuj ekestos dezerto, sed ĝi estas eĉ pli verda ol antaŭe.

– Mi ankaŭ ne povas percepti, kiel la reĝino povis saniĝi, ĉar ŝi estis tute proksime al la morto, – revokis ka dua korako. – Ja neniuj sciis pri la venena rano, sidanta sub la planko.

– Ĉu ne estas iu kaŝaŭskultinta kaj ekkoninta ĉiujn sekretojn? – krakis la tria korako.

– Mia patrino kaŝe aŭskultis! – ekkriis la filo de la virino. – Ŝi aŭdis ĉion, kion vi parolis. Forprenu ŝiajn riĉojn kaj donu ilin al mi.

– Hej, kion vi faras? – li kriegis, ĉar la korakoj kvazaŭ nigraj fantomoj malsupreniĝis el la pinto de la arbo kaj bekhakis liajn okulojn. Pro la strebo al riĉoj li perdis la okulojn.

Laŭ Dia volo – enkorbiĝu

Ĉe unu terposedanto servis fraŭlo, kontraktinta ricevi po unu muŝtinon (litovlingve muŝtinis – antikva litova mono) perjare. Post tri jaroj de dunglaboro li ricevis tri muŝtinojn. Forirante li diras al la mastro:

– Mi fidele servis al vi. Donu al mi ian korbon por meti la monon en ĝin.

La mastro donis al li grandan korbon kaj la fraŭlo iris en la vastan mondon. Survoje li renkontis maljulan mizerulon, kiu petis almozon. La junulo tuj eltiris unu muŝtinon kaj donis al la almozulo. Poste li renkontis duan almozpetanton kaj baldaŭ trian. Li donis al ili ambaŭ la postrestintajn muŝtinojn.

Irinte iom plu, li renkontis la kvaran almozulon, maljunegan oldulon. Povante respondi nenian almozpeton pro la malplena korbo, la junulo ekkuris for de li. Vidinte la junulon kuri, la oldulo ekkriis:

– Kial vi kuras for de mi? Ne kuru.

– Kion mi devas fari, se mi povas nenion doni al vi, – respondis la junulo.

Tiam la almozulo diras:

– Pro ĉiuj viaj bonfaroj, vi ricevos ĉion laŭ sia volo. Petu min paradizon aŭ riĉojn, Dio ĉion donos al vi.

– Ne mi bezonas nek paradizon, nek riĉojn, – respondis la junulo. Mia nura deziro estas, ke kiam mi prononcos „Laŭ Dia volo – enkorbiĝu“, ĉiuj tuj ekestos en la korbo.

– Bone, – konsentis la oldulo kaj foriris laŭ sia vojo.

La junulo iris plu kaj vespere atingis ian bienon, la mastroj de kiu intencis gastigi ie kaj tie tranokti. Li petas tranoktejon, tamen la bienposedantoj diras:

– Ni ne povas akcepti vi, ĉar ni mem vetras al alia bieno por tranoktado. Kvankam en nia bieno loĝas cent homoj, ni povas nenion fari, ĉar ĉiunokteen la bieno aperasmultego da diabloj, kiujn ĉiuj timas. Ĉu vi sola esperas venki ilin?

Ne obeante la admonon, la fraŭlo ne ĉesas peti, ke li estu permesita tranokti tie.

– Faru, kiel vi volas. Tranoktadu, – diris la sinjoro, sidiĝante en la kaleŝon.

La sinjoroj forveturis kaj la junulo restis sola en la tuta bieno. Ĉe la pordo de la plej bela ĉambro li pendigis sian korbon. Li prenis libron, sidiĝis ĉe la tablo kaj legas. Subite enkuris tra la pordo kornhava diablo kaj ekkriis:

– Kiu studas literojn, certe trafos inferon...

La junulo ne hezitis:

– Laŭ Dia volo – enkorbiĝu!..La diablo bam! – kaj jam sidas en la korbo. Tuj alkuris alia diablo kaj lia sorto estis la sama. baldaŭ la tuta korbo estis plena da diabloj. Tiam la junulo ekbatis ilin, demandante:

– Kial vi en la bieno kuraĉas? Kial vi homan vivon maltrankviligas?

La enkorbigitaj diabloj ekkriis:

– Ĉi tie en la bieno estas kadavro de malbenita pekulo, kiu dum sia vivo tre molestis homojn. Ĝi apartenas al ni. Donu ĝin al ni kaj ni tuj forlasos la bienon.

La junulo konsentis, ke la diabloj prenu ilian apartenaĵon kaj liberigis ilin el la korbo. Tiuj skribis sur marmora tablo per fingroj: „Ni

promesas neniam plu viziti ĉi-bienon kaj nokte ne perturbi la trankvilon“. Eĉ la estro de la diabloj Lucifero tion subskribis. Tiam kun granda bruo ĉiuj elkuregis el la bieno, preninte sian apartenaĵon, kaj la junulo enlitiĝis kaj kviete dormis ĝis la mateno.

Matene revenantaj sinjoroj opiniis, ke ili ne trovos la junulon vivan kaj tre miris ekvidinte lin dormantan. Poste ili ekvidis la skribaĵon de la diabloj sur la marmora tablo kun la subskribo de la ĉefa diablo Lucifero Ili demandas:

– Bonvolu diri, karulo, kiel ni povas rekompenci vin por la venko de diabloj kaj la trankvilo en la bieno?

– Nenion plu mi deziras krom zorgi pri mi en la bieno ĝis mia morto, post kio enterigu min dece, kaj la korbon metu en la ĉerkon.

Lia volo estis plenumita.

Kiam li mortis, iris li al la pordego dela paradizo kaj tie Sankta Petro eĉ paroli kun li ne deziras.

– Ja tiam antaŭ longe paradizo estis al vi ofertita, do kial vi tiam ne konsentis? Kaj nun mi vin ne enlasos.

Nenio estas farenda, do la junulo iris al la infero. Apenaŭ la diabloj ekvidis lin venantan, ĉiuj ektimegis, ĉar konis ke la loko en la korbo estas malvasta, kaj malgraŭ tio ili devos rampi en ĝin. Ili tuj fermis la pordon de la infero por ke li ne eniru. La junulo atendis iom kaj iras ree al Sankta Petro.

– Ĉu vi enlasos min bonintence? – li demandas.

– Mi ne lasos, – diras Sankta Petro.

– Se tia estas via respondo – „Laŭ Dia volo – enkorbiĝu!“

Kaj li enkorbigis Sanktan Petron. Ekvidis lin Sinjoro Dio kaj diras:

– Kiel vi trafis ĉi tien? Ja mi ordonis al Sankta Petro vin ne enlasi.

– Laŭ via volo li en mia korbo sidas.

Kaj ĵetis lin el la korbo ĉe la Diaj piedoj.

Ridetis Dio, kaj permesis al li en la paradizo resti.

Abeletoj

Mortanta patro vokis ambaŭ siajn filojn kaj diras:

– Filetoj, mi lasas vin en ĉi mondo, ĉar mi foriras al la bona Dio. La bienon laŭregule mi postlasas al la plejaĝulo, kiu devas dece subteni la pli junan kaj neniam lin malutili. Mi ne scias, kiel vi vivos, sed mi certe konas, ke se vi amos unu la alian kaj obeos ĉi-atentigon, Dio vin helpos, se okazos kontraŭe – malfeliĉoj vin trafos.

Post tiuj vortoj la patro mortis kaj la filoj ekestis orfoj. Dum ili estis needziĝintaj, ĉio bone sukcesis, sed kiam la pliaĝulo venigis hejmen edzinon, la vivo ŝanĝis. La bofratino malamamis la plijunulon kaj konstante incitadis sian edzon kontraŭ li.

– Atentu, li emas la bienon ekposedi. Pelu lin for, ne estu plu liaj piedoj ĉi tie. Kial li manĝu vian panon kaj malsukcesojn al vi deziru. Krome, laborulo li estas mizera.

Tedige ŝi flustris en liajn orelojn, ĝis tiu ne plu sukcesinte toleri tion, enpoŝigis al la frato panpecon kaj forpelis lin en la vastan mondon.

Nenio estas farenda, kiam en la naskiĝloko ekmankis al li ne nur pano ĉiutaga, sed ankaŭ subtegmenta rifuĝejo. Iras li kaj larmoj el liaj okuloj senĉese falas. La fraŭlo estis pacema, kapablis kvereli kun neni, ju pli kun la pli aĝa frato.

Irante survoje, li atingis grandan arbaron. Subite leviĝis nigraj nuboj, ekfulmis kaj ektondris. La tondro frapadis kvazaŭ furioza virĉevalo per la piedoj, eĉ la tuta arbaro bruegis. Abrupte ĝi frapis arbon, kiu tuj ekbruliĝis.

Rigardis la junulo al la brulanta arbo kaj vidis, ke ĝi estas la loĝejo de abeletoj. Ili timiĝinte ĵetis sin al la fraŭlo, petante helpon. Li tuj

forprenis sian lanŝtofan ĉapelon, ĉerpis per ĝi akvon kaj neniigis la flamojn tiel, ke neniue abelete, neniue mielĉelaro estis damaĝita.

– Ni ne forgesos vin! – promesis la abeletej, akompaninte lin en lia vojaĝo.

La fraŭlo vojaĝis dum kelkaj plu tagoj kaj atingis la randon de la arbaro. Li ekvidis grandan bienon, ĉirkaŭkreskita de verda ĝardeno, kaj en la ĝardeno tiom da abelujoj, kiom estas fungoj en muskaro post pluvo.

Iris la fraŭlo al bienposedanto por ripozi kaj peti vespermanĝon. Ekvidis li, ke la mastro estas grizharulo kaj lia filino nenie vidita belulino. La junulo estis sidigita ĉe tablo kaj regalita per bongustaj manĝaĵoj. Kiam li satiĝis, li estis demandita pri la kialo kaj la celo de lia vojaĝo.

– Mi iras, kien miaj okuloj montras, kien la piedoj portas, – diris la fraŭlo. – Mia frato pelis min for el la hejmo, doninte al mi nur unu panpeceton el la tuta patra heredaĵo. Mi scias, ke Dio devus helpi min, ĉar mia mortanta patro diris la samon.

La grizhara bienposedanto por ia tempo silentis cerbumante kaj diris:

– Mi maljuniĝis kaj estas malfacile por mi la bienon prizorgi. Mi bezonas bofilon, junan laboreman viron. Ĉu vidis vi, kia belulino estas mia filino? Do! Mi ne emas fordoni ŝin al ia hazardulo, sed nur al virta kaj tre laborema edzo. Ĝis nun multaj provis sian bonŝancon, sed neniue taŭgis por mi. Mi vidas, ke vi estas virta viro, sed ĉu laboremma, nur sola Dio konas. Ĉu vi deziras provi vian bonŝanco?

La filino de la bienposedanto tre plaĉis al la junulo kaj li ĝoje konsentis preni la indikitan laboron. La maljunulo kondukis lin al la garbejo, plene amasigita de flavaj tritikoj kaj diris:

– Ĉu vi vidas la garbejon plenan de greno? Penu ĉi-nokte draŝi ĉion, purigi la grajnoj kaj verŝi ilin en la grajnejojn. Se vi plenumos la laboron, mi donos mian filinon kaj alproprigos la bienon al vi, sed se vi ne sukcesos, bonvolu vojaĝi for. Tio signifos, ke vi ne bonŝancis kaj nenio estos farenda por mi.

– Bone, – diris la junulo, neperceptante kiel tia laboro estas farebla. La mastro lasis lin starantan ĉe la garbejo kaj li mem iris en la domon. Paŝadas la junulo tra la bieno kaj skrapas sian okcipiton, pensante, kio estas farenda.

– Venu, abeletoj, por helpi min, – invitis li.– La tuta tritikaro de la garbejo devas esti draŝota.

Vespere, kiam mallumiĝis, la abeloj ekflugis en la garbejon, kvazaŭ nigraj nuboj de tempesto. Unuj draŝas la grajnoj, aliaj portadas pajlon, kaj ankoraŭ aliaj grajnoj deŝeligas. La suno ankoraŭ ne estis leviĝinta, kiam la tritiko estis draŝitaj, la grajnoj portitaj al la grajnejojn, la pajlo bonordigita.

La mastro venis kaj pro mirego apenaŭ perdis spirkapablon. Ĝis nun neniu estis sukcesinta fari tiun laboron, kaj la junulo kapablis plenumi ĉion dum unu nokto.

Li fordonis sian belegan filinon kaj alproprigis al la junulo la bienon, kun la vortoj:

– Vidu, kiel pravis via patro: al virtulo Dio ĉiam helpas.

Tiel la junulo, komencinte sian vivon nur kun peceto da pano, ekestis riĉa bienposedanto, kaj lia frato pli kaj pli malriĉiĝis, ĝis kiam li devis vagadi tra la mondo almozpetante por peceto da pano.

Kontrakto kun diablo

Antaŭ tre tre longe dum la tempo de servuto, sinjoroj ege afliktadis vilaĝajn homojn. Se iu ajn malfruiĝis al la bienaj laboroj aŭ ne pagis impostojn ĝustatempe, li estis kruele vergata.

Iam revenas el la bieno homo, dolorege vergita, kaj kortuŝe ploras, jene parolante:

– Ho ve, kia malfeliĉo, kia malfeliĉo!

Dume li iris preter marĉaro, en kiu loĝis lama diablo je la nomo Malfeliĉo. Jen li hop kaj ekstaras antaŭ la homo.

– Mi estas Malfeliĉo. Kial vi vokis min?

– Mi vokis nenian Malfeliĉon, ĉar mi mem havas sufiĉe da ili, – respondis la homo. – Hodiaŭ en la bienomi estis tiel batita, ke ne plu estas nedifektita loko sur mi, kaj morgaŭ ili promesis plimultigi. Ili diras, ke mi impostojn ne pagas, sed kial mi povu pagi, ne havante eĉ unu groŝon ĉe mi.

La diablo palpebrumis al li per unu okulo kaj diras:

– Kion vi donos al mi, se mi liveros monon al vi por pagi ĉiujn impostojn al la sinjoro?

– Kion mi povas doni, se mi nenion havas, – respondĵetis la homo kaj emis foriri, tamen la diablo haltigis lin.

– Ne urĝu! – kaptis lin je la maniko. – Fordonu al mi tion, kion vi hejme ne lasis kaj mi vian grajnejon verŝos plenan da mono.

„Kion mi ne lasis hejme, – pensas la homo. – La diablo verŝajne desiras trompi min, sed pritaksante la morgaŭan vergadon, mi devas

vole-nevole konsenti. La grajnejo plena da mono... Ho, kia multego tio estas.

– Bone, – diris la homo. – Mi konsentas!

– Tiukaze subskribu – la diablo prezentis al li peceton da virbova led. – Subskribu per sia sango!

La homo tranĉetis sian fingron kaj subskribis.

– Atentu, ke la mono estu preta ĉi-vespere.

– Neafliktiĝu! – respondĵetis la diablo. – Vi ankoraŭ ne estos veninta hejmen, kiam la mono kuŝos en via grajnejo.

Venis la homo hejmen kaj eĉ ne malferminte la pordon, ekaŭdis ies ploradon per maldika voĉeto. Li timiĝis kompreninte, ke Dio donis al li infaneton, kiun li tute neatendite vendis al la diablo.

– Nenio estas farenda, – diris li. – Ĉio estas laŭ la Dia volo. Estos tiel, kiel li deziras.

Irinte al la grajnejo, li ekvidis ĝin plenan da ormoneroj. Li tuj pagis ĉiujn impostojn al la bieno kaj ekestis riĉa. Li konstruis novan loĝejon, kaj klerigis sian filon. Post la studoj la junulo ekdeziris pastrigi kaj li eniris la pastran seminarion. Liaj studoj daŭras unu jaron, la duan jaron, sed veninte hejmen por ferio, li vidas, ke liaj gepatroj ne ĝojas pri lia pastreco, sed rigardante al li ili daŭre ploras.

– Kial vi ne ĝojas pri mia pastreco? – demandis ilin la filo. – Mi vidas, ke vi ne estas kontentaj pri mia elekto kaj la studoj.

– Kara nia filo, – respondis la patro, – ni tre ĝojas kaj deziras, ke vi estu pastro, sed mi devas malkovri al vi terurn sekreton, kiun vi ne konis: mi vendis vin al diablo.

Kaj li ekrakontis, kiel li dolorege batita, revenadis hejmen, plendante pri siaj malfeliĉoj:

– Tiam tute neatendite el la marĉo aperis diablo je la nomo Malfeliĉo, kiu trompis min, promesante multegon da mono interŝanĝe pro tio, kiun mi ne estis lasinta hejme. Mi konsentis pro la bezono da mono, kaj veninte mi trovis vin naskiĝintan. Pardonu min pro la okazintaĵo.

– Dankon, patro, ke vi ĉion diris al mi, – rapide respondis la fraŭlo.
– Nun mi iros al la Sankta Papo por ekkoni, kio estas farenda. Kaj vi ne ekscitiĝu, estas eta problemo la diablo kaj liaj trompaj dokumentoj.

Li surmetis pastrajn vestojn kaj ekiris al la Sankta Papo. Iras li unu tagon, iras alian, tamen ne videblas la fino de la vojo. Finfine iam vespere apud arbaro li venis ĉe la domo, en kiu li trovis nur virinojn kuirantajn vespermanĝon. Ekvidinte la fraŭlon, ili diris:

– Pastreto kara, iru ien alien, ĉar kiam venos niaj edzoj kaj trovos vin ĉi tie, ili certe mortigos vin.

Ja iliaj edzoj estis rabistoj kaj nenies vivon ŝparadis.

– Kien mi iros, – respondis la fraŭlo, – mi estas tre laca kaj estas jam nokto. Donu al mi liton, eble ili min ne trovos.

Kompatis lin la virinoj kaj kuŝigis lin en la plejbonan liton. Kiam li enlitiĝis, venis la rabistoj.

– Kial ĉi tie senteblas laodoro de fremda homo? – ili ekkriis.

La virinoj kontraŭdiradis, ke neniu ĉi tie estis, tamen ili ne kredis. Ili ekserĉis kaj trovis la fremdan homon. La fraŭlo ekvidis la rabistojn kaj pensis, ke la morto estas neevitebla.

– Kiu vi estas? Kien vi iras?

Li ekrakontis, ke li iras en Romon al la Sankta Papo kaj poste li vojaĝos al la infero por repreni de diablo la promeson, donitan de lia patro.

Eĉ la rabistaj okuloj elorbitiĝis pro scivolemo.

– Bone, vi povas iri. Nur en la infero esploru, kia loĝejo estas pretigata por ni. Ankaŭ eksciu, kiel vivas niaj patroj kaj prapatroj, kiuj ankaŭ estis rabistoj.

La fraŭlo promesis inspekti ĉion kaj reveninte rakonti pri tio.

La rabistojbone lin regalis kaj kun estimo forigis lin en la vojaĝon.

Vojaĝante li atingis Romon, kaj irinte al la Sankta Papo demandis:

– Do, kion nun mi faru?

La Sankta Papo pensis kaj donis al li tian konsilon:

– Prenu el preĝejo iom da sanktigita akvo, prenu ŝprucilon kaj irinte al la pordego de la infero ekŝprucigu per ĝi la pordegon. Kiam la diabloj ekhurlos kaj demandas, kion vi bezonas, respondu: „La marĉa diablo trompis mian patron, aĉetinte min en la diablan proprieton. Pro la kaŭzo, ke mi apartenas al diablo, mi devas loĝi en la infero. En la centro de la infero mi konstruos preĝejon kaj ĉiutage mi ŝprucigos vin per sanktigita akvo.

Dirite – farite. Li venis al la pordego de la infero kaj eksanktigis ĝin. Ekestis grandega bruo, hurlado, ĉar la diabloj eĉ sur la inferajn murojn grimpas, kaj pleje kriegas ilia estro Licifero, katenigita en la centro de la infero.

– Ĉesu! Kion vi deziras de ni?

– Mi intencas forpeli vin el la infero kaj ĉi tie preĝejon konstrui.

– Ĉu vi ne trovas alian lokon? Kial vi nepre ĉi tie decidis?

– Mi ne trovas, ĉar vi trompis mian patron kaj de li aĉetis min. Tial mi estos kun vi kaj ĉiutage ŝprucigos vin per sanktigita akvo.

– Mi redonos tiun dokumenton, vi nur donu al ni kvieton.

– Nu, bone, – respondis la fraŭlo, – se vi redonos la dokumenton, mi foriros kaj neniam plu revenos.

– Tuj redonu al li tiun dokumenton! – ekkriis Lucifero.

La diabloj kuras tien kaj reen, sed neniu posedas la dokumenton. Tiam estis kunvokitaj ĉiuj, vagantaj tra la mondo kaj homojn trompantaj. Tuj alkuris ankaŭ la marĉa diablo je la nomo Malfeliĉo. Lucifero demandas lin:

– Ĉu vi trompis la patron de tiu ĉi infano?

– Kompreneble, – respondis la lamulo.

– Tuj redonu la dokumenton.

– Kion plu vi pripensos? Ne donos mi!

La diabloj ekbatis, ekinĉis lin sed tiu obstinis kaj ne donas. Tiam la fraŭlo verŝis iom da sanktigita akvo sur lin. La diablo ekjelpis kaj, eltirinte la dokumenton, redonis ĝin.

– Prenu. Mi timas, ke vi miajn okulojn forbruligos per tiu akvo.

– Ne timu. Mi nenion faros al vi, ĉar vi redonis la dokumenton. Vivu laŭ viaj kutimoj!

Li forlasis la inferon kaj direktiĝis hejmen. Revenante li vizitis la Sanktan Papon por danki lin pro la konsilo kaj rakonti pri la okazintaĵoj. La Sankta Papo mempersone sacerdotigis lin kaj tre bele benis lian vojaĝon al la gepatroj.

Survoje li trovis la rabistan domon kaj la rabistojn, atendantajn lian revenon. Ekvidinte lin li ĉirkaŭkuris kaj ekdemandis:

– Mi vidis, – respondis la fraŭlo, – viajn gepatrojn kaj geavojn spertantajn grandegajn suferojn. Mi al neniu dezirus tian finon. Kaj por vi estas pretigita eĉ pli terura loko.

La rabistoj aranĝis por li bonan vespermanĝon kaj matene akompanis lin en la vojaĝon. Ĉiuj akopanintuloj revenis hejmen, sed unu neniam lasas lin, iras kune.

– Revenu, – la juna sacerdoto diras al li, – poste vi ne trovos sian hejmon.

– Mi ne deziras reveni kaj vivi kun rabistoj. Kiam vi rakontis pri nia sorto postmorte, mi ekdeziris komenci la vivon de virta homo. Vi al mi nur fiksu penton por ĉiuj miaj malbonaj faroj.

La sacerdoto havis pomarban bastoneton. Li prenis la bastoneton, enterigis ĝin kaj ordonis al la rabisto genue iri ĉirkaŭ ĝi kaj humidigi ĝin per larmoj ĝis kiam ĝi revivos, kreskiĝos kaj donos fruktojn. Postlasinte la rabiston, li iris hejmen. La gepatroj tre ĝojis, vidante lin vivan kaj sanan kaj eĉ pli, ekkoninte ke li estis sacerdotigita de la Sankta Papo.

La juna sacerdoto, liberiĝinta el la diablaj intrigoj, estis tre pia kaj tre amata de homoj. Kun la kuro de jaroj li ekestis kanoniko, tre honora ekleziulo. Ifoje li trafis veturi laŭ la sama vojo, kiam li vojaĝis en Romon. Li estis ĉion forgesinta: la rabistan loĝejon kaj la rabistojn mem. Veturante li subite ekflaris la odoron de pomoj. Li tuj sendis serviston por esplori, kie kreskas pomujo. Ĝi estis plenplena da mirindaj pomoj, brilantaj, kiel diamantoj kaj odoranta per paradizaj aromoj. Li ekvidis, ke ĉirkaŭ la pomujo surgenuie movis maljunulo kun neĝblanka hararo kaj plorante humidigis ĝin per larmoj. Surpriziĝis la servisto kaj kurkuregis al la kanoniko por diri al li pri la neniam vidita okazintaĵo. La kanonikan koron pikis rememoro pri rabisteto, al kiu antaŭ multaj jaroj li estis fiksinta la penton. Irinte li vidis, ke li estas la sama, nur ege maljuniĝinta kaj malsanuloza. La rabisto reciproke rekonis lin kaj petis, ke li aŭskultu lin, ĉar li jam baldaŭ mortos. Li estis farinta ĉion laŭ la ordono de la juna sacerdoto: li humidigis la pomarban bastoneton per larmoj kaj gnuumis ĉirkaŭ ĝi ĝis tiu ekestis potenca pomarbo, plenkreskinta per belegaj kaj ege aromaj pomoj.

Sidiĝis la kanoniko kaj konfesigis la maljunuleton. Kiam li mencias pekon, unu pomo tuj falas dela pomarbo kaj malaperas. Tiamaniere ĉiuj pomoj falis teren, ĝis kiam sur la pinto postrestis pendantaj du la plej grandaj. Silentas kaj pensas la rabisto, ĉar nenion plu li memoras. Finfine li memoris, ke li estis tre malbona por siaj gepatroj. Apenaŭ li diris ĉi-pekon, ambaŭ pomoj tuj falis teren. Tiam la kanoniko absolvis la maljunulon. La maljunulo tuj cindriĝis kaj lia animo flugis al la paradizo. Li estis sola el ĉiuj rabistoj, kiu evitis preparitan por ili inferon.

Ĉiu ruzulo ĉiam renkontas pli ruzan

Iam estis riĉa monaĥejo, kie la monaĥoj vivis senzorge, nenion mankante. Interkonsentinte ili skribis sur la pordego: “Ni vivas sen zorgoj kaj ĉiam tiel vivos.”

Baldaŭ la monaĥejon preterveturis la reĝo, celante ekscii, ĉu sinjoraro ne afliktas homojn, ĉu ĉiuj observas proklamitajn de li leĝojn. Veturante li ekvidis noticon sur la monaĥeja pordego, legis ĝin kaj diris:

– Nu, vi atendu! Tuj mi liveros al vi zorgojn!

Li vokis la monaĥestron kaj demandis lin:

– Ĉu vere vi ne havas zorgojn?

– Ne, – respondis tiu. – Nenia zorgo turmentas min.

– Nun aŭskultu min atente, – ordonis la reĝo. – Mi revenos post tri tagoj, kaj tiam vi devos respondi tri miajn demandojn. Unua – kiom da steloj estas sur la ĉielo, dua – kiom mi valoras kaj tria – pri kio mi pensas, parolante kun vi? Se vi ne respondos ĉi-demandojn, mi elestrigos vin el la monaĥejo.

La reĝo forveturis, kaj la estro revenis en la monaĥejon tre timiĝinta kaj prizorginta. Neniel li sukcesas pripensi, kiel tiaj ruzaj demandoj estas respondotaj.

En la monaĥejo estis unu maljunuleto, iama almozpetanto, nune zorganta pri fornohejtado. Li ekvidis la prizorgintan estron kaj demandas, kio okazis. Tiu rakontis al la maljunuleto ĉion, kio lian koron premis.

– He, etaj zorgoj tiuj estas, – diras la maljunuleto, – mi estas preta respondi ĉiujn demandojn de la reĝo, nur vi devas promesi, ke mi plu

ne hejtos fornojn, ĉar mi tre tediĝis pro ĉi-laboro.

La estro konsentas:

– Sed vi ĝuste respondu al la reĝo kaj tiam vi povos loĝi en la monaĥejo sen ia okupo. Ni tre bele zorgos pri vi.

– Bone, – diras la maljunuleto. – Tiukaze donu al mi viajn pastrajn vestojn, por ke la reĝo ne rekonu min.

Dirite – farite. Ili interŝanĝis vestojn kaj la maljunuleto iris al la pordego por atendi la reĝon. Post tri tagoj tiu brue alveturas per kaleŝo.

– Nu, – demandas li, – do kiom da steloj estas sur la ĉielo?

– Dekdu mil milionoj tricent tri. Se vi ne kredas, la plej honora reĝo, bonvolu rekalkuli ilin.

– Nu, bone, – respondis la reĝo, – kaj nun diru, kiom mi valoras?

– Ne ofendiĝu, la plej honora reganto, ekaŭdinte mian respondon. Vi verŝajne legis en la Sankta Skripto, ke Judaso perfidis la Sinjoron de la ĉielo kaj tero pro tridek arĝentmoneroj. Ĉar Vi estas reganto nur de la tero, Vi valoras nur duonon de tio, nome – dekkvin arĝentmonerojn.

La reĝo aŭskultas, kaj ne scias, kio farendas – ridado ĉu kolerado.

– Vi pravas, oni ne rajtas esti pli valora ol Dio.

Vidinte, ke la akompanantoj de la reĝo kaŝe ridas, la maljunuleto daŭras:

– Mi konsentas ke dekkvin groŝoj por la reĝo ne estas granda sumo, sed la reĝaj sinjoroj estas eĉ pli malmultekostaj, kaj se vi bezonas kamparanojn, vi povas ricevi sesdek da ili por la foli' de lili'.

La akompanantaro tuj ĉesis ridi kaj la reĝo ree demandas:

– Kaj nun diru, pri kio mi pensas.

– La plej honora reĝo, vi opinias, ke nun vi parolas kun la estro de la monaĥejo, sed mi estas nur ordinara fornohejtisto.

– Se la fornohejtisto estas tiel ruza, do kia tiam estas lia estro? Nu, vivu daŭre sen zorgoj, – diris la reĝo kaj forveturis.

Venas la maljunuleto en la monaĥejon kaj ĉi tie la estro estas apenaŭ viva pro timo kaj tremas kvazaŭ tremola folio.

– Timu nenion, – diras la maljunuleto, – ĉio bonfinis, ĉar mi respondis ĉiujn liajn demandojn. Forveturante la reĝo diris, se fornohejtisto estas tia ruza ne indas eĉ komenci la parolon kun lia estro. Vivu li plu sen zorgoj.

La reĝo Morkus

Vivis iam reĝo Morkus , kiu tre malamis almozpetantojn. Li eldonis ordonon, ke neniu liveru tranoktejon al mizeruloj kaj ne donu almozon al ili.

Iam antaŭvespere, kiam la reĝo ne estis hejme, en lian palacon venis maljuna almozulo. Ekvidis li la reĝidinon kaj eketis, ke ŝi donu tranoktejon.

– Kion vi parolas, mizeruleto? – respondis la reĝidino. – Ĉu vi ne konas, ke mia patro tre malamas almozpetantojn?

Sed tiu daŭre petas kaj petas.

– Akceptu min, karulino. Kien mi iros? Jam estas vespero.

La reĝidino kompatis la maljunuleton kaj akceptis lin por tranoktejo. Ŝi kuŝigis lin en sia ĉambro ĉe la forno, por ke neniu ekvidu lin kaj sciigu la reĝon.

Nokte ŝi vekiĝis kaj aŭdas ies interparolon ĉe la forno.

– Sinjoro, kian talenton havos la antaŭhieraŭ naskiĝinta filo de la tajloro? – demandas la almozulo.

– Li estos mallaboremulo, ŝtelisto kaj li estos pendigita, – iu respondas.

– Kaj tiu, kiu ĉi-nokte naskiĝis en la domo de la urbano?

– Tiu ekestos pastro.

– Kaj la filo de almozpetanto, naskiĝinta en kabaneto?

– Tiu heredos la tronon de la reĝo Morkus.

La reĝidino tre surpriziĝis aŭdinte la interparolon, kaj atendas ĝis la mateno, kiam ŝi povos demandi la almozpetanton, kion signifas tiaj vortoj. Tamen, kiam mateniĝis, ŝi vidis, ke ne plu estas la maljunuleto kaj tute ne koneblas, kie li malaperis. Ŝi tuj kuris al sia patro kaj rakontis pri tio, ke ŝi tranoktigis almozulon ĉe la forno. Poste ŝi priparolis la aŭditajn vortojn.

Aŭdinte ĉion, la reĝo tute serioze ektimiĝis. Li tuj ordonis, ke la ĉevaloj estu jungitaj por ke deziris ekscii, ĉu vere estis novnaskiĝintulo por la almozulo. Veturante li renkontis du piedirantajn gevirojn kaj demandis, kien ili iras.

La renkontitoj diris, ke ili revenas el la almozula kabaneto, al kiu ili estis invititaj porti novnaskiton ke li estu baptita. Ili faris tion kaj nun ili iras hejmen.

La reĝo tuj veturis al la almozulo kaj petas ke la bebo estu vendita al li. Nenia eliro estas por la mizerulo, se la reĝo mem tion petas. Li prenis kelkajn ormonerojn kaj fordonis la infanon al la reĝo. Tiu kaptis la infanon, saltis en la kaleŝon kaj rapidegis al sia kastelo. Veturante traarbore, li prenis la bebon, ĵetis lin en arbotruon kaj mem revenis hejmen.

Okazis tiel, ke lin sekvis pastro kaj aŭdis la ploradon de malgranda infano. Li ordonis al la servisto iri kaj ekkoni, kio tie estis. Tiu rigardas – en la truo kuŝas bebo. Li levis kaj portis lin al la pastro, al kiu la infaneto tre plaĉis, do li decidis adopti lin. Ĝuste tiel li faris.

Post kelkaj jaroj tra ĉi-lokoj veturis la reĝo kaj haltis ĉe la pastro por matenmanĝi. Ekvidinte tre belan infaneton, li demandas:

– Karulo, kiel vi akiris ĉi tiun infanon?

La pastro ĉion rakontis al la reĝo kaj tiu komprenis, ke li estas la infano, kiun li estis enĵetinta en la arbotruon. La reĝo ekpetadis, ke la infano estu fordonita al li.

– Donu lin al mi. Ĉu vi ne timas, ke homoj klaĉos, ke li estas via infano.

La pastro ne pripensas, kion alian fari, do li fordonis la infanon, kvankam tre nevolonte. La reĝo ĵetis la infanon en barelon, hermetike fermis ĝin kaj lasis ĝin flosi en la maron.

La barelo longe floris kaj finfine albordiĝis al la loko, kie staris granda monaĥejo. La monaĥoj tiutage lavadis sin en la maro kaj ekvidis ĝin. La monaĥestro ordonis, ke ĝi estu elakvigita kaj malfermita. Ili vidas ke en ĝin estas enmetita bela infaneto. La infano tre plaĉis al la monaĥestro, do li estis donita rifuĝejon en la monaĥejo.

Pasis kelkaj pluaj jaroj kaj unu tagon la monaĥejon vizitis la reĝo. Li matenmanĝas kun la monaĥestro kaj ne sukcesas ne admiri la belan fraŭleton, servantan al ili ĉe la tablo. Li demandas la estron:

– Kia estas la nomo de ĉi-junulo?

– Barelulo! – respondas la estro.

– Kiel li ekloĝis ĉe vi?

Tiam la estro rakontis, ke li floris al la monaĥejo fermita en la barelon, ke li tre plaĉis al ĉiuj monaĥoj, kiuj decidis kreskigi lin. Tiamaniere li jam estas nun tia granda.

La reĝo tuj sidiĝis, skribis leteron kaj doninte lin al la junulo, ordonis, ke li portu kaj donu ĝin al la reĝino. Kaj en la letero estis sciigo, ke la alportinto de la letero tuj estu dekapigita.

Iras la junulo laŭvoje kaj ĝuas sian vojaĝon. Subite li ekvidis, ke al li proksimiĝas maljuna, mizera almozulo. Alirinte al li, demandas:

– Kien vi iras, filo mia?

– Mi portas leteron al la reĝino, – respondis la junulo.

– Montru al mi la leteron.

Eltiris la junulo la leteron el la sino kaj montris al la maljunuleto. Tiu palpis ĝin kaj redonis:

– Portu, – li diras, – kaj nenion timu. Ĉio bonege sukcesos.

Portis la junulo kaj enmanigis la leteron al la reĝino. Ŝi malfermis ĝin, legas kaj tie ŝi estas sciigata, ke la portinto de la letero la saman tagon devas esti edzigita al la filino de la reĝo.

La reĝino faris kiel ordonita. Dum la nuptofestantoj amuziĝadis, la reĝo revenis hejmen. Li vidas, ke ĉe la tablo sidas gefianĉoj – lia filino kaj tiu junulo.

– Kio ĉi tie okazas? – demandas li reĝinon. – Ja mi ordonis mortigi lin.

Sed la reĝino montris al li lian personan leteron, kie estis klare skribita, ke la junulo devas esti tuj edzigita al la filino de la reĝo.

La reĝo vidas, ke li povas nenion fari, do li decidis pripensi insidon.

Eksciinte ke lia bofilo ĉiutage frumatene iras al la preĝejo por preĝi, la reĝo invitis kelkajn almozulojn, ordonis fosi kavon ĉe la pordego de la preĝeja korto kaj ĵeti en ĝin tiun, kiu estos la plej frua vizitanto de la preĝejo. Li devas esti enĵetita kaj surverŝita per grundo malgraŭ asertado, ke li estas reĝo aŭ la bofilo de la reĝo. La junulo estis ordonitairi en la preĝejon laŭeble frue, ĉar tiutage ili devas veturi ien pro gravaj aferoj.

Tamen tiunokte la junulo preterdormis la tempon de la preĝado. Kaj la reĝo ankoraŭ nemateniĝinte kaŝe iris por vidi, ĉu la almozuloj plenigis lian ordonon. La almozuloj ekvidinte la proksimiĝantan reĝon, tuj kaptis lin kaj ĵetis en la kavon. Poste, malgraŭ la kriego kaj minacoj, ili enterigis lin.

Tiel, dezirante malfeliĉon al alia homo, la reĝo mem pereis.

Du fratoj

Antaŭ longe en ia vilaĝo vivis du fratoj. La pliaĝulo, heredinta la patran bienon, vivis tre bone, sed la pli juna, komencinta sian vivon el nenio, malfacile sin tenis. Krome, la pliaĝulo traktis sin tre prudenta kaj li ŝatis trompi aliajn homojn. Ne unu dungito foriris sen salajro, plorante kaj malbenante la tagon, kiam li estis tie ekservinta. La riĉulo, akceptante la dungoton interkonsentadis, ke tiu plenumu ĉiujn laborojn sen ia kolero. Se li ekkolerus, li estus forpelita sen ia pago, ricevante nek unu groŝon. Poste li tiel laborŝarĝadis la dungiton, ke tiu neelteninte ekkoleradis kaj devis foriri sen ia pago.

Aŭskultadis la junulo pri la fiagoj de la pliaĝulo kaj decidis aranĝi por li instruon. Li iris al la frato kaj diras:

– Frato, akceptu min kiel dungiton. Mi deziras la ĉiutagan panon perlabori.

– Mi povas akcepti, – ekĝojis la riĉulo, – sed vi ja konas la kondiĉojn: se vi ekkoleros, tuj estos forpelita hejmen.

– Bone, – diras la junulo, – sed se vi ekkoleros, tiam mi elhaŭtigos zonon el via dorso.

Pensis, pensis la riĉulo kaj diras:

– Mi konsentas!

Eklaboris la junulo ĉe sia frato, tre penas, ŝvitas, laboro sekvas laboron, ĉar post la plenumo de unu tasko la riĉulo tuj pripensas alian. Vidas la junulo, ke nenio bona estas antaŭvidebla kaj ke lia frato certe bezonas instruadon.

Iam matene la riĉulo ordonis, ke lia frato veturu plugi kampon.

– Kie estas la plugendo kaj kioma estas ĝia areo? – demandas la junulo.

– Jen rigardu, kie mia hundo Petroselo kuradas, do tie plugu.

Por si mem li pensis: “Dum la tago la hundo ĉirkaŭkuros grandegan kampon kaj vi, frateto, laboros ĝis via lango elbuŝiĝos. Vi jam devus ekkoleri.”

Plugas la junulo la kampon kaj la hundo ĉirkaŭkuradas. Subite, tute neatendite, el la arbaro aperis leporo. La hundo Petroselo, bojante postkuris ĝin komence tra herbejo, poste tra tufaroj kaj arbedoj. La junulo tuj lasis la bovojn sekvi la hundon.

La hundo kuris kaj kuris, kien ĝia hunda menso kondukis, kaj la plugisto ĉiam sekvas ĝin. Kiam proksimiĝis la sunsubiro, la hundo kuris hejmen, kaj tiam la junulo ankaŭ kondukis la bovojn tien. La hundo kuris al la barilo kaj tra la truo rampis en la korton. La pli juna frato, pelis, pelis, la bovojn, sed tiuj ne transiras la barilajn fostojn. Tiam la plugisto buĉis la bovojn kaj hakinte ilin en pecojn, tiris ilin kaj la plugilon tra la truo en la korton. Poste li iris al la riĉulo.

– Kie vi vagadis la tutan tagon? – kriegis tiu. – Vi ja neniom plugis.

– Vi ja diris, ke mi plugu, kie via hundo Petroselo kurados. Kiam ĝi ekkuregis tra kampoj kaj tufaroj, mi direktis la bovojn post li.

– Kie nun estas la bovoj? Ĉu vi ne lacigis ilin?

– La bovoj estas, kie ili devas esti. Kiam la hundo veninte al la korto enrampis tre la barila truo, la bovoj neniel deziris sekvi lin. Do mi dishakis kaj tiris ilin en la korton. Vi mem diris, ke mi plugu, kie la hundo kurados.

La riĉulo kunpremis sian kapon kaj kuris por rigardi. Kion lia frato estis rakotinta, estis senduba vero. Kaj tiu veninte post li, ekstaris apude.

– Eble vi koleras fraĉjo? – li demandas.

– Nenio estas kolerinda, – respondis la frato, kaŝante sian aflikton. – La bovaĵo estas manĝenda kaj ĉio estos en ordo.

“Aha, vi atendu, okazos eĉ pli interesaj aferetoj!” – pensis la junulo, kaŝante rideton sub la lipharoj.

Ree li laboras duone vestiĝinta, pelata de sia frato sen ia ripozo. Pasis monato, la bovaĵo finiĝis kaj la riĉulo sendas la dungiton, ke li buĉu ŝafeton aŭ bovideton.

– Kiun ŝafeton aŭ bovideton mi buĉu? – demandas la junulo.

– Nu, tiun, kiu rigardos al vi. Kiam vi kuiros la viandon, aldonu cepon kaj petroselon.

Iris li en la stalon kaj vidas, ke ĉiuj ŝafetoj rigardas al li. Li rigardis al la bovidoj kaj tiuj kun siaj larĝaj okuloj ankaŭ rigardas al li. Ekkuiris li kaldronon kun la viando, kaptis la hundon Petroselon kaj ankaŭ enkaldronogis ĝin. Post ia tempo venis la riĉulo kaj kunpreminte la kapon, diris:

– Ho, vi maltaŭgulo, kion vi faris? Kial vi buĉis ĉiujn ŝafetojn kaj bovidetojn?

– Mi faris, kiel ordonita. Vi mem diris, ke mi buĉu tiun, kiu rigardos al mi. Ĉu estas mia kulpo, ke ĉiuj rigardis al mi?

– Kaj kie estas mia hundo Petroselo? – ĝemetas la riĉulo, ĉirkaŭrigardante.

– Vi ja ordonis enmeti petroselon en la kaldronon. Mi kaptis kaj enmetis ĝin laŭ via ordono. Eble vi koleras, fraĉjo?

– Kial mi ne koleru? Dum kelkaj monatoj vi disrabis mian tutan bienon kaj mi postrestis sen iaj brutoj. Kiel mi nun devos vivi?

Sed la junulo ne aŭskultis liajn plendojn: li elhaŭtigis zonon el lia dorso kaj fajfante foriris al sia hejmo.

Trakimas

Iam vivis malriĉulo, al kiu Dio donacis filon. La infano estas baptenda, tamen neniu deziras esti baptaj gepatroj. Ĉiuj nur mokas lin pro lia malriĉeco. Serĉante baptogepatrojn, li renkontas maljunuleton, kiu demandas:

- Kial vi vagadas tiel ĉagreniĝinta?
- Mi ne sukcesas baptogepatrojn trovi.
- Iru kun mi, – diras la maljunuleto. – Mi baptos vian filon.

La homo ekĝojis kaj kondukis la maljunuleton al sia hejmo, tamen havas nenion por regali lin. La maljunulo diris, ke li serĉu por grajnoj inter murtraboj. La homo serĉis kaj trovis kelkajn sekalajn kaj hordeajn grajnoj, kiujn laŭ la maljunula ordono li muelis. Iĝis granda amaso da faruno, el kiu li bakis panon, bulkojn kaj aliajn bongustaĵojn. Tiam li invitis ĉiujn najbarojn, kiuj tre miris pro la abundeco de ĉio, posedata de la malriĉulo. La infano estis baptita je la nomo Trakimas.

Post la baptofesto la maljunuleto petis, ke la malriĉulo serĉu iom da vakso, el kiu li modlis ĉevaleton al sia baptofilo. Li ordonis starigi ĝin en la grenejon kaj gardi ĝis kiam Trakimas estos plenaĝa. Li ankaŭ ordonis, ke Trakimas estu ekedukata tuj post li sesjariĝos.

Kiam Trakimas plenkreskis kaj edukiĝis, li memorigis sian patron pri la ĉevaleto, modlita al li de la baptopatro. Iris la patro al la grenejo kaj diras:

- Iru kun mi. Trakimas bezonas vin.

Tuj la vaksa ĉevalo ekestis viva, kaj Trakimas mem ekvidis, ke liaj simplaj surhavaĵoj ekiĝis elegantaj vestoj. Ĉe la rimeno ekaperis mirindaj pistoloj. Tiam li dankis sian patron pro ĉiuj liaj bonfaroj kaj

rajdis en la vastan mondon. Rajdante la ĉevalo surpiedigis belegan plumon. Trakimas intencis preni ĝin, sed la ĉevalo malpermesis tion fari:

– Ne prenu, Trakimas, la plumon: okazos granda malfeliĉo!

Sed Trakimas ne obeis kaj prenis la plumon.

Baldaŭ ili atingis ian urbon kaj rajdis al la reĝo. Trakimas plaĉis al la reĝo, do li, forpelinte sian malnovan serviston, enoficigis Trakimas kiel estra lakeo.

Vespere Trakimas prenis la plumon kaj metis ĝin sur la tablon. Ĉio ĉirkaŭe eklumiĝis. Kiam la forpelita servisto ekvidis la mirindan plumon, li tuj kuris al la reĝo kaj diris, ke Trakimas promesis doni al li mirindan plumon, sed nun alproprigis ĝin al si mem.

La reĝo vokis Trakimas'on kaj demandas:

– Kial vi ne donas al mi la mirindan plumon? Se vi ne donos, mi mortpunos vin.

Trakimas tre nedeziras apartiĝi de la plumo, ĉar vere domaĝis ĝin. Nepovante decidi, kion fari, li iras al sia ĉevaleta kaj, ĉirkaŭbrakinte lian kolon, ekploris. La ĉevaleta diras al li:

– Donu la plumon al la reĝo.

Trakimas obeis la ĉevaletan kaj donis la plumon al la reĝo. Tiu tr ekĝojis pri lia faro kaj donis al li abundajn donacojn. Kaj la flatulo servisto eĉ pli multe ekenviis kaj li pripensis pereigi Trakimas'on. Li kuris al la reĝo kaj diri, ke Trakimas promesis doni al la reĝo birdon.

Ankoraŭfoje la reĝo vokas Trakimas'on kaj postulas, ke tiuredonu birdon. Kvankam Trakimas malkonfesas, dirante ke li posedas nenian birdon, la reĝo ne kredas lin.

– Se vi ne redonos la birdon, mi mortpunos vin.

Ree iris Trakimas al la ĉevaleto kaj ploras lin ĉirkaŭbrakinte.

– Ja mi admonis vin, ke vi ne prenu tiun plumon, ĉar pro ĝi vi spertos multajn malfeliĉojn, – diras la ĉevaleto. – Sed konu, ke ĉi tie estas nur floretoj, kaj la fruktetoj estos poste. Nun iru al la reĝo kaj petu, ke li permesu al vi rajdi iomete.

Iris trakimas al la reĝo kaj diris, ke li tuj redonos la birdon, sed li volas rajdi kelkajn horojn. La reĝo permesis. Selumis li la ĉevaleton kaj rajdas. Tiu diras:

– Kiam vi alrajdos al la loko, kie vi trovis la plumon, haltu kaj atenteme rigardu. Mi pelos al vi la birdon.

Trakimas faris kiel dirita. Li atendas starante kaj subite vidas alflugantan helan stelon.

– Tio estas la birdo, – diras la ĉevaleto. – Tuj kiam ĝi alteriĝos, kaptu ĝin brave, sen ia timo.

Tiel Trakimas faris. Li kaptis la birdon kaj rajdinte hejmen, donis ĝin al la reĝo, kiu verŝis Trakimas'on eĉ kun pli valoraj donacoj.

Tamen la flatulo servisto neniel pacienciĝas. Irinte al la reĝo, li ekmensogis, ke Trakimas fanfaronas pri sia povo svati al la reĝo reĝidinon, belegan, kiel tiu birdo.

La reĝo vokis Trakimas'on kaj ordonis tuj trovi tian reĝidinon. Aŭdinte tion, Trakimas tre ektimiĝis, ĉar tute ne havis ideon, kie estas trovebla junulino egale bela al la birdo. Li reiris al la ĉevaleto, ĉirkaŭbrakis lin kaj ploras.

– Kio nun estas farenda. Nun mi certe pereos.

– Ĉu mi ne diris al vi, ke vi ne prenu la plumon, – diras la ĉevaleto. – Sed ĉi tie estas nur la floroj, kaj la pomojn vi vidos poste. Iru nun al la reĝo kaj petu tri violonojn kaj tri belajn horloĝetojn.

La reĝo denove donis, kion Trakimas petis. Tiam li selumis la ĉevaletan kaj rajdis al la maro.

– Nun violonu, – diris la ĉevaleta, – kaj kiam el la maro elpaŝos bela fraŭlino, donu horloĝeton al ŝi kaj permesu al ŝi foriri. Kiam post ia tempo eliros la dua, donu horloĝeton ankaŭ al ŝi kaj lasu ŝin libera. Tamen, kiam aperos la tria, donu al ŝi horloĝeton, ĉirkaŭbraku ŝin, saltu sur min kaj rajdu al la reĝa kastelo.

Trakimas faris, kiel dirita. Ekstaris li ĉemare kaj violonas. Baldaŭeliris el la akvo fraŭlino, bela kiel oksikoko. Trakimas donis al ŝi horloĝeton kaj permesis al ŝi iri. Tiam aperis la dua fraŭlino, bela kvazaŭ rozo. Ŝi ankaŭ estis donacita horloĝon kaj permesita iri laŭ sia vojo. Jen subite el la maro leviĝis knabino de neniam vidita beleco. Trakimas donis al ŝi horloĝeton, kaptis kaj ĉirkaŭbrakis ŝin kaj enseliĝis. Li ne rimarkis, kiel la belulino tiris kolieron for de ŝia kolo kaj ĵetis ĝin en la maron.

La reĝo, ekvidinte la belan knabinonekdeziris edziĝi al ŝi. Sed ŝi diras:

– Mi ne edziniĝos ĝis Trakimas alportos mian kolieron.

La reĝo ordonis, ke la koliero estu urĝe alportita, sed Trakimas ne konis, kiel trovi ĝin en la maro. Li iris al la ĉevaleta kaj renove ploras.

– Nenio alia estas farenda, – diras la ĉevaleta, – iru al la reĝo kaj petu ferajn gantojn.

Ricevinte la gantojn li ree rajdis al la maro. Li haltis sur la marbordokaj la ĉevaleta diras:

– Nun ni subakviĝos. Kiam vi ekvidos alnaĝantan fiŝon kun malfermita buŝo, kaptu ĝin je la branko kaj ĝi elkraĉos la kolieron.

Ĉio okazis kiel dirite. Tamen la belulinodaŭre ne konsentas edziniĝi al la reĝo.

– Konduku Trakimas al mi miajn sep ĉevalojn, tiam mi edziniĝos.

La reĝo ordonas alkonduki la sep ĉevalojn, tamen li ne scias, kiel tio estas farenda. Ankoraŭfoje li iras al la ĉevaleta por peti helpon.

– Ĉi tie estas nur floretoj, poste estos pli malbone, – diras la ĉevaleta. – Petu, ke la reĝo donu al vi dekdu bovajn haŭtojn kaj dudek funtojn da vakso. Kiam ni alrajdos al la maro, mi diros, kio estas farenda.

La reĝo donis ĉion kaj Trakimas rajdis al la marbordo. Tie la ĉevaleta ordonis kovri lin per bovaj haŭtoj, unu sur la alia, kaj kunfiksi ilin per vakso. Poste lidiras:

– Nun mi pelos el la maro al vi la sep ĉevalojn de la belulino. Vi kaptu tiun, kiu estos bridita, saltu sur ĝin kaj rajdu al la reĝa kortego. Aliaj ĉevaloj sekvos vin. Rajdante ne atentu min.

Trakimas faris ĝuste tiel. Ekvidinte sep pelatajn ĉevalojn, li kaptis la briditan kaj rapidege rajdis al la kortego. Aliaj ĉevaloj atakis la ĉevaletan: mordis kaj piedfrapadis lin, sed sen ia rezulto, ĉar li estis kovrita per bovaj haŭtoj kaj vakso. Ili, do kuris post la ĉevalo rajdata de Trakimas.

Ekvidis la belulino la alpelitajn ĉevalojn, sed malgraŭ tio ne konsentas edziniĝi al la reĝo.

– Ordonu, – ŝi diras, – ke miaj ĉevaloj mortstamfu Trakimas'on. Nur tiam mi edziniĝos al vi.

La reĝo ordonis, ke Trakimas tuj iru al la ĉevalstalon por ke la ĉevaloj mortstamfu lin. Trakimas vere ektimiĝis kaj plorante kuris al sia ĉevaleta, kiu diris al li:

– N, vidu. Ĉi tie estas jam ne floretoj, sed veraj pomoj. Sed vi ne timu, iru al la ĉevaloj por ke ili mortstamfu vin. Vi nur petu la reĝon ke li malligu min. Tiam mi alkuros por helpi vin.

Trakimas iris al la reĝo kaj diras:

– Bone, reĝo. Mi iros, por ke sep ĉevaloj mortstamfu min. Nur post ĉio forligu mian ĉevaleton, ke li estu libera.

La reĝo promesis ĉion fari kaj forlasis sep marajn ĉevalojn, kiuj tuj mortstamfis Trakimas'on. Poste li malligis lian ĉevaleton.

Kiam la ĉevaleto alkuris al sia mastro kaj blovis sian spiron en lian vizaĝon, Trakimas tuj reviviĝis. La reĝo kaj ĉiuj korteganoj ekvidis, ke Trakimas fariĝis pli bela kaj brava ol li estis antaŭe.

La reĝo ekvidinte tion, tre koleriĝis. Enviante la belecon kaj bravecon al Trakimas, li diras:

– Ellasu la samajn ĉevalojn por ke ili min mortstamfu. Poste lasu la ĉevalojn, ke ili blovu sian spiron.

Tuj kiam la marĉevaloj estis ellasitaj ili tuj mortstamfis la reĝon kaj forgalopis al la maro. Nek la reĝaj ĉevaloj nek iu ajn alia havis la kapabon de revivigado.

Trakimas edziĝis al la mara belulino kaj ili ambaŭ feliĉe vivis.

La tajloro kaj la diabletoj

La tajloro, tajlorinte la vestojn por la tuta terposedanta familio, vojaĝis hejmen. La tempo estis ĉevespera kaj la hejmo estis ankoraŭ sufiĉe malproksime. Li devis iri tra granda marĉaro, kie ofte aperadis fantomoj: iam diabloj devojigadis homon, iam vespertoj forprenadis lian ĉapon, iam koboldoj grandajn riĉojn promesadis.

La tajloro esperis dum la taglumo trairi la marĉaron kaj poste atingi sian dometon, kvankam tio okazus jam nokte. Tamen subite leviĝis tia densa nebulo, ke ne estis ebla eĉ unu ĝustan paŝon fari. Vidas la tajloro, ke lia nokta vojaĝo ne sukcesos kaj, sidiĝinte sur terbulo, decidis atendi ĝis la nebulo malleviĝos. En ĉi situo via gambo povas trafi marĉan aperturon, kaj tiam vi certe estos pereinta.

Li sidiĝis kaj eĉ ne eksentis, kiel li jam estis dormanta.

Vekiĝinte li vidas, ke la nebulo estis disiĝinta, steloj brilis en la ĉielo kaj apud li staris du sinjoretoj kun nigraj vestoj kaj verdaj ĉapeloj sur liaj kapoj. Vidinte, ke la tajloro jam estas maldormema, la sinjoretoj alparolis lin:

– Karulo, ĉu vi ne povus labori kelkajn tagojn en nia bieno? La sinjoro bezonas ses surtutojn, ses ĉemizojn kaj ses parojn de pantalonoj. Vi ricevos bonan pagon.

– Kial ne? – konsentis la tajloro. – Ja mi laboras por esti pagata. Ni povas veturi, se vi vere bone pagos.

La sinjoretoj fajfis kaj tuj apude aperis kvarĉevala kaleŝo. Ili ĉiuj enkaleŝiĝis kaj la kaleŝo forflugis kvazaŭ ĝi estus portata per birdaj flugiloj. La tajloro sidas kaj orelojn movetas, nekompreneble, kiel laŭ la marĉa vojeto, kie nur piediranto povas trapaŝi, la kaleŝo veturas sen iaj obstakloj.

Baldaŭ ili atingis la bienon, al kiu la sinjoretoj kondukis la tajloron, konstante parolante pri bona perlaboro. Tuj al li estis portita volvaĵo de nigra ŝtofo, el kiu li estis ordigita tajlori la surtutojn, la pantalonojn kaj la ĉemizojn.

– Ĉu ankaŭ la ĉemizoj estos nigraj? – demandis la tajloro.

– Ankaŭ nigraj, ankaŭ nigraj, – certigis la sinjoretoj.

Saltis la tajloro al la laboro, neellasante el la manoj fadenojn kaj kudrilon. Li senĉese laboregas, urĝas kaj la sinjoretoj ĉirkaŭe turnas sin kaj regas lin per bongustaj kukoj. Al la tajloro plaĉis la laboro, ankaŭ la mastroj, sed li konstante pensas pri la rekompenco, ĉu ne trompos lin la sinjoretoj.

Baldaŭ pasis la ses tagoj kaj la lasta surtuto estis tajlorita. Tiam la sinjoretoj demandas:

– Kiom vi prenos por la laboro, majstro?

Pensis, pensis la tajloro, skrapis kaj skrapis sian okcipiton, timante preni tro malmulte kaj ankaŭ troaltigi la prezon. Finfine li diras:

– La laboro daŭris plenan semajnon. Eble unu rublo ne estos tro multe?

Kaj por si mem li pensas, ke nur tre riĉa sinjoro povas pagi tian monsumon. Neniam vidita kazo: eĉ bovino kostas nur kvin rublojn.

– Bone! – ekridis la sinjoretoj. – vi bone laboris, do ni malavare rekompencos. Ni donos al vi cent rubloj, por ke vi ne plendu pri la laborliverantoj.

– Por unu semajno!? – ektimis la tajloro. – Ne, ne, mi ne povas tiom da mono preni.

– Jes, jes por unu semajno! – ekkriis la sinjoretoj kaj ambaŭ ridegas ĝis la perdo de siaj fortoj, tintigante la monon en iliaj poŝoj.

Ili verŝis la orajn rublojn en liajn plenmanojn kaj enkaleŝiginte la tajloron, bruveturis al la urbeto.

Elkaleŝiĝis la tajloro en la centro de la urbeto kaj tuj iris en la drinkejon por trinki iom da varmega teo kun glaso da amara brando. Dum la semajno li pleje pri tio sopiris.

Kiam li iris en la drinkejon, eĉ la mastraj okuloj elpufiĝis.

– Majstro, kie vi estis malaperinta? Dum ses jaroj ni ne vidis vin ne nur en la drinkejo, sed ankaŭ en la urbeto. Via dometo jam preskaŭ tute detruigis per ventoj blovigata kaj dispecigata.

La tajloro eĉ ekkoleris.

– Kiajn fuŝaĵojn vi rakontaĉas? Mi dum unu semajno tajloris vestojn al sinjoretoj. Pri kiuj ses jaroj vi parolas?

Nur post ia tempo kunvenintaj homoj sukcesis konvinkigi lin, ke li vere ie tajloradis dum ses jaroj.

Nenio estis ŝanĝebla. Pro la sinjoreta mono li bele rekonstruis sian dometon, sed li ĉiam evitis veturi tra marĉoj dumnokte.

Vera Vero

Iam en fekunda kaj riĉa lando regis bela kaj prudenta reĝidino, kiu nomiĝis Vera Vero.

Unuj parolis, ke la reĝidino estas tre bona, aliaj plendis pri ŝia severeco kaj rigoreco; unuj amis kaj laŭdis ŝin, aliaj ŝin timis, sed ĉiuj unuvoĉe parolis pri ŝia prudento kaj justeco. Estis ankaŭ tiaj, kiuj nomis ŝin stranga, ĉar ŝi preferis sidi ne sur ora trono, sed sur ordinara ligna seĝo. Ŝi neniam uzis elegantajn meblojn, nek ujojn. Kiam iu demandis ŝin, kial ŝi ne deziras sidi sur trono, ŝi respondis:

– Mi ŝatas ĉion, kio estas natura: se ligno, ĝi devas esti ligno, se oro, ĝi devas esti oro.

Virinoj miris, ke la reĝidino surhavas simplajn, linajn aŭ lanajn, ne silkajn, hejme teksitajn kaj tajloritajn vestaĵojn, sen iaj eksterlandaj ornamaĵoj. Ŝi eĉ ne ornamis sin per orelingoj kaj diamantaj fingroringoj. Ĉiuj miris, miris, sed finfine al kutimiĝis al la reĝidinaj kutimoj kaj ekparolis: „Estas ŝia volo. Ŝi konduku laŭ sia elekto. La plej grava estas, ke ŝia regado estas justa.“

La famo pri la reĝidino disvastiĝis tra la tuta mondo. El la plej foraj landoj homoj venis por vidi ŝin kaj ĉiuj admiris ŝian prudenton kaj belecon. Ne unu juna fraŭlo suspiradis: „Ho, kia feliĉa mi estus akirinte tian edzinon!“

Pasis kelke da jaroj kaj la honoraj konsilantoj de la reĝidino ekparolis jene:

– Estas jam tempo por la reĝidino elekti la edzon. Ĉu kapablos sola virino regi la grandegan reĝlandon?

La reĝidino aŭskultis tiajn elparolojn kaj nur sian kapon ŝancelis:

– Bone! Mi konsentas. Venu ĉiuj dezirantaj ekesti mia edzo kaj la reĝo de ĉi lando.

Ĉi tiuj vortoj de la reĝidino estis urĝe anoncitaj en la tuta mondo.

Alveturis grandega aro da reĝoj, dukoj, grafoj kaj aliaj nobluloj, kiom estas arboj en arbaro! Brilantaj per ornamaĵoj kaj gemoj venis ili el diversaj landoj. Ĉiuj fieras pri siaj multnombraj eskortanoj, riĉoj kaj meritoj, esperante venki aliajn, flankenigi ilin.

Precipe fiere sin tenis unu bela reĝido, kiu moke parolis al aliaj konkurantoj:

– Vi povas iri al la reĝidino aŭ ne iri al ŝi, tutegale vi nenion gajnos. Ĉu vi egalas al mi? La riĉoj de ĉi reĝidino egalas al la miaj.

Estis vero en liaj vortoj. Ĉiu reĝido aŭ bojarido veninta al la reĝidino ricevis nean respondon. Kolere ridis la fierulo kaj ĉiam pli kaj pli fieris.

Finfine estis lia vico. La servistoj kondukis lin en gandan salonegon kaj ekstaris la reĝido antaŭ la brila vizaĝo de la regantino de la lando. La reĝido ekvidis knabinon de nekutima beleco, sidantan sur ordinara seĝo, surhavantajn linajn vestaĵojn, ornamitan sin per herbejaj floroj. Ŝia blonda hararo la plankon atingas kaj la sukkena koliero kvazaŭ suno sur ŝia brusto brilas.

La fiera reĝido ne povas siajn okulojn kredi. Ĉio flavas kaj brilas, sed eĉ eta peceto da oro ne videblas. Li ege ekmiris kaj ekparolis:

– Gloro al vi, ho belega reĝidino! Permesu al mi esti via servanto mian tutan vivon. Mi deziras donaci al vi belegajn silkajn ŝtofojn kaj diamantojn kaj ornamojn vian tronon per oro kaj perloj. Mi estas riĉega kaj ĉio estas farebla por mi.

La reĝidino rigardis al li kaj respondid;

– Oron kaj perlojn mi ne bezonas. Ĵemajta maro elĵetas multe da sukceso, kiu anstataŭas oron. Ĉiumatene mi povas vadadi en la diamantoj de suno – roso, kiu brilas pli bele ol ĉiuj gemoj. Nek mi, nek mia popolo sopiras pri grandaj riĉoj, tial havigu sianj riĉojn al si mem.

La reĝido provis daŭre paroli:

– Reĝidino! Mi nur strebas doni al vi feliĉon, nenion plu.

Sed la reĝidino, rigardinte rekte en liajn okulojn, severe diris:

– Atentu, reĝido, kiun vi alparolas. Mi estas Vera Vero kaj mi malamas mensogon.

La fiera reĝido ruĝiĝis, kompreninte, ke la reĝidino malkovris lian mensogon. Ja li zorgis ne pri la reĝidina feliĉo sed pri ŝia vasta reĝlando. Li foriris kaj kun grandega kolero parolis al siaj amikoj:

– Kia estas la utilo el ŝia nekutima beleco! Ŝi taŭgas ne kiel reĝino, sed kiel juristino, ĉar ŝi ĉion komprenas kaj ĉies pensojn divenas. Vivu ŝi kaj ni vidu, kiun ŝi elektos.

– Ĉu trovos la reĝidino plaĉan edzon, – ekparolis homoj, kiam la edziĝontoj forlasis la palacon.

Nur la regatoj de la reĝidino ne ĉesis kredi pri ŝia feliĉa estonteco.

Pasis iom da tempo kaj en la kortegon de la reĝidino venis tri novaj edziĝontoj.

Ili estis najbaroj de la reĝidino, ŝiaj malnovaj konatuloj, kvankam ili ne ofte renkontadis. Ili estis eskortataj de la taĉmento de soldatoj kaj belvestita servantaro.

La plej aĝa el ili, nomata Maneto, deklaris ke li estos la unua vizitanto de la reĝidino.

– Mi havas unuecon pro mia aĝo kaj posedaĵo. Se la reĝidino rifuzos min, vi iru, sed mi esperas, ke tio ne okazos.

Kaj li pensis por si mem : “Ĉu vi ambaŭ egalas al Maneto? Ĉiuj konas Maneton, kaj en la tuta mondo neniam gento estas pli grava ol la nia.”

Tiam li fiere levis sian kapon, kunpremis per fingroj la sabrotenilon kaj paŝis en la ĉambregon de la reĝidina kastelo. Li tuj ekvidis la reĝidinon ornamitan sin per ringoj kaj sukcenoj sen ia oro aŭ diamantoj. Ekvidinte ŝin, li ne povis detiri siajn okulojn de ŝi.

– La bela mia najbarino, la regantino de la vasta regno! Jen mi, Maneto, venas por klini antaŭ vi kaj eldiri mian svatiĝon al vi. La gloro kaj famo de mi estas konata tutmonde. Mi venkis multajn landojn, ĉar mia mano neniam tediĝas kaj mia sabro ne malakriĝas. Edziniĝu al mi kaj ni interdividos mian gloron.

Sed Vera Vero nur kapneis.

– Ne, reĝo! Mi ne deziras la gloron, akiritan per sango kaj morto. Estas pli bone feliĉi inter la herbejaj floroj, aŭskulti la susuradon de maraj ondoj kaj ĝui la radiojn de la levanta suno, rebrilantajn en la gutetoj de roso. Krome, sabroj ofte rompiĝas kaj bravaj herooj estas venkataj de pli bravaj herooj. La soldata gloro ne estas stabila. Ni ne konvenas, reĝo, ĉar niaj ĝojoj kaj feliĉo malsamas.

Rigoriĝis la reĝo Maneto kaj forlasis la palacon de la reĝidino, grumblante subnaze:

– Kiom valoras via beleco kaj saĝo, se vi tute ne komprenas la vivon. Vi nur pensu... suno, roso, ondoj... Ridindaĵo nura, nenio plu!

Tiam iris al la reĝidino la dua reĝo, kies nomo estis Kapeto. Li havis belan, seriozan vizaĝon, el kiu brilis prudento kaj inventemo.

Li klinis sin malalte antaŭ la reĝidino kaj ekparolis:

– La plej brila reĝidino! Mi konas, ke vi estas la plej prudenta inter la gregantoj de ĉiuj landoj, do mi proponas al vi mian manon kaj koron. Via beleco kaj praveco, mia saĝo kaj inventemo ebligas nin ekregi la tutan mondon. Ni venkos ĉiujn regantojn, ni alproprigos ĉiujn iliajn riĉojn kaj ni vivos kvazaŭ dioj sur la Tero.

– Ne, ne! – kriis la reĝidino. – Kial al mi apartenu la tuta mondo kaj ĝiaj riĉoj, se mi ne sopiras pri ili? Mia koro ne estos ravigita pri tio, reĝo, ĉar mi sopiras pri pli altaj celoj, ne pri gloro, riĉoj, grandegaj reĝlandoj kaj humilemo de subjugitoj. Reĝo, iru for, ĉar ni vivas en malsamaj mondoj kaj ni ne komprenas unu la alian.

Ankaŭ Kapeto forlasis la palacon de la reĝidino, laŭte parolante:

– Kiu povas kompreni la reĝidinon? Jen ŝi diras, ke deziras nenion, jen parolas, ke ŝi bezonas multe pli. He, ŝi mem ne scias, kion ŝi deziras.

Nun la ĉambregon eniris la plej juna reĝo je la nomo Koreto. Li estis gaja, belaspekta junulo kun ĉiama rideto sur la lipoj kaj kun serena humoro sur la vizaĝo. Li malalte klinis sin antaŭ la reĝidino kaj diris:

– La brila reĝidino, Vera Vero. Vi konas, ke mi ne estas riĉa kaj ke mi ne estas fama pro la milita gloro. Mi mankas ĉion ĉi kaj mi ne demandas pri viaj riĉoj. Mi amas vin kaj mi deziras iri kun vi tra la vivo, helpante ĉiujn malriĉulojn, afliktitojn kaj malfeliĉulojn.

Tiam stariĝis Vera Vero kaj eltenis sian manon al Koreto.

– Jes! Mi konsentas!

Ekaŭdis la homoj, ke la reĝidino Vera Vero konsentis edziniĝi al la reĝo Koreto kaj estis ilia ĝojo senfina.

– Jes! – ili kriis. – Vera Vero devas iri tra la vivo nur kun Koreto, por ke ĉiuj homoj estu feliĉaj kaj kontentaj.